

Registered by Australia Post.  
Publication No. VBH 1849.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro Mac LeFevre, 231 St. John Street, Launceston, Tas., 7250.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** F-ino Brenda Birkett, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 230 (310)

MELBURNO

Jan.-Feb., 1986



## ĈE LA MALFERMO

De maldekstre dekstren: J. Hawks, H. Koppel, M. LeFevre, Konsilanto R. Stone  
R. Harry, M. Ellyard (Foto: Len Eddington, Perto)

## LA 25-a AŬSTRALIA ESPERANTO — KONGRESO EN PERTO

4-a — 11-a de Januaro, 1986

Du novaj Fratuloj de A.E.A.: Tom Elliott kaj John Moore

Ankoraŭfoje — la trian en 32 jaroj — aŭstraliaj esperantistoj, el la oriento, de norda Kvinslando ĝis suda Tasmanio, kaj el centraj Kanbero kaj Adelajdo, transiris la tutan vastecon de nia insula kontinento por kongresi en Perto, urbo de brila kaj pura atmosfero apud la okcidenta marbordo. Per trajno kaj

privata aŭtomobilo, kaj aŭtobuse kaj aviadile ili alvenis. Komence de la 2-a ĝis la oficiala malfermo posttagmeze de la 4-a de januaro, hore ŝvelis la anaro en la granda akceptejo de la universitata kolegio, "St. Catherine", en apudurba sed kampareca, arboplena ĉirkaŭaĵo, kie kongresanoj dormis unuope en kom-

fortaj litcambroj kaj kune manĝis en granda saono, kies pordoj malfermiĝis unuflanke de la akceptejo.

Alĝis al la kongreso 128 gesamideanoj, el kiuj fakte ĉeestis 103. Venis 38 el Okcidenta Aŭstralio, 35 el N.S.K. 11 el Viktorio, 10 el Kvinlando, 4 el Kanbero, 3 el Suda Aŭstralio kaj 2 el Tasmanio. La L.K.K. ĉifoje konsistis el "Triumviraro": Jack Hawks, estro, Chris Dean, Sekretario kaj Owen Loneragan Kasisto. Estis tro da laboro por nur 3 homoj, kvankam aliaj Pertanoj estis pretaj helpi, kiam la "triopo" delegis al ili taskojn.

La **Interkona Vespere** (vendrede, 3/1) servis ĉefe por renkonti denove multajn malnovajn kaj novajn amikojn. Evidentiĝis la klera laboro de Vera Payne, kies multaj studentoj bone impresis. Ekzemple Bill Clarke kaj Eric Hewitt insiste rifuzis "krokodili".

La **Oficialan Inaŭguron** malfermis Jack Hawks, per salutvortoj en la angla kaj post la nacia himno **Konsilanto Rod Stone**, kiu prezentis la ĉefurbestron de Perto, alparolis la ĉeestantojn. Li diris i.a. ke Esperanto rompas la barierojn inter la nacioj, ke Esperanto estas 'jet-epoka lingvo', ke estus dezirinde devige enkonduki ĝin en la lernejojn. Homoj en ĉiuj landoj povus interkomuniki unu kun la alia kaj la kontribuado de Esperanto al monda paco estas mirinda komenciĝo de la "Jaro de Paco". Kaj li aldonis, en Esperanto, ke li deziras al la Kongreso plej grandan sukceson.

AEA — Prezidanto M. LeFevre dankis Konsilanton Stone kaj transdonis al li la anglalingvan libron de Marjorie Boulton "Zamenhof, Creator of Esperanto". Sekvis nun la salutoj de la ŝtataj reprezentantoj. Saluti ankaŭ S-ino Eleonoro Koper, pola esperantistino, kiu hazarde vizitis Perton. Post unu-minuta silento honore al mortintaj membroj dum 1984/85, S-ro Ralph Harry prezentis la kongresan temon "La Kontribuado de Esperanto al Monda Paco". (Ni esperas trovi spacon venontnumere por tiu interesa prelego.)

La **Muzika Vespere**, samtage, estis eksterordinara festo por la oreloj. "Sonoj de Dalmatio" nomiĝis grupo de 12 jugoslavaj muzikistoj kaj kantistoj, en kiu kunestris frato de Vera Payne. Fine Isabel Gale ludis la 'Stilofonon', Les Scott la buŝharmonikon kaj Kam Lee la violonon. La Brisbana Kan'grupo dufoje

prezentis kantojn.

La **DI-SERVO** (5/1) okazis en la Preĝejo 'St. David' en Applecross, laŭ prepariaboroj de ges-roj McGrath. Pastro A.an Brodie uzis Esperanton multfoje, ankaŭ Episkopo Brian Kyme legis kelkajn frazojn en Esperanto. Ralph Harry kaj Isabel Gale legis el la Biblio.

Vera Payne, Ralph Harry kaj Ray Ross gvidis 3 diskut-grupojn pri la **Kongresa Temo**. Marde (7/1) la 3 grupoj kunigis por raportoj pri siaj diskutoj. Post vigla diskuto la kunveno akceptis longan rezolucion sendotan anglalingve al la aŭstralia registaro kaj Esperante al la landaj asocioj. (Pro spacomanko ni devas prokrasti publikigon ĝis la venonta numero.)

#### KANT — KONKURSO

Lunde vespere (6/1) du grupoj partoprenis en la Kant-Konkurso. Ses virinoj el Brisbane (vestitaj en blankaj roboj kun verda zono) kaj Ray Ross prezentis 3 kantojn, tradukitajn de Gaye Phillips. Sekvis ia Esperanto-Ligo de Perth kun 14 kantistoj kaj pianistino sub la gvido de May Eatt, la kondukistino. La virinoj belaspektis en siaj nigraj juĝoj kaj flavaj bluzoj. La viroj portis nigrajn pantalonojn, blankajn ĉemizojn kaj verdajn koltukojn. Ili bele kantis 4 kantojn.

Nur 4-tagojn poste, ĉe la bankedo, S-ino Ruth Tumman anoncis ke la gajninto estis la Esperanto-Ligo de Okc. Aŭstralio.

#### DRAMA — KONKURSO

Kvar grupoj partoprenis (marde 7/1) en la Drama Konkurso. Kanbero prezentis la teatraĵon "Vivo kun Olivia"; Ralph Harry kaj Marj Ellyard bonege aktoris. La Brisbana grupo ludis la komedion "Honesteco estas la plej bona politiko"; sep aktoroj, surpriza fino. Sekvis la Manly grupo (Robi Robertson, Sylvia Burkitt), kiu prezentis teatraĵon de Arthur Schnitzler "Kristnaska Donaco". Fine 7 Pertanoj prezentis melodramon "Dolĉa Emilino".

Kongresanoj devis atendi 3 tagojn ĝis kiam S-ro H. Koppel anoncis ĉe la Bankedo la rezulton: Gajnis la trofeon la **Okcident-Aŭstralia E-Ligo** per 86½ poentoj, dum la aliaj 3 grupoj ricevis 80 poentojn. (Pli da detaloj venontnumere.)

#### Seminarioj kaj Prelegoj

Ĉiumatene okazis klasoj diversnive'aj. Vera Payne instruis komencantojn Arthur Cocking gvidis kurson por 'Post-Komencantoj'. Via raportisto aŭdis, ke

S-inoj Ellyard kaj Gradussov gvidis diskutrondojn.

La kutima literatura post-tagmezo vere ne okazis. Okazis prelegaro jaŭde, (9/1), sed la sola literatura prelego estis tiu de Fay Koppel, "Voco el Sud-Afriko", kiu temis pri verkoj de Edwin de Kock. Krome prelegis O. Loneragan pri "Paco", kaj Vera Payne laŭlegis kontribuon de Trevor Steele, kiu ne povis ĉeesti. La titolo estis: "La nuna situacio en la mondo". Arthur Cocking pledis por pli simpla Esperanto kaj reiro al la Zamenhofa lingvo kaj Bob Felby klarigis "Kia dieto estas preferinda".

La **BANKEDO** okazis vendrede (10/1) en la mangsalono de la Kolegio. Mac LeFevre proponis la toston al la Reĝino kaj Robby Robertson la toston al AEA, al kiu respondis Mac LeFevre, kiu ankaŭ tostis la L.K.K.-n. S-ro M. LeFevre anoncis aljuĝon de la AEA-Honorinsignoj al Tom Elliott kaj John Moore pro iliaj servoj al la Asocio. Tom Elliott persone ricevis la insignon, dum S-ino Kay Howe el Yeppoon akceptis la insignon por John Moore, kiu ne ĉeestis.

Ruth Tumman prezentis la "Kant-Trofeon" al la Perta Grupo, al kiu ankaŭ S-ro H. Koppel transdonis la Drama-Ŝildon. La nova Prezidanto (Ralph Harry) prezentis la "Esperanto-Antologion" al Ĝes-roj Einihovici kaj al la eksiganta prezidanto (M. LeFevre) la libron "Faktoj kaj Fantazioj". Fine Ralph Harry legis ĉapitron el siaj 'Analoj'.

La **URBESTRA AKCEPTO** okazis merkrede, 8/1, en la Urbdomo. Tiu arango ŝuldiĝis al la klopodoj de D-ro Einihovici. Urbestro Michael A. Michael diris, ke ekzistas 3000 lingvoj en la mondo, ke Generalo Eisenhower deklaris ke anglalingvanoj estas malbonaj lingvistoj kaj li menciis la deklaron de Monteideo. Li finis sian alparolon per la vortoj: "Kia pli bona vojo ekzistas por komenci la "Jaron de Paco" ol per Esperanto-Kongreso. Sekvis reĝo en la impona halo tra kies grandaj fenestroj ni vidis la pitoreskan riveron "Swan".

### LABOR — KUNSIDOJ

Prezidanto Mac LeFevre malfermis la A.E.A.-Ĝeneralan Kunvenon (8/1). Li laŭlegis sa'ut-telegramon ricevitan de Don Rogers, Prezidanto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Li proponis, ke la ĉeestantaro akceptu, kiel aprobitan protokolon, la raporton en "The Australian Esperantist" de Januaro/Febru-

ruaro, 1984. (Unuanime akceptita). Li prezentis raporton pri la agado de la Asocio. Marjorie Ellyard prezentis la kasistan, Herbert Koppel la redaktoran kaj Tom Elliott la libro-servan raporton. (Vidu detalojn aliloke.) Li ankaŭ legis raporton de Trevor Steele, Komisiito por la Jubilea Jaro.

S-ro Ralph Harry raportis pri la A.E.A. Biblioteko en Kanbero kaj ke la Instituto de Internaciaj Aferoj, kiu ĝis nun provizis spacon por la Biblioteko, planas konstruon de nova domo en la urbcentro de Kanbero kaj eble provizus konstantan ejon por nia biblioteko, se A.E.A. donacus \$5,000 por la nova konstruaĵo. Li ankaŭ raportis, ke Alan Towsey, Komisiito por la eldono de la "Aŭstralia Antologio", ne povas ĉeesti la kongreson, sed ke la preparlaboroj bone progresas.

Kiel Vic-Prezidanto kaj Komisiito por Eksterlandaj Aferoj, S-ro Harry raportis pri sia multfaceta agado. Li reprezentis la Asociacion ĉe la 3-a Pacifika Kongreso en 1984 en Portland (Usono), kaj samjare ĉe la 69-a Universala Kongreso en Vankuvero (Kanado). En Aŭstralio li estis en daŭra kontakto kun la Aŭstralia Turista Komisiono, la UNO-Asocio, la Baha'i-movado, la Kvakeroj kaj la Asocioj de Instruistoj de Modernaj Lingvoj.

S-ro Gerald Tumman (Komisiito pri Ekspozicioj) raportis, ke post artikolo en "The Australian Esperantist", li ricevis eĉ ne unu peton provizi ekspozician materialon al alĝintaj Esperanto-Societoj. Li raportis pri kelkaj sukcesaj Esperanto-ekspozicioj en Melburno.

S-ro Ray Ross raportis, ke la Esperanto-Federacio de Kvinlando nun havas 120 membrojn. La Somer-Lernejo denove okazos inter la 5-a kaj 16-a de januaro, 1987, en la "Campus Konferenca Centro" de la Universitato de Nov-Anglio, Armidale. Kiel Komisiito pri la Historio de A.E.A., li raportis, ke la 130-paĝa libro "Esperanto en Aŭstralio" aperos probable en aprilo, 1986.

Kiam oni proponis, ke ni ŝanĝu la statuton pri Dumviva Membreco kaj ke estonte la kotizo egalu dekjaran membrokotizon, S-ro R. Harry atengigis, ke por fari tian ŝanĝon oni devus anonci la proponatan ŝanĝon almenaŭ 3 monatojn antaŭ la voĉdono.

S-ro R. Harry raportis pri la Stipendia Fonduso, la Zamenhof-Jubilea Fonduso, la Fonduso Simpkins, la 'A.E.' Subtena Fonduso kaj la arangoj por la

100-jara Jubileo de Esperanto. Post diskuto kaj aprobo, la ĉeestantoj akceptis 6 Rezoluciojn, kiujn vi trovos aliloke.

Nome de la Ekzamena Komisiono, S-ino Fay Koppel klarigis el kiuj tio konsistas kaj kiel ĝi funkcias. Ĉef-Ekzamenisto estas S-ro Trevor Steele (Brisbano) kaj sekretario S-ro R. Harry (Kanbero). Si ankaŭ priskribis kiel oni prezentu sin por ekzameno.

S-ro Ray Ross proponis, ke la 26-a Aŭstralia Esperanto-Kongreso okazu en Brisbano, kune kun la 4-a Pacifika Esperanto-Kongreso. Pro la varmega vetero en januaro, li proponis, ke la du kongresoj okazu inter la 18-a kaj 28-a de septembro, 1988 kaj ke li jam provizore rezervis la Kolegion pri Supera Edukado en "Mount Gravatt". Propono unuanime akceptita.

S-ro Max Wearing, nova kaj tre aktiva membro el Adelajdo, proponis ke A.E.A. forte varbu pri Esperanto inter la instruistoj de fremdaj lingvoj kaj ke en la venonta Libro-Katalogo oni ankaŭ listigu video-bendojn kaj materialojn taŭgan por lingvo-laboratorioj. Krome li proponis, ke ni preparu kaj prezentu proponon al SBS-televida stacio pri produkto de semajna programo por infanoj. Li proponis, ke la moto por la venonta aŭstralia kongreso estu "Esperanto por la aŭstralia junularo". S-ro G. Tumman sugestis, ke la temo estu "Esperanto por la Junularo de la Mondo".

S-ro H. Koppel prezentis proponon de la konata Esperanto-instruistino Audrey Childs-Mee (Rotterdam). Ŝi estas preta veni al Aŭstralio por la venonta kongreso kaj gvidi kursojn laŭ la rekta metodo. Ŝi nur deziras ricevi rekompenco de la vojaĝkostoj. S-ro Ray Ross diris, ke li alte taksas la laboron de S-ino Childs-Mee, sed ke li dubas ĉu kongreso estus taŭga loko por lingva seminario. Oni prokrastu la decidon. La Asocio danku al S-ino Childs-Mee kaj informu ŝin pri la prokrasto, dirante ke la afero ricevos pluan konsideron kiam oportuna okazo sin prezentos.

Sekvis la elekto de la nova estraro. S-ro Mac LeFevre diris, ke pro sia izoliteco en Launceston li ne plu povas daŭrigi kiel prezidanto kaj li petis proponi novan prezidanton S-ro Ray Ross proponis, ke **Ralph Harry** estu la venonta prezidanto. Tiun proponon la ĉeestantoj unuanime akceptis. S-ro Ralph Harry poste gvidis la elektadon

de la cetera estraro.

Post diskuto la membraro elektis unuanime la sekvantan Estraron:

Vic-Prezidantoj: S-ro Ray Ross (Brisbano) kaj S-ino Vera Payne (Perto).

Sekretario: S-ino M. Ellyard (Kanbero).

Help-Sekretario kaj Redaktoro: S-ro Herbert Koppel (Melburno).

**Kasisto: S-ro Owen Loneragan (Perto).**

S-ro Harry proponis kaj S-ro Volo Gueltling subtenis, ke ĉiuj malnovaj Komisiitoj daŭrigu la labron en 1986/87, nome:

Komisiito por la Jubilea Jaro: S-ro Trevor Steele (Brisbano)

Korespondaj Kursoj: S-ro John Moore (Emu Park)

Korespondpetoj: S-ino B. Cleminson (Manly)

Komisiito por Lernejoj: S-ro Arthur Cocking (Manly)

Ĉef-Ekzamenisto: S-ro Trevor Steele (Brisbano)

Libro-Peranto kaj Eldona Servo de AEA: S-ro Tom Elliott (Sidnejo)

Asistantoj: S-inoj M. Elliott, Joan Green

U.E.A. Komitato: S-ro Les Scott (Manly)

Komisiitoj por Ekspozicioj: Gerald kaj Ruth Tumman (Melburno)

Ekspedanto de "Aŭstralia E-isto": S-ro Jack Fallu (Melburno)

Konsilantoj por Klubaj Instruistoj: Vera Payne, Shirley Gradussov (Perto)

Komisiito pri la Historio de A.E.A.: S-ro Ray Ross (Brisbano)

Komisiito pri Somerlernejoj: S-ro R. Ross

Komisiito pri "Aŭstralia Antologio": S-ro A. Towsey (Tahmoor)

Komisiito por Instruistoj kaj Instruistoj: S-ro Max Wearing (Adelajdo)

A.E.A. — Biblioteko: S-ro R. L. Harry (Kanbero)

Kas-Kontrolisto: Elektota de la Estraro

Prof. R. Robertson dankis la Prezidanton (S-ron M. LeFevre) kaj la Kasistinon (F-inon Brenda Birkett) pro ilia granda penado por la Asocio.

S-ro Ralph Harry dankis, pro fari-taj laboroj, al Sylvia Burkitt (nova UEA-Ĉefdelegito), Les Scott (nova UEA-Komitatano) kaj al Joyce Turner (Gazet-Peranto)

**Al la 25-a Australia Esperanto-Kongreso**

pere de Ger-roj T. Einihoviĉi  
Jerusalemo, 5/XI, 1985.

Sur la tuta tersurfaco,  
plej necesa Di-donaco  
estas por homaro — paco.  
En kabano, en palaco,  
(por geedzoj — vivkuraco,  
ĉu en lit', aŭ sur matraco);  
Por nacioj dum agaco,  
politika saĝ-sagaco, —  
estas strebo al mondpaco.

Tial agu ni sen laco  
per proklam' en ĉiu placo  
kontraŭ la milit-minaco,  
en atend' de Dia-graco:

Tuthomara, monda paco.

(Prof. J. Kohen-Cedek)

ooOoo

**REZOLUCIOJ****Akceptitaj de Generala Kunveno  
de la Asocio, 9 Jan. 1986****I.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Notinte**, ke la Stipendia Fonduso kreskis ĝis \$8,504.26

**Rememorigante** la Statuton de la Fonduso, deciditan en Januaro, 1982 (Australian Esperantist p.82)

**Decidas**, ke \$8,000, kiel kapitalo de la Asocio, devas esti prizorgata de kuratoroj, kaj nomas la Prezidanton kaj Vic-Prezidantojn de la Asocio kiel kuratorojn de la Fonduso;

**Invitas** la Esperantajn Organizaĵojn en Aŭstralio kaj individuajn membrojn evoluigi projektojn de stipendio por la decido de la Estraro; kaj

**Petas** al la Estraro anonci, de tempo al tempo, la sumon, kiu disponeblas el la enspezo de la Fonduso.

**II.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Dezirante** trovi konstantan ejon por sia nacia Biblioteko,

**Notinte**, ke la Instituto de Internaciaj Aferoj, kiu provizis spacon por tiu Biblioteko planas novan konstruaĵon en Kanbero,

**Informite**, ke la Instituto eble provizus konstantan ejon por la Biblioteko, se la Asocio donacus \$5,000 por la nova konstruaĵo, kaj

**Notinte**, ke restas pli ol \$4,000 en la Zamenhof-Jubilea Fonduso, kies celo estas helpi pri la akiro de konstantaj ejoj por la movado en Aŭstralio,

**Rajtigas** la Estraron intertrakti kun la Instituto por certigi taŭgan aranĝon,

kaj

**Rajtigas** la kuratorojn de la Zamenhof-Jubilea Fonduso transdoni la restaĵon de la Fonduso al la Estraro por plenumi kontrakton kun la Instituto aŭ simila organizaĵo por la celo indikita en ĉi tiu rezolucio.

**III.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Konstatinte**, ke la Fonduso Simpkins, kiu enhavas \$1,500 estas parto de la kapitalo de la Asocio,

**Decidas**, ke la Fonduso estu prizorgata de la kuratoroj nomitaj en Rezolucio I.

**IV.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Konstatinte**, ke estas \$3,474.72 en la Fonduso por la subteno de **Australian Esperantist**.

**Konstatinte** ankaŭ, ke tiu fonduso ne estas kapitalo de la Asocio, sed ke la donacoj estas faritaj por subvencii la eldonadon de naŭ numeroj en ĉiu jaro,

**Decidas**, ke la mono en tiu fonduso estu transigita al la Generala Konto.

**V.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Ricevinte** la raporton de la Komisiito por la 100-jara Jubileo de Esperanto,

**Notas** la paŝojn jam faritajn kaj rekomendas, ke la Komisiito daŭrigu sian agadon, konsultante kun la Estraro;

**Decidas** rajtigi la Prezidanton lanĉi kampanjon publikan por Jubilea Fonduso, kiu helpu pagi la kostojn de:

- (1) la eldono de la historio de Esperanto en Aŭstralio
- (2) la eldono de la Antologio de Aŭstralia Literaturo
- (3) la Jubilea Ekspozicio
- (4) ĝenerala reklamado, publiko, inform-majo kaj propagando por Esperanto surbaze de la Jubileo
- (5) la akĉeto de novaj libroj por la Biblioteko de A.E.A.

**VI.**

La Aŭstralia Esperanto-Asocio,

**Dezirante** taŭge celebri la 100-jaran Jubileon de Esperanto

**Decidas** okazigi 3-tagan Jubilean Konferencon, je la 10-a, 11-a kaj 12-a de Januaro, 1987, en la kadro de la Somerlernejo en Armidale (5-16 Jan.), kaj

**Invitas** la Esperanto-Federacion de Nova Sud-Kimrio organizi la Konferencon. en konsulto kun la Komitato de la Somerlernejo kaj konsultante ankaŭ kun la Prezidanto.

—RALPH HARRY.

## RAPORTO DE LA REDAKTORO

La du plej gravaj servoj en tutlanda Esperanto-organizaĵo estas sendube la Libro-Servo kaj la asocia gazeto.

La Libro-Servo provizas al la aliĝintaj societoj la necesajn lernolibrojn kaj la literaturon. Pri ĝi raportis nia amiko Tom Elliott.

Mia tasko estas raporti pri nia gazeto "The Australian Esperantist", kiu estas la plej grava interligilo inter la estraro, aliĝintaj societoj kaj la individuaj Esperantistoj.

Pasintjare mia tasko estis treege malfacila. Vi devas scii, ke ni perdis — pro malsano — nian multjaran linotipiston. Ne ekzistas multaj kompostistoj, kiuj kapablas komposti en Esperanto kaj kiam ni trovas iun, kiu kuragas, li kutime ne posedas la Esperanto-literojn.

Post kelkaj provoj mi fine trovis bonan firmaon, kiu estis preta linotipi nian gazeton, sed ne havis la Esperanto-literojn. Tiujn oni devis speciale mendigi por ni el Anglujo. Tiu nova firmao postulas pli da mono por la kompostado. La nova kompostisto bone kunlaboras kun mi, fakte li jam liveras pli bonajn presprovaĵojn ol la antaŭa linotipisto.

La redakcia parto de nia gazeto funkcias sufiĉe glate. Ni denove sukcesis eldoni 18 numerojn dum la pasintaj du jaroj, dank' al la malavaraĵoj donacoj al nia Subtena Fonduso. Internacie konataj Esperantistoj kontribuis artikolojn al nia gazeto, kiel ekzemple Akademiano Bernard Golden, D-ro Arthur Baur, de Radio Internacia de Svislando, Poul Thorson (konata dana Esperanto-verkisto), S-ino Audrey Childs-Mee (Rotterdam), William Vathis (Usona Eks-diplomato) kaj D-ro Klaus Perko (Aŭstrio).

Mia ĉiama cemo estas, ke nia gazeto estas reprezentata per propraj raportistoj de gravaj Esperanto-eventoj. S-ro Ralph Harry raportis pri la 3-a Pacifika Esperanto-Kongreso en Portland (Usono) kaj pri la 69-a Universala Kongreso en Vancouver (Kanado). Les Scott kaj Joyce Turner raportis pri la 70-a Universala Kongreso en Augsburg, Germanio. S-ino Elfriede Ernst (Bruselo) raportis pri la Internacia Kongreso de la Fervojistoj kaj pri la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. El Japanujo raportis S-ro Bunichi Ishizaki kaj el Nov-Zelando S-ino Rita Aagaard.

S-ino Marjorie Duncan sendis intere-

san artikolon pri Seminario en Barlaston, Britujo. Profesoro Robertson ĉeestis kaj raportis pri la Somerlernejo en Armidale Ray Ross detale kaj modele raportis pri eventoj en la Esperanto-Federacio de Kvinlando kaj pri la Brisbana Societo. Ralph Harry kaj Marj. Elyard kontribuis el Kanbaro. Arthur Cocking daŭre sendis interesajn artikolojn. Margaret Chaldecott kaj Eunice Graham raportis el Sidnejo kaj Manly kaj Bob Felby el Adelajdo. Ruth McGrath kaj Vera Payne provizis, de tempo al tempo, artikolojn pri okazintaĵoj en Okcidenta Aŭstralio.

Daŭran dankon meritas Jack Fallu, kiu, kun la helpo de sia edzino Ivy, rapide ekspedas nian gazeton al niaj legantoj. Eble mi ankaŭ malkaŝu, ke Fay Koppel tre severe ekzamenas ĉiujn manuskriptojn kaj presprovaĵojn, por ke la lingvo estu perfekta. Se tamen ensteligas, de tempo al tempo, eraretoj, tio estas kaŭzita de la kompostisto, kiu ne estas Esperantisto. Kiel ofte en la pasinteco Fay ankaŭ havis la malĝojigan devon verki la bedaŭrinde tro oftajn nekrologojn.

Vere severajn plendojn mi ne ricevis. Certaj kritiketoj ne mankis, kiel ekzemple kiam delikatsenta sinjorino plendis, ke oni ne montras bonan guston, kiam en la "Analoj por 1984" oni parolis pri "Bombonoj", kiujn iu metis sub la kusenon de la brita ĉefministro Thatcher. Aŭ pri la samaj "Analoj", kiam unu sinjoro skribis, ke ili estas tro longaj, ke ili estu en nur unu numero de nia gazeto, kaj ne en tri. Mi devas konfesi, ke mi ne kuragiĝis cenzuri la verkon de influhava estrarano.

Vere ĝojigas la koron de redaktoro, kiam li ricevas tian leteron: "Eldoni Esperanto-gazeton en lando kie oni parolas angle, neniam estis facile, sed malgraŭ la malfacilo vi sukcesis eldoni tre bonan gazeton. Mi deziras al vi sukceson dum la venontaj jaroj."

Ke la legantoj ŝatas nian gazeton montras la fakto ke ili malavare donacis pli ol \$1600 al la Subten-Fonduso de nia gazeto, dum la pasintaj du jaroj.

Du aŭ tri membroj pensas, ke nia gazeto kostas tro multe da mono, sed 200 legantoj estas tre kontentaj. Do, en demokrata komunumo la plimulto gajnas. Sed vere, ĉu oni povas prijuĝi gazeton laŭ la kostoj? Gravas kion pensas la Esperanto-publiko pri la gazeto. Unu el la plej elstaraj Esperan-

tistinoj, S-ino Audrey Childs-Mee, Rotterdam, resumis trafte nian gazeton: "The Australian Esperantist" estas unu el la Esperanto-revuoj, kiujn oni povas senhonte legi en trajno aŭ aviadilo — allogaspekta kaj interesenhava. Ĝi restu tia! Kion pli oni povas aldoni? Nenion, ĝi restu tia!

—HERBERT KOPPEL, Redaktoro.

### LIBRO—SERVO de AEA

Financa Kalkulo — Julio 83-Julio 85	
Bonhavo Junio 83 (kase kaj banke)	\$2489.28
Kredito eksterlande	1047.85
Stokvaloro (tra Aŭstralio)	9883.85
Bonhavo entute Junio 1983	13420.04
oOo	
Bonhavo Junio 85 (kase kaj banke)	674.53
Stokvaloro (nekontrolita en kluboj)	14759.79
Kredito eksterlande—	
U.E.A. — f	1369.39 — 595.38
LITF — FR	222.28 — 79.00
Ĉinio	9.90
Bonhavo entute Junio 1985	16098.80
Profito dum periodo 1983-1985	2678.10
Dum la periodo la Libro-Servo tute e'pagis la koston de la eldono de "SUR LA BORDO" kaj havigis al la esperantistaro librojn je favoraj prezoj, dank' al aĉeto antaŭ la lasta krizo de la aŭstralia Dolaro. Novaj stokoj nun aĉetat-(ot)-aj kompreneble devos porti 30% falon en nia valuto.	

Mi prenas ĉi oportunon danki al la libroperantoj, precipe de Kvinslando kaj Okcidenta Aŭstralio pro siaj bonegaj vendoj kaj ankaŭ al Joan Green kaj la Somer-Lernejo. — TOM ELLIOTT.

(Laŭ cirkulero disdonita ĉe la Perta Kongreso.)

### 25th AUSTRALIAN ESPERANTO CONGRESS

#### Late Supplementary List:

122. Bill Graham, Perth
123. Val Graham, Perth
124. Kam Lee, Hobart
125. Thea v.d. Boogaard, Adelaide
126. Eric Hewitt, Perth
127. Jeff Carroll, Perth
128. Pamela Robinson, Sydney
Final State Distribution: W.A. 55;
NSW 35; O'ld. 15; Vic. 13; ACT 4;
SA 3; Tas. 3.

### AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO

Etato de la Spezaro por la 2 jaroj finigintaj la 30 — Nov. — 1985

#### ENSPEZOJ

Kotizoj	1984	\$2,955.00
	1985	2,960.00
	1986	205.00
Dumviva Fonduso		90.00
<hr/>		
		\$6,210.00
Transpagoj el Matasin/ Banham		2,205.00
Transpagoj el A. E. Subtena		800.00
Transpagoj el T. Goldsmith		165.16
Transpagoj el Civic Perm. (Generala Konto)		700.00
Donaco el Kanbera Kongreso		867.00
Donacoj por Centjarfesto		5.00
Ken Linton Fond.		140.00
Sam Ellyard Mem.		305.00
Ĝeneralaj Donacoj		66.62
Diversa'oj		194.64
Ekzamenoj		223.00
Ricevita por Transpago por Matasin/Banham		2,087.40
por A. E. Subtena		1,542.04
por Stipendia		1,035.00
por T. Goldsmith		40.00
repago de pruntodonacoj		500.00
por Abonoj (Monato)		60.00
por Kanbera Klubo		5.00
UEA Kongreso-repago		1,601.56
Interezo Fonduso Simpkins		840.00
Interezo al Ĝenerala konto		81.51
<hr/>		
		\$19,673.93
Saldo 1 Dec. 1983		1,392.17
<hr/>		
		\$21,066.10

#### ELSPESZOJ

"The Australian Esperantist"		
Presado		\$6,661.05
Afranko		1,036.39
<hr/>		
		\$7,697.44
Ĝenerala Afranko		441.92
Banko kaj Poŝtkesto		172.65
Papero, ĝen. presado		498.53
Ĝeneralaj e'spezoj		18.00
Insignoj		10.00
Specialaj pagoj		
Florkrono 23.00	23.00	
Standardo (Okc. Aŭstralio)		108.00
<hr/>		
		131.00
Abonoj (UEA ktp.)		216.20
Memor-ŝranko (S.Ellyard)		410.00
K. Linton Fonduso (Libroj)		136.40

Ekzamen-elspezoj (presado de diplomoj, afranko) .....	139.50
Nacia Biblioteko de AEA .....	230.53
Prunto al U.K.-Fonduso .....	1,000.00
Transpagoj al Matasin/ Banham .....	2,144.37
Transpagoj al AE. Subtena .....	1,610.53
Transpagoj al Stipendia .....	1,212.20
Transpagoj al T. Goldsmith .....	47.00
Transpagoj por UEA (Monato) .....	60.00
Transpagoj por Kanbera Klubo .....	83.29
Repago de pruntodonacoj por "Sed nur Fragmento" .....	500.00
Donacoj al Asocioj (el Fon- duso Simpkins, interezo) ..	840.00
Generalaj donacoj .....	10.00
Presado "Sed nur Fragmento" ..	2,005.00
"Vortoj kun Flugiloj" ..	200.00
Informado .....	165.16
<hr/>	
Totalaj elspezoj .....	\$19,979.72
Saldo 30 Nov. 1985 .....	1,086.38
<hr/>	
	\$21,066.10

<b>AKTIVOJ</b>	
Matasin/Banham-Fonduso ..	\$2,188.91
T. Goldsmith Fonduso .....	872.78
Generala Investaĵo .....	8,507.77
A.E. Subtena Fonduso .....	3,474.72
Stipendio-Fonduso .....	8,504.26
Simpkins-Fonduso (A.G.C.) ..	1,500.00
<hr/>	
Kuratoraj Fondusoj .. ...	\$25,048.44
Generalo Konto (C.T.B.) .....	1,086.38
<hr/>	
Sumo de Aktivoj .....	\$26,134.82

The above statement of Income and Expenditure for the 2 years ended 30 Nov., 1985, has been examined by me with the books and records of the Australian Esperanto Association and is in accordance with these records.

I have not, however, examined:

(i) DUMVIVA FONDUSO, which had a balance of \$1,827.97 at 30 Nov., 1983.

(ii) The KORESPONDA SERVO, and

(iii) The BOOK SERVICE.

(C. W. F. Johns) Hon. Auditor

2 Jan., 1986.

### KOMISIITO RAY ROSS RAPORTAS

Pri "Esperanto en Aŭstralio, 1905-1985, Historio de AEA". Kiel komisiito de AEA, estas mia plezuro raporti ke, antaŭ kelkaj semajnoj, mi finverkis la libron.

La kompostado fare de Carson Thomas per propra prilaborilo glate progresas: samtempe Trevor Steele finkontrolis la jam pretajn ĉapitrojn. Pri la libro-formato estas "kvarto", ĉ. 170 paĝoj. Oni atendas, ke la libro estos prespreta je la fino de aprilo, ĉi-jare.

Provizora preskosto por 300 ekzempleroj estas \$1400, presejo estas Brisbane Edukada Centro. Al tiu kosto oni devas aldoni sumon de proks. \$100 kiel rekompenson al Carson Thomas kontraŭ akceto de necesaj kompostmaterialoj kaj poŝtkostoj. Taŭgan kovrilon desegnis John Paroz: Internacia Norma Libro-Numero (ISBN) estas 0 9595336 6 4.

Pri "Somercernejo de AEA": Provizora mendo de loĝejo ĉe "Campus Conference Centre". Universitato de Nova Anglio, Armidale estas farita de la 5-a ĝis la 16-a de januaro, 1987.

Estas eble, ke negrandaj ŝanĝoj al klasaranĝoj okazos post la fakkunsido

de la kongreso, tamen estas certe, ke klasoj por preparado al Supera kaj Elementa ekzamenoj estos unu ĉefrolo de la SL.

SL-anoj partoprenos lanĉon de Jubilea Jaro dum la semajnfino la 10-11a de januaro, sed tiuj apartaj aranĝoj estos sub la gvidado de speciala komitato.

Sincerajn dankojn al Joan Green kaj Carson Thomas, kiuj denove en 1985 sukcesigis, per dediĉa laboro, la administran flankon de la SL. Ankaŭ al la instruistoj, Marjorie Duncan, Trevor Steele kaj Ralph Harry dankon! Fine dankon ankaŭ al Robi Robertson, kiu p'enraportis la aferojn de SL en "The Australian Esperantist".

—RAY ROSS, Komisiito.

Pro spacomanko necesis prokrasti pliajn

detalojn pri la kongreso, kiel ankaŭ la

"Aŭstralian Kronikon".



# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6012.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 231 (311)

MELBURNO

Marto, 1986

---

**25-a AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO, EN PERTO, 3-11 JAN., 1986**  
**Kongresa Temo: La Kontribuo de Esperanto al la Monda Paco.**

## Rezolucio

**La Aŭstralia Esperanto-Asocio,**

**Kunveninte** en Perto por sia 25-a Aŭstralia Kongreso, en la unuaj tagoj de la Jaro de Paco, proklamita de la Generala Asembleo de Unuigintaj Nacioj,

**Diskutinte** la temon "La Kontribuo de Esperanto al Monda Paco",

**Konstatas**, ke unu el la kaŭzoj de milito estas troa naciismo,

**Notas**, ke unu el la esencaj kondiĉoj por la starigo kaj konservado de paco long-daŭra estas multe pli bona interkompreniĝo inter homoj diverslingvaj,

**Deklaras**, ke la mondlingvo Esperanto jam elmontris sian kapablon kaj utilon kiel neŭtrala komuna lingvo en multkultura mondo, ne nur por rilatoj inter individuoj sed ankaŭ inter registaroj kaj ne-registaraj internaciaj organizaĵoj, super ĉio por neformalaj senperaj kontaktoj de individuoj, inklude inter ŝtatestroj,

**Deklaras ankaŭ**, ke en la atoma epoko, en kiu oni jam uzis nukleajn armilojn kaj kiam ekzistas grandegaj stokoj de tiaj armiloj, la mondo ne povas por ĉiam fidi al ekvilibro, kiu povus ŝanĝiĝi, kaj oni bezonas signifan pliigon de interkomunikado kaj kunlaborado, por kio la antaŭnelonga "montpinta" kunveno inter la ŝtatestroj de Sovetunio kaj Usono donas esperon, kaj

**Konsideras**, ke pli urĝa kaj intensa agado necesas je la nivelo individua, fare de registaroj kaj en internaciaj organizaĵoj.

## II

**La Asocio**

**Gratulas** la Aŭstralian Registaron pro ĝia decido starigi fakojn por paco kaj malarmado en la Departemento de Eksterlandaj Aferoj, dankas ĝin pro la eldono en Esperanto de la deklaro de la Ministro: "Atomoj por Paco", kaj sugestas, ke la Departemento uzu la Mondan Lingvon por aliaj eldonaĵoj kaj kuraĝigu iajn oficistojn — super ĉio tiuj, kiuj deĵoras ĉe internaciaj organizaĵoj — lerni Esperanton,

**Gratulas ĝin ankaŭ** pro ĝia helpo al la starigo, en la Aŭstralia Nacia Universitato, de Pacinstituto, kaj rekomendas, ke la Registaro petu de tiu Instituto studon de la rolo de lingvoj en la konservado de amikaj rilatoj, en intertraktado por solvi konfliktojn kaj problemojn, kaj en la formulado de traktatoj,

- Rekomendas**, ke la Registaro, en la plenumado de la nacia lingvopolitiko, sekve de la raporto de la Senata Komitato pri Edukado kaj la Artoj, inkludu Esperanton inter la lingvoj lernendaj aŭ lernindaj en la lernejoj, kaj stimulu reciprokajn vizitojn kaj kunestojn de junuloj eksternacie,
- Promesas** sian kunlaboradon en la plenumo de la Lingvo-Politiko kaj pretecon servi en konsila komitato,
- Rekomendas**, ke la Registraro subtenu uzadon de Esperanto en, kaj fare de internaciaj lernejoj, la Universitato de U.N. en Tokio, kaj la Pac-Universitato en Kostaroko,
- Rekomendas**, ke la Registaro agu en internacioj organizaĵoj kiaj la Universala Poŝtunio akcepti Esperanton kiel unu el la lingvoj uzendaj en internaciaj dokumentoj, kiaj pasportoj, internaciaj poŝtaj respondkuponoj kaj aliaj poŝtaj, internaciaj permesiloj por la kondukado de aŭtomobiloj, kaj atestiloj pri naskiĝo, geedziĝo, morto kaj similaj personaj statsanĝoj, kaj
- Rekomendas**, ke la Registaro petu UNICEF uzi sur siaj salutkartoj ankaŭ Esperanton.

## III

**La Kongreso**

- Notinte** la rezolucion de UNESKO de la 8-a de Novembro, 1985, en kiu la Generala Konferenco invitis ŝtatemprojn marki la 100-jaran Jubileon de Esperanto per — inter aliaj aferoj — enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado,
- Rekomendas** al la Aŭstralia Registaro, ke ĝi submetu al UNESKO, kune kun aliaj registaroj, proponon de scienca testo de Esperanto dum la Jubilea Jaro, 1987, ekzemple per kunigo en Svislando de studentoj el Sovetunio kaj Usono por studi la lingvon en situacio science kontrolata,
- Decidas** mem organizi, dum la Jaro de Paco kaj en la Jubilea Jaro, pli intensan programon de mesaĝoj inter organizaĵoj kaj individuoj, super ĉio junuloj, en aliaj landoj, kaj
- Petas** la daŭran intereson kaj financon subtenon de la Registaro en la plenumado de la supra programo.

**PLUE PRI LA KONGRESO**

S-ro Jack Hawks atentigis al ni, ke la L.K.K. fakte konsistis el ses personoj kaj inkludis, aldone al la Prezidanto, Sekretario kaj Kasisto, ankaŭ el Raffael Alvarez, John Harvey (Libro-servo) kaj Rene Smeets (SAT-Fakkunveno). Ĉiuj faris gravan kontribuon al la sukceso de la kongreso.

Ni ankaŭ deziras aldoni, ke estis f-ino Hertha Mueller, kiu ĉe la bankedo transdonis la "Fritz Mueller-Sorau Trofeon" al la venkinta horo.

—ooOoo—

Ancoraŭfoje Tom Elliott kaj liaj du helpantoj, edzino Mavis kaj John Harvey (Perto), plenumis la herkulan taskon malpaki multajn pezajn kestojn kaj alloge ekspozicii grandan stokon da libroj plej diversaj en la akceptejo. Ĉiam almenaŭ unu de ĵoris por vendi kaj akcepti mendojn kun la fina rekorda rezulto de \$1340.

—ooOoo—

Jaŭdon, la 9-an de januaro, 1986 kongresanoj akceptis inviton de Ges-roj De Souza por veni al ties hejmo por interamikiĝa vespero kun anoj de la Baha'i-

movado. Estis ĉefe nia malnova membro, F-ino Ottilie Stempel, kiu iniciatis tiun interesan kaj agrablan renkontigon.

Ĉeestis proks. 60 personoj, el kiuj 38 esperantistoj. Komence oni invitis Esperantistojn kaj Baha'i-anojn fari demandojn pri siaj diversaj movadoj. En bela ĝardeno ges-roj De Souza lukse regalas la ĉeestantojn. F-ino Stempel parolis pri la simileco de la ideoj de esperantistoj kaj Baha'i-anoj. Prezidanto M. LeFevre donacis al la Baha'i-anoj kasedon kaj libron de "Jen Nia Mondo". Baha'i-anoj reciprokis per du anglalingvaj libroj pri la Baha'i-religio. Vera Payne parolis en Esperanto kaj Baha'i-anoj petis, ke oni provizu instruiston por instrui Esperanton al infanoj. Shirley Gradussov akceptis tiun inviton.

—ooOoo—

Kiel kutime ĉe kongresoj okazis ankaŭ ĉi-foje fakkunveno de la **SAT-membroj**. Bill Clarke estris la kunvenon kaj diversaj ĉeestantoj parolis pri la nuna danĝera situacio en la mondo. Parolis la aŭstralia SAT-peranto, Volo Gueltling, s-ino D. Threlfall, Rene Smeets kaj Shirley Gradussov. Oni decidis eldoni,

de tempo al tempo, aŭstralian SAT-bultenon, por firmigi la rilatojn de membroj tra la vasta kontinento.

SAT-Peranto Volo Gueltling, 9/45 Alt St., Ashfield, NSW, 2131 akceptos membrokotojn. Kotizo estas \$32 (kiu inkludas monatan gazeton 'Sennaciulo'), Pensiuloj pagas nur \$24. La jarkajero "Sennacieca Revuo" kostas krome \$5.

### KIU FAROS KION?

Ĉe la kongreso en Perto oni elektis kvar funkciulojn por la A.E.A. — Estraro, kies agadkampoj estas tre similaj. Legantoj ŝatus scii la diferencon inter "Komisiito por Lernejoj" (S-ro Arthur Cocking) kaj "Komisiito por Instruistoj kaj Instruiloj" (S-ro Max Wearing). Krome estis ankaŭ elektitaj du "Konsilantoj por Klubaj Instruistoj". (S-inoj Vera Payne kaj Shirley Gradussov.)

Eble la kvar menciitaj funkciuloj povos klarigi al niaj legantoj kion ili faros dum la venontaj du jaroj.

### DU NOVAJ FRATULOJ DE A.E.A.

#### JOHN MOORE



Mia unua kontakto kun Esperanto venis antaŭ 24 jaroj, kiam, 50-jaraĝa, mi respondis al artikolo kaj reklamo de Heber Petley, fondinto de la Esperanto-Klubo de Rockhampton, en la "Rockhampton Morning Bulletin". (Li poste fondis klubojn en Maryborough, Brizbano, kaj Toowoomba.)

Ĝis tiam mi nur sciis — kiel multaj kredas eĉ nun — ke ĝis estas iama projekto por internacia lingvo, kiu versajne mortis. Imagu mian surprizon kiam mi konstatis kiel vige ĝi vivas kaj kreskas, en kiom da landoj!

Foje mi sentas bedaŭron, ke mi ne ĝin renkontis pli frue; sed efektive, ĝi venis ĝuste kiam mi havis, unuafoje en la vivo, la tempon, inklino kaj kapablon ĝin lerni, uzi, kaj ĝui.

Instruis min unue Heber Petley kaj Neil Russell. Poste, mi sekvis dum kelkaj jaroj la korespondan (tradukan) kurson

de Reg. Banham, dum mi instruis vesperajn klasojn ĉe "Adult Education" (poste nomita TAFE) en Rockhampton.

Kiam "Tajni" Goldsmith iniciatis la Korespond-Kursan Servon en Aŭstralio, mi iĝis kursgvidanto; kaj poste transprenis la respondecon (pri tio jam aperis artikolo en "A.E.").

Estas al mi tuta surprizo nun iĝi Fratulo de AEA. Mi dankas tutkore kaj penos meriti la honoron.

— JOHN MOORE.

#### TOM ELLIOTT



Tom Elliott esperantigis en 1962 kaj baldaŭ fariĝis valora membro de la Sidneja Esperanto-Societo kaj de A.E.A.

En 1971 li akceptis la taskon prizorgi la libroservon de la Asocio. Antaŭaj libroperantoj de AEA deĵoris dum periodoj de 2-3

jaroj, sed Tom, spite al sia sanstato, daŭre kaj modele administras la servon post 15 jaroj.

Li ne nur "administris" sed sistemigis ĝin, kaj per la uzo de komputilo modernigis la servon, ĝis ĝi fariĝis modelo por kiu ajn landa asocio. La profitoj de la Servo ebligis la akiron de granda kaj varia stoko de libroj, diskoj ktp.

Samtempe Tom kunlaboris kun la Federacio de Nova Sud-Kimrio, kies organon "Telopeo" li presis kaj ekspedis. Li ankaŭ kunlaboris kun la Komisiito de la Koresponda Servo por certigi represon de lernolibroj kaj informiloj, kiaj "Esperanto por Komencantoj" kaj "Esperanto en Aŭstralio". Li redaktis kaj presis katalogojn por la Libro-Servo kaj la adresarojn de la Asocio.

Kiam AEA deziris eldoni "Sur la Bordo"-n, Tom tajpis ĝin en la komputilon, ankaŭ korektojn kaj prizorgis la preson.

En la kongresoj de AEA, Tom kun sia helpema edzino Mavis, ĉiam sindoneme dediĉas multajn horojn al la prizoreo de la libro-stando, kiu servas ankaŭ kiel ekspozicio por eminentuloj ĉe la inaŭguro kaj por vizitantoj al la Kongreso. En la pasintaj kelkaj jaroj, Tom komencis novan agadon per sia televidkamero. Multaj homoj vidis, la unuan

fojn, kio okazas en AEA-Kongresoj, dank' al la televidbendoj, kiujn Tom disponigis.

La Fratuloj unuane proponis, kaj la Estraro unuvoĉe decidis, ke TOM ELLIOTT fariĝu Fratu'o de la Aŭstralia Esperanto-Asocio.

## ĜOJPLENA POST-KONGRESO

Ni apenaŭ komencis vojaĝi el Perto al la sud-okcidenta angulo de tiu Ŝtato, ol iĝis evidente, ke la frateco de la Pertanoj ankoraŭ restis ĉe ni. Kiam nia aŭtobuso atingis pli ol 15 km for de Perto, nia grupestro, Jack Hawks, kalkulis, ke mankas al ni, unu pasaĝero. Nia afabla ŝoforo, Vilĉjo, tuj informis, ke ni reiru por ekpreni tiun pasaĝeron. Tiu sinteno estis la kutima etoso, kiun la dudek partoprenintoj ĝuis, dum la tuta 4-taga vojaĝo. Ni eltrovis, ke la frateco kaj ĝentileco de la okcidentanoj estas preter nia imago, ĉie.

La vojaĝo estis sperte planita de Jack Hawks, kiu antaŭe traveturis la vojon, por gajni necesan informon kaj fari aranĝojn. La busa kompanio, "Skyways" provis al ni komfortan aŭtobuson, kun kompetenta ŝoforo, kiu estis ne nur informita, sed sprita kaj ĉiam helpema — ĉiuj el la ingrediencoj necesaj por komforta, ĝuinda veturado. Aldone al tio, la grupo mem konsistis plejparte el fluaj Esperantistoj, kiuj preskaŭ ĉiam babiladis esperante. Ege populara en la grupo estis Owen Loneragan, kiu estas eksa profesia arbaristo en tiu regiono — li afable provis gravan informon al la multaj pridemandoj, kiujn li ricevis.

Kun la supra fono, ni daŭrigis foren! De St. Katerina Kolegio, ni veturis tra la interesplenaj kaj historioplennaj urboj kaj urbetoj Pinjarra, Mandurah, Bunbury (nia unua tranokto), Busselton, Aŭgusta, Nannup, Balingup ("up" signifas "akvo"), Yallinup, Manjimup (nia dua tranokto), Pemberton, Walpole, Denmark, Albany (tria tranokto), Katanning, Wagin, Narrogin ĝis denove, Crawley.

Menciindas kelkaj el la memorindaĵoj (a fotografilo ofte klaketis!): Spektaklaj vidindaĵoj de la Hinda kaj Suda Oceanoj.

Multaj belaj riveroj, nome Murray, Harvey, Margaret, Blackwood, k.t.p. Abundaj belaj sovaĝaj floroj, arboj, arboj kaj plantejoj.

Ege imponaj Gloucester kaj aliaj gigantaj arboj, kiuj atingis ĝis 200

futojn kun siaj kabanobservejoj je la pintoj (uzitaj antaŭe kiel observejoj por fajrkontrolo). Tiuj kabanaj estas atingeblaj pere de ŝtuparoj faritaj el lignaj stangoj, fiksitaj en la arbtrunko. "Bunbury" haveno kaj lumturo/"Cape Naturliste"-lumluro.

Belaj strandoj, rokoj kaj kavernoj de Yallinup.

La malplej granda preĝejo de Aŭstralio — en Aŭstralind.

La plej aĝa ŝtonpreĝejo en Okc Aŭs. — en Busselton.

La 2-km-longa "Vasse"-Ĝeto — en Busselton — la plej longa en la sud-hemisfero.

La "Cape Leeuwin"-lumluro, kaj la signo de kunligo de la Hinda kaj Suda Oceanoj.

La belaj maroj, strandoj, rokoj de Albany (similas al Rio!) kun siaj historiaj balenstacio, stacidomo, poŝto-ficejo, kajo kaj velsiprepliko "Amity" kaj aliaj antikvaj vidindaĵoj. Menciindas, ke je la dispo de la vizitantoj al Albany estas ege granda spektaklo de la pintoj de la Mt. Clarence kaj "John Parnesby" — observejoj, de la urbo mem kaj ege belaj ĉirkaŭaĵoj.

Finfine, la grandaj, vastaj, riĉaj tritik-kampoj inter Albany kaj Perto enlande, kun disaj urboj kaj urbetoj lokitaj survoje.

Tiu vojaĝo vere estis neforgesebla kvartaea travivaĵo por tiuj, kiuj partoprenis ĝin. —LES SCOTT.

## NOV-ZELANDA KONGRESO

La 51-a Nov-Zelanda Kongreso okazis en Palmerston North, de la 3-a ĝis 7-a de januaro, 1986. Nur 45 esperantistoj ĉeestis, sed inter ili estis 3 eksterlandanoj. S-ro Trevor de Cleene, la loka parlamentano, oficiale malfermis la kongreson, sed ŝajne li estis tre skeptika pri la estonteco de Esperanto kaj ne multe kuraĝigis la ĉeestantojn.

Prof. John Adcock, antaŭa prezidanto, prelegis pri la kongrestemo "La Internacia Jaro de Paco". Ne okazis dramokonkurso, sed ges-roj Wood (Auckland) prezentis du teatraĵojn kaj s-ino Irina Lock (el Bristol, Anglio) majstre prezentis monologon pri tri solecaj virinoj. Ŝia edzo Norman kaj s-ro Joe Major prezentis interesajn lingvajn sesiojn.

Alia eksterlanda preleganto estis la dana poeto Poul Thorsen, kiu parolis pri vojaĝoj en Eŭropo kaj pri Don Quihoto de Cervantes. Li ankaŭ pre-

zantis originalajn kanzonojn en Esperanto.

Elektigis en la novan Estraron: D-ro D. E. Rogers (Prezidanto), E. R. Dearnley (Vic-Prezidanto), V. R. Moore (Sekretario), F. A. Adams (Help-Sekretario), S-ino M. Richardson (Kasisto) kaj f-ino S. May kaj S-ro D. Ryan (Estraranoj). S-ro Josefo Major estis elektita "Honora Fratulo de la N.Z. E-Asocio".

La esperantistoj de Masterton invitis la 52-an kongreson, kiu komenciĝos ĉ. la 9-a de jan., 1987.

(Laŭ raportoj de Don Rogers kaj Joe Major.)

### LETERO AL LA REDAKCIO

—Sinjoro:— Mi partoprenis en la Perta Kongreso kaj ĝuis ĝin tre multe. Ĉiuj, kiuj organizis kaj gvidis la Kongreson meritas niajn gratulojn kaj dancojn pro tasko bone farita.

Tamen estis nur unu malperfektaĵo: Kelkaj paroladoj estis tro longaj. Kapitula aŭdantaro inklina dormi se ĝi estas tro ĝentila por foriri! Mi opinias, ke estus necese havi sonorilon por tempomezuri la parolantojn ĉe tiaj okazoj. Sincere, Kay Howe, Yeppoon, Kvinlando.

### AŬSTRALIA ANTOLOGIO

El la listo de la aŭtoroj kaj pecoj elektitaj por nia "Aŭstralia Antologio", mi ankoraŭ ne ricevis la jenajn:

Richardson: el romano "The Fortunes of Richard Mahoney".

Bean: eseo "The Red Country" (el "On the Wool Track") — aŭ peco el lia historio de la Unua Mondmilito.

Esson: el dramo "The Sacred Place" — aŭ "Dead Timber and Other Plays".

Boyd: el romano "Lucinda Brayford".

Palmer: rakonto "Tobacco".

Dark: el romano "The Timeless Land".

Stead: el romano "Seven Poor Men of Sydney".

H. Drake-Erockman: rakonto el "Sydney or the Bush".

Herbert: el romano "Capricornia" aŭ "Poor Fellow My Country".

Porter: "The Followers".

Stevens: rakonto "The Pepper Tree".

Tennant: el romano "Ride On Stranger".

Dobson: poemo "Cock Crow" aŭ "Jack".

Thiele: rakonto el "Sun on the Stubble".

Walker: rakonto "Kill to Eat".

Moorehouse: rakonto el "The Electrical Experience".

Hibberd: el dramo "A Toast to Melba". Tradicia kanto: "Click Go the Shears".

Spertulo pri la aŭstralia literaturo ĉe la Aŭstralia Nacia Universitato en Kanbero sugestis, kvankam alirilate kontenta pri nia elekto, ke ni inkludu pecon el la dramoj de David Williamson — mi sugestas "The Removalist" aŭ "Don's Party" — kaj poemon de Les Murray: "An Absolutely Ordinary Rainbow" aŭ unu el la kantociklo "Buladelah-Taree", kaj tiun sugeston via Prezidanto Ralph Harry kaj mi akceptis.

Tradukontoj bonvolu informi ĉe mi, antaŭ ol komenci, ĉu iu alia jam enterprenis la tradukon de la concerna peco.

Por aliaj kondiĉoj oni vidu paĝon 296 de "The Australian Esperantist", decembro, 1984.

— ALAN TOWSEY  
(Komisiito por la Antologio)



• **PERTO:** La membroj kunvenis je la 2-a de februaro kaj elektis tute novan estraron. Prezidanto nun estas Shirley Gradussov, Vic-Prezidanto John Harvey kaj Raffael Alvarez. Sekretario estas Bill Clarke kaj Kay McCashney zorgas pri la financoj. David Poulson prizorgas la informadon kaj John Harvey la Libro-Servon. Redaktoro de la "Nigra Cigno" restas Donald Broadribb kaj Presisto estas Chris Dean. Se iu deziras kontakti la sekretariojn, la adreso de Bill Clarke estas 6 Leura St., Nedlands, 6009.

La Ligo honoris sian ekskasis'on, Owen Loneragan, per Dumviva Membreco. Dum pasintaj jaroj la Ligo kunvenis nur dufoje monate, sed nun ni kunvenas ĉiumerkrede, je la 7.30 p.m. en la "Nedlands College of Advanced Education". Okazas klasoj por komencantoj kaj por progresantoj, kiujn sekvas la grup-vespero.

• **ADELAJDO:** La Sud-Aŭstralia E-Societo kunvenis por la Zamenhofa Vespero je la 7-a de decembro, 1985. Nia nova prezidanto, S-ro Peter Ellyard, faris la festparoladon. Li ankaŭ proponis, ke ni nenu enkonduki Esperanton en la "SBS-Televidon".

Tri el niaj membroj ĉestis la kongreson en Perto kaj revenis kun granda entuziasmo. S-ino Thea v.d. Boogaard bonvole proponis sian domon por niaj kunvenoj. Ni regule kunvenas ĉiun 2-an, 3-an kaj 4-an mardon en ŝia domo kaj krome ĉiun 2-an lundon ni kunvenas en la ejo de la Kvakeroj.

— LLOYD H. NOBLE.

◦ **MELBURNO:** La Melburna E-Societo komencis sian 1986-an klubaron per du tre sukcesaj vesperoj. Je la 3-a de februaro du nederlandaninoj, s-inoj J. Flach kaj J. Den Hartog, vizitis nin. Ili priskribis sian hejmurbon, Rotterdam, kaj la E-klubon de kiu ili estas membroj kaj rakontis kiel ili esperantistiĝis. Poste, s-ino Flach per klarneto kaj s-ino Den Hartog ĉe la piano muzikis por distri nin.

Du semajnojn poste ni povis bonvenigi ges-rojn Norman kaj Irena Lock el Bristol (Anglio). Ili estis survoje hejmen post partopreno en la Nov-Zelanda E-Kongreso. Ili rakontis pri Bristol kaj la kluba vivo tie. Alia gasto estis jugoslava kuracisto, D-ro Dvoračko, el Subotica, kiu rakontis pri la jugoslava E-movado. Li estis ankaŭ bonega pianisto kaj ludis du hungarajn amkantojn kaj fine respondi al demandoj rilate al profesiaj kondiĉoj en sia lando.

◦ **KANBERO:** La Zamenhof-Festo okazis je la 16-a de decembro, 1985, en la "Migrant Resource Centre". Dudek naŭ personoj partoprenis. Post bonvenigo fare de la Prezidanto, Willie Firth deklamis "La Vojon". S-ro Ralph Harry paroladis pri "Zamenhof — Homo de Paco" kaj Peter Munibi prelegis pri Lydia Zamenhof. Harry Torr rakontis pri la frua historio de la Klubo. Marj Ellyard kaj Ralph Harry ludis unaktan dramon "Vivo kun Olivia". Vespermanĝeto konkludis agrablan kunvenon.

Ni bonvenigis membrojn de la loka Baha'i Grupo, kiu donacis al nia biblioteko ekzempleron de la libro "Lydia".

Willie Firth daŭrigas siajn ekspoziciejojn en la "Mediag Foirjoj". Li ankaŭ verkis por "Woroni", la ĵurnalo de studentoj en la Aŭstralia Nacia Universitato, tutpaĝan artikolon "Esperanto — the Created World Language". Jam 3 studentoj, el kiuj du lernis iom da Esperanto per libroj, anoncis sin por studgrupo.

• **SIDNEJO:** Je 3-a de februaro ni diskutis diversajn aspektojn de la Perta Kongreso. Tiuj, kiuj ne ĉestis, povis vidi, dank' al la "Video-filmo" de Tom Elliott, multajn interesajn vidaĵojn.

Semajnon poste okazis la Jarkunveno. La nova Estraro estas: Prezidanto — D. Gould; Vic-Prezidantoj — S. Burkitt kaj T. Elliott Sekretario: M. Chaldecott; Kasisto D. Gould. Malgraŭ nemultaj anoj, la klubo havas bonan financon stacion.

Je 17/2 M. Chaldecott raportis pri tutmonda enketo de japana grupo pri la edziĝfestoj de la mondo. Interesaj estis la kostoj en kelkaj landoj, kiam oni pripensas la monatan salajron de la geedzoj.

Je 24/2 ni legis el eksterlandaj gazetoj. Inter diversaj temoj estis artikolo pri aŭtomobiloj. (La centjarfesto de la unua aŭtomobilo nun okazas.)

Je 10-a de marto M. Chaldecott parolis pri aziaj vortoj, kiujn oni trovas en Esperanto. Kelkaj venis rekte el Azio, aliaj laŭ europaj lingvoj, kiuj jam uzas ilin.

— M. CHALDECOTT.

• **MANLY:** La 8-an de decembro okazis en la hejmo de Marjorie Duncan la 25-a Kristnaska Festo de la Manly Klubo. Post bongusta lunĉo la ĉeestantoj babilis kaj kantis ĝoj-kantojn. Sekvis aferkunveno por plani agadon en 1986. Ĉeestis entute 45 Esperantistoj kaj geamikoj. La 14-an de decembro ni partoprenis la Zamenhof-vesperon en la Esperanto-Domo en Sidnejo.

La 26-an de januaro, post reveno de multaj anoj, kiuj ĉeestis ĝindan kongreson en Perto, okazis jarkunveno en la hejmo de Marjorie Duncan. Estis elektitaj: Prezidanto — Robby Robertson; Vic-Prezidantoj: Eunice Graham kaj Arthur Cocking; Sekretario: Betty Cleminson; Kasisto: Frank Mangan; Libro-Agento: Helen Stone kaj Marjorie Duncan por aranĝoj de programoj.

La unua trimestro jam komenciĝis en la Eduka Centro kaj je la 1-a dimanĉo ĉiumonate Kevin Smith gvidas Biblian Rondon en sia hejmo. Nia klubo nun preparas sian 25-an datrevenon je vendredo, la 6-a de junio, en la "Manly Pacific International Hotel".

— EUNICE GRAHAM.

• **BRISBANO:** Anoj kunvenis je 3-a de februaro por aranĝi klasojn por 1986. Trevor Steele kaj Arthur Deutscher

(Southport) raportis pri plensukcesa seminario, kiun lokaj Baha'ianoj okazigis en halo en la Universitato de Kvinlando, la 26-an de januaro. Forpasis la 26-an de januaro, malnova, fervora ano de BES, F-ino Agnes Curtis (vidu Nekrologon). Nome de Kvinlandanoj mi deziras danki al anoj de E-Ligo de Okc. Aŭstralio pro la sukcesa kaj tre ĝuinda Kongreso en Perto.

— RAY ROSS.

• **ST. LUCIA:** Oficistoj elektigis ĉe jarkunveno, kiu okazis la 27-an de nov., 1985: Prez: Annie Spencer; Vic-Prez: Sybil Martin; Sekretario: Ruth Philp (17 Jevons St., The Gap, 4061); Kasisto: Bernice Patterson; Libroperanto: Winsome Greenhalgh. Komitatanoj: Mary Stevensen; Ruth Morrison, Betty Henderson, June Cullen, Ruth Mason, Decia Shonham.

La grupo kunvenas ĉiumerkrede en la domo de Winsome Greenhalgh.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** Kay Howe revenis de la Perta Kongreso, kiun ŝi tre ĝuis, aparte pro la amika sinteno de la esperantistoj tie. Ŝi ĝoje raportis al nia unua kunveno, 1/2/86, ĉe la hejmo de Merle Packham.

Post apero de gazetartikolo de Merle pri Augsburg, ni gajnis novan lernantinton, kiu studas korespondkurse. Joyce Turner de Rockhampton, kiu pro operacio ne povis ĉeesti la Kongreson, nun feliĉe bone resaniĝis.

— JOHN MOORE.

## ORANGE RAPORTAS

Japano, Majstro Masahisa Goi starigis antaŭ 30 jaroj organizon "Societo de Preĝado por Mondpaco" kaj liaj sekvantoj rekomendas publikan preĝadon por paco. Specialaj preĝesioj okazas en Japanio, ĉe la bazo de Monto Fuji kaj miloj el multaj landoj venas kaj preĝas kune.

La "Societo de Preĝado por Mondpaco" ankaŭ distribuas "pac-stangojn" senkoste kaj intencas instali ilin ĉie en la mondo; la celo estas servi kiel konstanta memorigilo pri la graveco de mondopaco.

En Orange komitato fondiĝis por la Internacia Jaro de Paco kaj tiu komi-

tato instalas pacstangon en nia bela parko "Cook". La kvadrata alumina pacstango estas 10 centimetrojn larĝa kaj 2 metrojn alta. Sur ĉiu flanko de la pacstango estas skribita la mesaĝo "Paco regu sur la mondo" en 4 diversaj lingvoj.

La adreso de la Societo estas: "Society of Prayer for World Peace", 5-26-27 Nakakokubun Ichikava, CHIBA 272, Japan.

Aperis lastatempe bona artikolo pri Esperanto en loka gazeto kun indiko, ke kurso okazas en Orange. La loka Radio-Studio 2 CR aranĝis kun mi bonan intervjuon. — MAGDALENA ROZSA.

## NEKROLOGO

Forpasis la 26-an de jan., 1986, F-ino AGNES CURTIS, el Tambourine, Kvinlando. Ŝi estis ano de la Brisbane Societo 1938-1969, ano de la Federacio de Kvinlando, 1970-1985. Ĉar ŝi loĝis en la kamparo ŝi ne povis partopreni klubaferojn, krom Zamenhof-Festojn. Ŝia nomo aperas sur ĉiuj listoj de kongres-aligintoj de 1950 ĝis 1984 kaj ĝis kiam sanstato ne plu permesis, ŝi ĉeestis AEA-Kongresojn.

Ŝi donacis al la Kvinlanda E-Muzeo plurajn historiajn fotojn kaj pro tio ŝia nomo restos en la analoj de Esperanto en Kvinlando kaj en Aŭstralio. Nia samideanino forpasis sen jurnal-anonco, sed restos al ni sentoj de amikeco pri vera Sinjorino. — RAY ROSS.

• **NOVA ESTRARANO:** La E-Federacio de NSK nomis S-inon Sylvia Burkitt kiel membron de la AEA-Estrarano. N.S.K.-membroj, kiuj deziras informojn aŭ kiuj deziras prezenti vidpunkton al la Estraro kontaktu ŝin, sed oni sendu aligojn aŭ kotizojn senpere al la sekretario (Marj Ellyard) aŭ al la kasisto (Owen Loneragan) laŭ kazo. S-ino Burkitt restas Ĉefdelegito de UEA kaj respondecas pri kotizoj, proponoj pri delegitecoj kaj adres-ŝanĝoj.

## PETO AL ABONANTOJ DE LA BRITA ESPERANTISTO

Mi preparas anglalingvan tekston pri la vivo kaj verkoj de Kalman Kalocsay en la espero, ke ĝin disaŭdigos la ABC-sendaĵo "The Poet's Tongue". D-ino Kathleen Hall el Southampton jam publikigis anglajn tradukojn de iuj poemoj

de Kaloscaj en **La Brita Esperantisto**, kiun mi ne abonas. La tradukoj troviĝas jene:

1976 p. 174; 1977 pp. 88-9; 1979 p. 294; 1981 p. 73; 1983 pp. 261 kaj 269.

Ĉu iu bonkorul(in)o povus aŭ prunti al mi la koncernajn numerojn de BE aŭ sendi fotokopiojn de tiuj paĝoj? Anticipe dankas. — **TREVOR STEELE**.

### PETO AL GASTIGEMULOJ

Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia, la administrantoj de "Bona Espero" (la esperantista komunumo en Brazilio), planas viziti Aŭstralajn survoje al la UK en Pekino. Ili probable komencos en Brisbano, sed volas vidi aliajn lokojn, restante ne pli ol tri tagojn en iu loko ("... ni konas la historion de la fiŝo"). Ĉu plaĉus al samideanoj en aliaj urboj gastigi tiujn tre interesajn homojn kaj elstarajn esperantistojn dum tiuj tagoj?

Se jes, ili kontaktu min ĉe

7 O'Callaghan Street,  
HOLLAND PARK 4121 Q.  
Anticipan dankon de  
Trevor Steele.

### Geonkloj esperantistaj

Ni deziras rekomendi al aŭstraliaj esperantistoj organizon, kiu helpas junajn esperantistojn — Geonkloj Esperantis'aj. Plenkreskuoj el la tuta mondo estas bezonataj por korespondi kun junaj esperantistoj por kuragi la lernadon kaj uzadon de Esperanto. La tasko ne estas ŝarĝa, tri aŭ kvar mallongaj leteroj (aŭ poŝtkartoj) jare, tenos la intereson de la gejunuloj pri Esperanto.

La adreso de la administranto estas: **S-ro W. H. Simcock, Clayton House, Butterson, Leek, Staffs., Britujo, ST 13 7 SR** Se vi deziras pli da informoj de aŭstralia kunlaboranto, kontaktu (Onklinon) Kay Andersen, 19 Sherley St., Moorooka, Queensland 4105.

### Aŭstralia Skolta E-Ligo

Aŭstralia Skolta E-Ligo (filio de SEL) faras progreson. Peranto, S-ino Jennifer Dimo, kiu estras la grupon de junskoltoj ĉe Gatton, raportas, ke la tutan jarinterizon el la 1985-a heredaĵo (\$2000) oni elspezis por reklamado pri Esperanto en "Australian Scouts" kaj "Australian Girl Guides". Estas dek eldonoj jare kaj artikoloj pri Esperanto estas

akceptitaj; reklamaĵoj havas grandecon de okon-paĝo kun dek ekzempleroj ĉiujare. Ses novaj anoj aliĝis al la Aŭstralia Filio de SEL dum la lastaj du monatoj. — **RAY ROSS**.

## RECENZOJ

• **Dek Ses Urboj de Ĉinio**, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. Distribuata de Internacia Libro-komerca Kompanio de Ĉinio, P.O. Kesto 315, Beijing, Ĉinio. 176 p. kun fotoj, multaj en plena koloro. Bonega gvidlibro por vizitantoj. La urboj inkludas Pekinon, Ŝanhajon kaj ankaŭ Kantonon.

• **Mapo de la Ĉina Popola Respubliko**, Pekino, Kartografia Eldonejo. Dum la akademianoj diskutas la geografiajn nomojn, la Ĉina Kartografia Eldonejo esperantigis sian detalan mapon, kompreneble laŭ la politika vidpunkto de la Ĉina Popola Respubliko, ekzemple pri Koreio, Tajvano kaj la insuloj en la suda Ĉina Maro. Por aliaj najbaraj landoj ĝi uzas la "io"-finaĵon por Japanio, Hindio kaj Afganio, kaj Vjetnamio, kaj ankaŭ kompreneble por Malajzio kaj Indonezio. Inter la ĉefurboj rimarkindas Pekino, kaj Dako (Banladeŝo). Aparte de la lingvaj punktoj la mapo estos utila por vojaĝantoj al Ĉinio. Grandeco 67cm x 45cm. (R.L.H.)

ooOoo

—Sinjorino, via edzo bezonas nepre trankvilon — diras la kuracisto.

—Mi do preskribas trankviligaĵajn tablojdojn, jen!

—Kaj kiom da ili li devas preni, Sinjoro Doktoro?

—Vi eraras, Sinjorino. Ne por via edzo mi rekomendas la tablojdojn, sed por vi . . .

ooOoo

—Estas ture, Rozinjo, kiel mia edzo malobservas la etiketon. Ankaŭ ĉe la vesnermanĝo li trifoje oscedis, eĉ ne haŭsis sian buŝon.

—Sed kara Elinjo, eble ankaŭ li volis ion diri, ĉu?

(Hung. Vivo)



# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6012.

**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 232 (312)

MELBURNO

Aprilo-Majo, 1986

---

## THE UNESCO RESOLUTION

In December, 1985, The Australian Esperantist published the important news that the UNESCO General Conference had adopted a resolution inviting member states to mark the centenary of Esperanto. We included a text, in Esperanto, of the **draft** of the resolution. We have now obtained the official English text of the resolution, adopted on 8 November, 1985. As members will no doubt wish to refer to the UNESCO invitation in preparing the Jubilee activities in Australia, and to quote its precise words, we give below the full text in English. Its reference number in UNESCO records is 11.11.



R. L. HARRY,  
A.C., C.B.E.

### Celebration of the centenary of Esperanto

#### The General Conference,

**Considering** that the General Conference at its 1954 session in Montevideo, by its resolution IV.1.4.422-4224, took note of the results attained by the international language Esperanto in the field of international intellectual exchange and mutual understanding among the peoples of the world, and recognized that those results corresponded with the aims and ideals of Unesco,

**Recalling** that Esperanto has in the meantime made considerable progress as a means for the advancement of mutual understanding among peoples and cultures of different countries, penetrating most regions of the world and most human activities,

**Recognizing** the great potential of Esperanto for international understanding and communication among peoples of different nationalities,

**Noting** the considerable contribution of the Esperanto movement, and especially of the Universal Esperanto Association, to the spreading of information about the activities of Unesco, as well as its participation in those activities,


---

**Aware** of the fact that in 1987 Esperanto celebrates its centenary of existence,

1. **Congratulates** the Esperanto movement on its centenary;
2. **Requests** the Director-General to continue following with attention the development of Esperanto as a means for better understanding among different nations and cultures;
3. **Invites** the Member States to mark the centenary of Esperanto by suitable arrangements, declarations, issuing of special postage stamps, etc., and to promote the introduction of a study programme on the language problem and Esperanto in their schools and higher educational institutions;
4. **Recommends** that international non-governmental organizations join in celebrating the centenary of Esperanto and consider the possibility of the use of Esperanto as a means for the spreading of all kinds of information among their members, including information on the work of Unesco.

The resolution has already been brought to the attention of the Australian Minister for Education and the Minister for Foreign Affairs. All State and local Esperanto organisations in Australia are urged to send a copy of this issue to the State Government, and to non-governmental organisations with which they have contacts, requesting them to mark the centenary of Esperanto, as invited by Unesco. The resolution will then be a useful introduction to requests for help, or invitations to participate in centenary activities.

—R. L. HARRY.



### SAT ne rajtas kongresi en Pollando

En julio 1983 SAT ricevis leteron de Pola E-Asocio per kiu ĝi invitis SAT kongresi en Pollando en 1987. Tiun inviton SAT akceptis kun kontento.

La 24-an de februaro, 1986, la Plenum-Komitato de SAT ricevis (preskaŭ 3 jarojn poste) novan leteron kiu klare indikas ke **PEA ne plu subtenas** la projekton kongresi en Polio. Tiu situacio provokas damaĝon ne nur al SAT sed ankaŭ al la tuta Esperanto-movado. Do ni ne povas resti silentaj kaj alvokas la tutan esperantistaron protesti al PEA kontraŭ tiu diskriminado, kaj ni forte esperas, ke vi estos solidaraj kun nia organizo.

Ni sendas tiun alvokon al la tuta esperantista gazetaro, kaj ni senpacience atendas vian respondon.

Kun niaj sennaciecaj kaj esperantistaj sentoj,

por la Plenum-Komitato de SAT  
K. Barkovič (ĝenerala sekretario)

### ESPERANTO EN LA SOVET-UNIO

Novajo el la Sovet-Unio pri Esperanto-agado tie estas rara. Tamen atingis nin lastatempe la jenaj:

La ĵurnalo "Pravda" estas sendube la plej grava en Sovetio. Ĝi havas ĉiutagan eldonkvanton de proksimume dudek milionoj da ekzempleroj. Estas ĝojige aŭdi, ke unuan fojon dum jardekoj ĝi publikigis artikolon pri nia movado en sia eldono de la 19-a de aŭgusto, 1985, sub la rubriko "Kalejdoskopo":

"Dek milionoj da homoj el 103 landoj uzas la lingvon Esperanto, kiu estas kreita antaŭ ĉirkaŭ 100 jaroj de la pola okulisto Ludwig Zamenhof, nomita laŭ lia pseŭdonimo "homo, kiu esperas". Tiuj faktoj estas ricevitaj dum la 70-a Tutmonda Kongreso en kadroj de Universala Esperanto-Asocio, kiu okazis en Augsburg (FRG)".

En malproksima Mezzazio, entuziasmoj, ges-anoj S. Smetanina, L. Cistova kaj Eŭgeno Perevertajlo sukcesis publikigi Esperanto-novajojn en gravaj lokaj ĵurnaloj en Taškent, Uzbekio kaj Siberio. Temis ĉefe pri informoj pri la Unua Mezazia Esperanto-Tendaro, kiu okazis en Taĝikio, organizita de taĝikiaj esperantistoj. Partoprenis en la tendaro 120 esperantistoj el Meza Azio, kune kun gastoj el Estonio, Latvio, Litovio kaj eŭropa Rusio. Okazis perfektigaj kursoj, traduk-ekzercoj, ekskursoj kaj koncertoj. Oni ĝojis bonvenigi esperantistojn el varmega Turkmenio, kie antaŭ multaj jaroj

instruis la fama (blinda) esperantisto Vasiliĝ Eroŝenko.

### Ni estu prudentaj

Estas tempo por solvi la problemon de landnomoj. Ni nun havas kvar sistemojn: Anglujo, Ĉinio, Pollando, Kubo. La lasta, Kubo, estas aparte konfuza, ĉar oni unue pensas, ke temas pri homo, ne lando, same kiel Ang'lo, Ĉino.

Mi sugestas, ke la E-movado ordigu la sistemon de landnomoj kaj landloĝantoj. Ni devas ignori la kialojn kiuj kaŭziĝis la nunan haoson kaj uzi nur unu metodon, ne kvar.

Mi proponas, ke ni decidu pri la radiko de la landnomo, ekzemple: Angl-, Ĉin-, Pol-, Kub-, kaj uzu la sufikson "io". Tiel ni havos: Anglio, Ĉinio, Polio, Kubio, ktp.

La nomoj por la landloĝantoj ankaŭ povas esti regulaj. Ni aldonu la sufikson ANO al la landradiko: Anglano, Ĉinano, Polano, Kubano. Mi ne povas vidi problemon.

Ŝajnas al mi, ke la Akademio neniam solvos la problemon. Ĝi ne decidis en la pasinteco kaj ni ankoraŭ havas haoson. Ni devas uzi unu logikan sistemon, kiu ne havas escepton. Mi intencas uzi la supran sistemon, krom se iu povas montri al mi, ke ĝi ne estas pli bona ol la nuna faoso. Mi konsilas, ke ĉiuj esperantistoj faru same.

—BILL CLARKE, Perto.

### Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

La Akademio vokas ĉiujn Esperantistojn doni sian tutan atenton al la jenaj:

#### Rekomendoj pri la Landnomoj

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŝiga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.
2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15a Regulo de la Fundamento.

3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landanoj ĉiam estas principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekzemple: Angl-ujo/-io — Angloj kaj en la alia kategorio Nederland-o — Nederland-anoj.

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io, -istano . . .), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

## "KONSULTU LA KONSILANTON"

"Malantaŭ ĉiu sukcesa viro staras bona virino." Ĉu vi konsentas? "Amo ĉiame".

Kara "Amo": Malantaŭ ĉiu sukcesa viro? Mi certe NE konsentas. La plejparto? Mi dubas. Kelkaj? Jes, ja.

Kelkaj viroj iĝas eminentaj ĉar ili havas edzinojn aŭ amikinojn, kiuj estas ambiciaj. Tiaj sinjorinoj uzus iun ajn strategion (honestan aŭ malhoneston), iun ajn povon por certigi ke iliaj viroj iĝas eminentuloj. Kelkaj edzinoj havas fidon pri la kapablo de la edzoj kaj inspiras memfidon al ili.

Aliaj viroj plialtiĝas ĉar ili iĝas virinoj dubas la kapablon de la edzpartnero. Ili devas pruvi al siaj virinoj kaj al la mondo kiel kapablaj ili estas, do ili strebas atingi la pinton.

Kelkaj povus eminentiĝi ĉar ili estas feliĉaj edzoj. Aliaj, ĉar ili estas malfeliĉaj neniuloj en la hejmo, do devas iĝi iuloj en la ekstera mondo. La hejmo estas malamika teritorio, do ili pasigas pli kaj pli da tempo ĉe la laborejo. Multaj sukcesuloj povas diri: "Mi ŝuldas ĉion al mia edzino. Se ŝi ne estus tiel malagrabla, mi restus neniulo."

Ni selektu ekzemplojn: Bob Hawke kaj Mal Frazer memevente havas lojalajn edzinojn. Neville Wran kaj Andrew Peacock disigis de siaj unuaj edzinoj. La edzino de "Honesto Abe Lincoln" estis mensmalsana. La edzino de John Wesley laŭte riproĉis lin dum li predikis. Mankas pruvo pri bona virino malantaŭ

Sankta Paŭlo. Elizabeth Macarthur estis gemo. Sinjorino James Cook lojale atendis lin jaron post jaro.

Cu ni povas formuli ĝeneralan regulon? Mi konsultis kelkajn historiistojn. Ili konstatas ke ni ne povas. Eble mi donis la malĝustan signifon al "sukcesa". Jes, mi kredas ke jes. Miaopinie, la vera sukcesulo estas la viro kiu povas resti kun la sama virino jarojn post jaroj, kontenta ke la mondo neniam aŭdas pri li.

Tiuokaze, mia respondo estas emfaza "JES".  
—KONSILANTO.

—ooOoo—

Ĉi tiu estas la lasta el la serio "Konsultu la Konsilanton". Jes, vi prave divenis: "Konsilanto" estis kompreneble Arthur Cocking. Responde al multaj petoj, li konsentis verki pli da biografioj en la serio "Who is Who?". Kiel antaŭe tiuj estos en la angla lingvo, ĉar la ĉefa celo estas informi novulojn en la Esperanto-movado.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **PERTO:** Dudek membroj partoprenis sukcesan piknikon je 9-a de marto en la hejmo de Elaine Pianta. Dek kvin anoj partoprenis en la "Palmdimanĉa" Pacmarŝo kun flago sur kiu estis skribita "Esperanto: the language of Peace".

Bone progresas klaso de 15 komencantoj ĉiumerkrede dum la kunvenoj de la Ligo en "Nedlands College". Vera Payne instruas klason en la Kolegio "Mt. Lawley" kaj David Poulson instruas naŭ membrojn.

• **MELBURNO:** La jarkunveno de la Melburna E-Societo okazis je 24-a de februaro. Naŭ membroj ĉeestis. La sekretario (Herbert Koppel) raportis, ke en 1985 la Societo havis 26 membrojn kaj 4 lernantojn (unu membron pli ol en 1984). La Kasisto (Errol Chick) raportis, ke la societo havis pluson de \$122.08, ĉefe pro tre saĝa investo. Tamen, pro ĉiam altiĝantaj kostoj, li proponis, kaj la kunveno akceptis, altigon de la kotizo de \$14 al \$16, kaj al \$8 por Pensuloj.

Oni elektis la jenan estraron por 1986: Prez: Harry Beechey; Vic-Prez: Gerald Tumman; Sekretario: Herbert Koppel; 2-a Sekretario: Geoff Cutter; Kasisto: Errol Chick; Bibliotekisto: Fay Koppel; Kas-Kontrolisto: G. Tumman.

Je 3-a de marto Errol Chick montris diapozitivon kaj parolis pri Ĉinio, kiun li vizitis en 1980. Je 7-a de aprilo li prelegis pri "Vojaĝo tra la Norda Insulo de Nov-Zelando".

La OAKLEIGH grupo havis sian ĝeneralan kunvenon je 4-a de februaro kaj elektis novan estraron: Prez: Jack Fallu; Vic-Prez: S. Kanaĉki; Sekretario: Ann Hearn; Kasisto: Ivy Fallu.

La MALVERN-Grupo, 3/2, elektis Don Pescod kiel prezidanton kaj Beryl Pescod kiel kasiston. Adrienne Paling, kiu dum preskaŭ 30 jaroj estis la grupestro, devis rezigni pro malsano.

Jarkunvenis ankaŭ la grupo en WAV-ERLEY. Margaret Miller farigis prezidanto kaj Isabel Gale sekretario/kasisto. Bibliotekisto: Ruth Youren; Reprezentanto al la Viktoria Federacio: Margaret Young.

• **KANBERO:** La Klubo rekomencigis la 3-an de Februaro. Oficistoj por 1986 estas: Prezidanto, Ralph Harry; Sekretario-Kasisto, Marj Ellyard; Vic-Prezidanto, Patti Anson; Komitatoj, Brenda Birkett, Peter Munibi.

Ralph instruas kvar komencantojn kaj Marj gvidas progresantojn kaj studrondon. Kunvenoj estas ĉiun Lundon en la Centro por Migrintoj, Griffin Centre, Civic, 19.30-21.30.

Bonvenaj gastoj en Februaro estis Martin Purdy, UEA Delegito el Levin, Nov-Zelando, kaj Eric Hewitt el Perto.

• **NACIA LINGVO-POLITIKO:** La Prezidanto kaj Sekretario de AEA partoprenis en kunveno en Kanbero, la 16-an kaj 17-an de Februaro, de organizoj koncernataj pri la nacia lingvo-politiko.

La kunveno urĝis la registaron efektiviĝi la rekomendojn de la Senata Komitato pri Edukado kaj la Artoj en sia raporto de Oktobro, 1984 (A.E. Jan.-Feb., 1985).

S-ro Harry informis la kunvenon pri la rezolucio akceptita de UNESKO la

8-an de Novembro, 1985, en Sofio. Li menciis, ke A.E.A. baldaŭ proponos al la Registaro programon per kiu la Registaro povos respondi pozitive al la invito de UNESKO al siaj membroj celebri la 100-an datrevenon de la unua eldono de Esperanto.

—R.L.H.

• **MANLY:** La 15-an de aprilo finiĝis la unua trimestro en la Eduka Centro kaj estis aranĝite, ke ĝis la 27-a de majo, kiam la dua trimestro komenciĝos, ĉiuj kiuj volas, renkontiĝos mardon vespere en privataj hejmoj.

Kiel kutime, la unuan mardon post la fino de la trimestro, okazis aferkunveno en la hejmo de Marjorie Duncan. Robby Robertson raportis, ke laŭ invito de Magdalena Rozsa kelkaj anoj de la "Manly"-Klubo vojaĝis al Orange por ĉeesti interkonatiĝan vesperon kun Esperanto-kursanoj de s-ino Rozsa kaj la gastigemaj samideanoj tie. Impresis la vizitantojn la progreso kaj bela elparolmaniero de la klasanoj, kiuj prezentis erojn. Poste Robby parolis pri Esperanto-organizoj kaj Betty Cleminson pri interracia korespondado.

La 25-an de aprilo pluraj Manly-anoj, kun aliaj membroj de la NSK-Federacio ĉeestis semajnfino en Kanbero. La gastigemaj Kanberanoj aranĝis bonegan programon kaj ni ĝuis tetrinki en la hejmo de Ges-roj Harry, pikniki apud la Lago Burley Griffin, partopreni distran vesperon kaj viziti la Artgalerion kaj la sciencan ekspozicion "Questacon". Notinda estis interesa vizito al la zorge katalogita A.E.A.-Biblioteko kun la Prezidanto Ralph Harry, kiu ankaŭ montris al ni la parte konstruitan "Aŭstralian Instituton de Internaciaj Aferoj", kie situos la nova hejmo de la biblioteko.

—EUNICE GRAHAM.

• **ORANGE:** Mi ĝoje raportas, ke dek-semajna Esperanto-kurso, sub la aŭspicio de la Centra-okcidenta Plenaĝa Edukada Asocio, ĵus finiĝis sukcese kun 18 lernantoj, kiuj indikis, ke ili volas daŭrigi la kurson.

Ok anoj de la "Manly"-Esperanto-Klubo alvenis en Orange por helpi nin fondi la "Orange"-Esperanto-Klubon. La unua jarkunveno okazis la 22-an de aprilo kaj la jena estraro elektigis: Prezidanto: Magdalena Rozsa; Sekretario:

Ronald Fisher; Kasisto: Judy Jones; Librop-ranto: Donald Morgan; Informado: Iris Boyd. Estas 19 anoj en nia klubo. Denove aperis bona artikolo en la loka ĵurnalo pri la Esperanto-kurso kaj la klubo.

—MAGDALENA ROZSA.

• **BRISBANO:** La kutimaj 4 klasoj daŭras dum klubvesperoj, tamen ĉiun monaton ankaŭ okazas ĝenerala kunveno kaj poste distraĵo. Dek kvar anoj partoprenis piknikon de nia Federacio ĉe Digo "Atkinson", la 20-an de aprilo kaj ege ĝuis la tagon.

—RAY ROSS.

### Esperanto en Lernejoj en Gatton (Kvinslando)

J. Dimo

Enkonduko de Esperanto en lernejon estas ebla je la loka aŭ regiona nivelo. Mi agis en Gatton jene:

Mi kontaktis la estrojn de 4 lernejoj en la regiono Gatton kaj penis konvinki ilin, ke Esperanto estas tre facila kaj pli utila ol kiu ajn nacia lingvo. En ĉiu lernejo mi komencis klason POST la regulaj horoj sed EN LA LERNEJO. En Katolika lernejo "Nia Damo de Bona Konsilo" mi havis 2 klasojn, unu kun lernantoj de primara nivelo, la alian kun adoltoj, el kiuj tri profesiaj instruistoj.

Mi planis la instruadon tiel, ke post la 5-a leciono ĉiu lernanto komencis (en baza, simplega Esperanto) korespondadon kun almenaŭ unu persono eksterlande. Mi penis trovi korespondantojn el tre diversaj landoj. Mi havis tiam (en Julio, 1984) entute 34 lernantojn. Post du-tri monatoj multaj leteroj, poŝtkartoj, donacetoj, fotoj k.t.p. alvenis el ĉiu parto de la mondo. Miaj junaj (meze 10 jaraĝaj) lernantoj montris tiujn aĵojn en klasoj, en lernejoj, al gepatroj kaj amikoj. Tio rapide altigis la intereson pri Esperanto en ĉiuj lokoj kie mi instruis. Lernantoj, gepatroj kaj instruistoj VERE ATENTIS Esperanton, ĉar estis elmontrite kaj pruvite, ke Esperanto estas (1) tre facile lernebla en utiligebla baza formo kaj (2) pli utila ol naciaj lingvoj, kiuj estas LIMIGITAJ al uzo en unu nacio aŭ grupo da nacioj sed NENIAM je vere internacia nivelo.

Post tio, ĉio estis TRE FACILA. Mi havis du kunvenojn kun la estro; konferenco de gepatroj kaj instruistoj estis kunvokita; granda plimulto voĉdonis

(1) preferi Esperanton al la konkurantoj — la franca, la germana kaj la itala kaj (2) kontakti la pli altajn aŭtoritatojn por aprobo. Kun la subteno de entuziasmaj lernantoj, tre interesitaj gepatroj kaj instruistoj, ni venkis preskaŭ sen batalo.

Do, ekde Januaro de la nuna jaro, la lernejo "Nia Damo de Bona Konsilo" OFICIALE enkondukis Esperanton kiel LA lingvon (la solan) en la primara lernejo. Ĝi estas instruata en du periodoj, ĉiun semajnon, dum la normalaj lernejoj horoj, kiel NORMALA deviga temo, por ĈIUJ lernantoj de grado 4. Ili daŭre lernos ĝin ĝis grado 8, kaj ĉiun jaron la novaj kvaragradanoj ankaŭ komencos ĝin lerni. Ĝi estas instruata de profesia plentempa instruisto de la lernejo. La nuna instruisto estas S-ino Madeleine O'Dea, plentempa instruisto, kiu lernas Esperanton dum ŝi ĝin instruas. Tra mia tuta agado helpis min alia plentempa instruisto (de muziko), Fratino Cecilia Sullivan, kiu estas ankaŭ en mia klaso por progresintaj adoltoj (post la lernejoj horoj) kaj kiu komencis lerni Esperanton antaŭ kelkaj jaroj ĉe Jean Lehane en Toowoomba. Por helpi Madeleine, Fratino Cecilia kaj mi ĉiam preparas du semajnojn de instruado antaŭe kaj surbendigas ĝin. Mi legas la Esperantan tekston kaj tiel helpas, laŭ mia ebleco, certigi korektan prononcadon. La nura legolibro estas "Domo kun Ora Fenestro" de Jean Lehane.

Oni petis min akcepti, senpage, la rolon de "konstruanto" aŭ "helpanto" de la kurso kaj mi intencas baldaŭ akcepti tion.

Se AEA povus, je sia kosto, enmeti anoncon en "Esperanto", la organo de UEA, invitante homojn en ĉiuj landoj skribi al: "Esperanto Class", Our Lady of Good Counsel School, Maitland St., Gatton, 4343, Queensland, Aŭstralio (mi garantias respondon al ĉiu) la ricevita materialo estos uzata por krei vojaĝantan ekzpozicion en lernejoj kaj mi certas, ke tiam PLI da lernejoj JA enkondukos Esperanton kiel lernejan temon.

(Esperanto-teksto de Ralph Harry)

Notu: AEA aranĝas tian anoncon en "Esperanto". — R.L.H.

• **TOOWOOMBA:** Ni kunvenas ĉe 2A Harms Street, Toowoomba je la 7-a vespere, lunde. La unuan lundon de la monato ni havas "Konversacian Ron-

don", la 2-an lundon okazas "Societa Aferkunveno" kaj la 4-an lundon "Distra Vespero" (konversado kaj ludoj).

La Rotaria Klubo organizis "Hobio-kaj Metio-Spektaklon" en la nova Ekspoziciejo. Estis 140 budoj de hobiistoj kaj metiistoj, inklude de Esperanto-Budo. Nia stoko de broŝuroj kaj flugfolioj preskaŭ tute elĉerpiĝis.

## EL LA FEDERACIOJ

• **KVINSLANDO:** La 20-an de aprilo okazis la unua renkontiĝo el la jarprogramo, kiam ĉ. 20 anoj (malpli ol atenditaj) plenguis tuttagan piknikon ĉe Digo "Atkinson", apud Lowood.

Malgaja novaĵo estis, ke S-ino Doris Sinclair, la fondprezidinto de la Federacio, ege malsanas en Hospitalo de Nambour; estis decidite sendi flordonacon al nia kara anino.

Intertempe, aranĝoj rilate al la konferenco ĉe Tambourine estas tutpretaj; ĝis nun pli ol 25 anoj jam aliĝis. La oficiala klaso ĉe "Our Lady of Good Council", elementa lernejo en Gatton, entuziasme progresas. Prizorgas studmaterialon Jim Dimo kaj Fratino Cecilia; instruas la klason S-ino Madelaine O'Dea. Klasanoj ĝis nun ricevis du poŝtkartojn el Perto (Dankon!). La Federacio donacis vortaron, vortaretojn kaj legolibrojn por daŭrigi kaj subteni intereson en la lernado. —RAY ROSS.

• **NOVA ESTRARANO:** En nia marta eldono (paĝo 15) ni erare raportis, ke S-ino Sylvia Burkitt estas la nova estrarano por Nova Sud-Kimrujo. Ni nun ricevis la sekvantan korekton:

Laŭ Artikolo 20 (b) del a Statuto, la Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo nomis denove Betty Cleminson kiel membron de la AEA-Estraro.

Membroj en Nova Sud-Kimrujo, kiuj deziras informojn pri la agado de la Asocio, aŭ kiuj deziras prezenti vidpunkton al la Estraro, povas kontakti ŝin (20 Stiggess Ave., Harbord, 2096, Tel. 93 1854), sed oni sendu alĝojn aŭ kotizojn por AEA senpere al la Sekre-

tario (Marj Ellyard) aŭ al la Kasisto (Owen Loneragan) laŭ la kazo.

—R.L.H.

**LA "A.E."  
SUBTEN — FONDUSO  
1986**

Por eviti miskomprenon bonvole notu, ke donacon por la "A.E." Subten-Fonduso, oni NE konsideru la membrotkizoj al la Asocio. Ĝi estas **libervola aldono** por certigi la daŭran aperon de **Nau Numeroj** de la gazeto.

S-ino E. Matason, Sidnejo	50
Ges-roj A. Einihovici, Perto	20
Esperanto-Federacio de	
Kvinslando (por klišo)	25
S-ino D. Threlfall, Perto	22
S-ino J. Lehane, Toowoomba	20
S-ro S. Kanački, Melbourne	6
S-ro A. Shaw, Melbourne	10
S-ino T. Metherall, Newcastle	10
Ges-roj R. Alvarez, Perto	10
Flino I. Gale, Melbourne	2
S-ino R. McGrath, Perto	10
S-ino M. Ellyard, Kanbero	10
S-ro M. Ross, Manly	7
Ges-roj A. Oliver, Orelia, W.A.	15
S-ro Ilja Slavoff, Melbourne	10
S-ro D. Mason, Mansfield, Vik.	5
S-ro Carson Thomas,	
Toowoomba	5
S-ino May Frogley, Melbourne	4
S-ro H. Koppel, Melbourne	10
D-ro J. L. F. Somogyi,	
Port Hedland	5
	\$256

**KIU SEKVOS?**

**KORESPONDKURSA SERVO DE  
AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO**

**Dujara Raporto**

(1 Dec., 1983 ĝis 30 Nov., 1985)

Komenca Kapitalo:	
De aliaj AEA-Kontoj:	\$1000 (1978)
De NSK-Federacio:	50 (1978)
De Kaethe Schwerin	350 (1978)

Entute: \$1400

**Enspezoj:**

<b>Kursoj:</b>		
"Bonan Tagon" .....	39	\$670.00
"Jen Nia Mondo" .....	25	533.74
"Esp. Teacher" .....	16	293.00
"Progressive" .....	5	128.35
"Paŝoj" .....	2	60.20
Diversajoj (inkl. Bildlibro) ..		129.80
Poŝtpagoj/Donacoj .....		105.00
AEA-Kotizoj ricevitaj .....		130.00
Ricevita por aliaj kontoj .....		13.00
Bank-Interezo—ĉek-konto .....		27.74
Bank-Interezo—ŝpar-konto ..		282.75

Enspezoj (2 jaroj) \$2373.58

**Elspezoj:**

Reklamoj .....	\$456.00
Stok-Aĉetoj .....	704.18
Poŝtkostoj (ĝeneralaj) .....	184.12
Poŝtkostoj (kursgvidantoj) .....	45.00
"Esperanto Bulletin" .....	129.78
Kotizoj al AEA .....	130.00
Al aliaj kontoj .....	13.00
Fed. Ĉek-impotoj .....	6.35

Elspezoj (2 jaroj) \$1668.43

Havaĵo je 30-a Nov., 1985:

Mono en ŝparkonto C.S.B.	\$1620.10
Ĉek-konto .....	628.59

\$2248.69

Valoro de stoko .....

\$1835.11

La financa stato estas sufiĉe bona; necesas havi rezervon kontraŭ ĉiame altigantaj kostoj de reklamado kaj nova stoko.

Kursvendoj iom malpliigis; nur 87 en 2 jaroj, kompare al 157 en 1979/82, kiam niaj prezoj estis pli malaltaj kaj kiam kelkaj aktivuloj skribis pri Esperanto en la ne-esperantista gazetaro.

Al ĉiuj helpantoj mi sincere dankas, kaj, se neniu pli taŭga sin prezentos, mi estas preta daŭrigi la laboron dum du pluaj jaroj.

—JOHN MOORE.

**GRATULON AL NOVAJ  
DIPLOMITOJ**

Kun plezuro, la A.E.A.-Ekzamena Komisiono anoncas kaj gratulas la jenajn sukcesojn en ekzamenoj:

**ELEMENTAN DIPLOMON** gajnis F-ino L. U. Casey (Orange, N.S.K.); S-ino V. Fotheringham (Mt. Waverley, Vik.); S-ino Margaret Chandler (Brentwood, O.A.); D-ro John Mills (Brentwood, O.A.), kun **Honoro**; S-ro Vlado Kosef (Cobar, N.S.K.); F-ino Margaret Warr (Bentleigh, Vik.).

**SUPERAN DIPLOMON** gajnis, kun **Honoro**, S-ino Sylvia M. Burkitt (Sidnejo).

Kiuj deziras imiti, anoncu sian kandidaĵon al la Sekretario de la Ekzamena Komisiono, S-ro Ralph Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Crescent, Forrest, A.C.T., 2614.

## RECENZOJ

**Magia Ŝipo:** Ĉinaj Popolaj Rakontoj, Pekino, Ĉina Esperanto-Eldonejo 1984, 75 p. Ses rakontoj en simpla, klara lingvo. Tradukinto ne estas indikita.

**Papila Fonto:** Ĉinaj Popolaj Rakontoj, Pekino, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984, 67 p. Ilustrita. Kvin ĉarmaj rakontoj. Tradukinto ne indikita.

**Anaseto kaj Koketo,** Adaptaĵo de Hŭang Ĝjunŭan, bildoj de Cu Cuan, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1985. 25p. Bildoj kun tre simpla rakonto por tre junaj infanoj.

**Lupo Invitas Urson,** Teksto kaj bildoj de Mej Jing, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, 1984. Por tre junaj infanoj. 35p.

**Senmortigitaj Fruktoj.** Teksto kaj bildoj de Mej Jing, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. Ilustrita. 63p. Por infanoj, sed ne por la tre junaj. La lingvo estas simpla kaj klasika, sed la intrigo estas iomet kompleksa.

**Plau! Plau!** Adaptita kaj ilustrita de Jang Ŝjaŭcun. 54p. Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985. Carma rakonto pri bestoj, inkluzive de kanguruo kaj ŝia ido. Simpla lingvo. Ideala por legigi infanon.

—R.L.H.

## • Amo kaj Morto en Balio:

Jam de ekstere tiu volumo tre loge impresas: mistere violkolora, groteske konturita vizaĝo de monstra demono — masko por indiĝena dancisto — scivoligas pri la rakonto aŭ romano atendanta nin sub tiu fascina kovrilo. Kaj vere: temas pri Esperanta versio de unu el la plej bonfamaj verkaĵoj de Vicki Baum, aŭtorino anatemita de la nazioj — kio ja atestas pri eksterordinara valoro. Ni ne resumu ĉi-tie la rakontan elementon, nek iujn el la multaj per si mem interesaj scenoj kaj viglaj priskriboj — ili ĉiuj fokusigas al bildo de la indiĝena vivo frue en nia jarcento sur Balio, tiam en la mondo malmulte konata insulo en malproksima ekzotiko. La bildo ampleksas ankaŭ la problemojn de tiu vivo en ĝiaj dialogoj kaj konfliktoj kun la eŭropa civilizacio, koloniestre el Nederlando importita, eĉ altrudita.

La traduko de P. H. Mooij, meritplena Esperantisto, intertempe elmondiginta, estas elstare flua, lingve kaj stile senproĉa, facile komprenebla, sen superflua neologismoj. La listo de la indiĝenlingvaj vortoj, necesaj pro la unikeco de la objektoj kaj nocioj, kiujn ili signifas, ampleksas nur duonan centon da eroj, modera rilato al 417 paĝoj da teksto.

Tiu teksto prezentigas tre korekte presita, en bela tipografio sur bonkvalita papero.

Kia gratulinde digna eldonaĵo, dankenda al UEA kaj antaŭ ĉio al s-ino Elfriede Ernst, viananino nun loĝanta en Bruselo, kies iniciato, energio kaj oferemo vere pliriĉigis nian literaturan trezoron.

—Dr. KARL BECKMANN, Vieno.

(\$17.05 de A.E.A. Libro-Servo, P.O. Box 230, Matraville, NSW, 2036.)



# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 233 (313)

MELBURNO

Junio, 1986

---

## LA KONTRIBUO DE ESPERANTO AL MONDA PACO

Parolado de S-ro R. L. Harry, A.C., C.B.E., al la 25-a Aŭstralia  
Esperanto-Kongreso, Perto.

Dum la tuta 1986-a jaro, ĉie en la mondo, registaroj kaj popoloj pensos pri paco, parolos pri paco, kaj espereble iniciatos programojn, kiuj helpos konstrui kaj konservi pacon inter la nacioj.

La tutmonda Esperanto-Movado aktive partoprenas en la Internacia Jaro de Paco. Ĉi tiu Kongreso, por kiu ni elektis la temon: "La Kontribuo de Esperanto al Monda Paco", estas nur unu el centoj da kunvenoj de la unika Esperanta Komunumo, kiu transcendas naciajn landlimojn kaj estas dediĉita al la atingo de la celoj de la Internacia Jaro.

Tio estas tute natura fenomeno, ĉar por Esperantistoj ĉiu jaro estas jaro de paco!

Por la unua Esperantisto, la aŭtoro de la lingvo, la tuta celo, komponi internacian lingvon, estis disbatita la barilojn inter popoloj, inter nacioj, kaj konstrui la fundamentojn de la paco, neŭtralan lingvon per kiu reala interkompreno povus esti atingita. D-ro Zamenhof mortis en 1917, meze de milito, kiun li prave konsideris interfrata. Sed li ankoraŭ esperis, kiam li mortis, ke post tiu milito Esperanto helpus starigi unuigintan Eŭropon, kun Kortumo de Homaj Rajtoj.

Tiu "Interna Ideo" fariĝis la motiva forto, kiu estigis kaj inspiris sekvantajn generaciojn de Esperantistoj, pretaj fari oferojn, eĉ suferi martiriĝon por ĉi tiu lingvo de paco. Ili ne estus dediĉintaj siajn vivojn al la antaŭenigo de nur praktika komunikilo, de nur logika lingvo. Ili kredis, ke per Esperanto ili povus helpi la starigon de paco.

Estis, dum la pasinta jarcento, multaj tre diversaj ideoj per kiuj la internacia lingvo povas, aŭ povus, esti uzata por atingi la celon pri kiu ĉiuj principe interkonsentis. Por multaj la serĉo al paco estas ligita kun religia kredo aŭ filozofio. Por tiuj la ĉefa rolo de Esperanto estas plivastigi la eblecojn por la disigo de sia religio aŭ filozofia sistemo.

Multaj Esperantistoj, aliflanke, firme kredas, ke oni povas atingi la pacon nur per la starigo de socia justeco, interne de ŝtatoj aŭ inter diversaj ŝtatoj. Ili rigardas Esperanton kiel rimedon por organizi ŝian movadon kaj por persvadi aliajn al sia vidpunkto. Multaj registaroj kaj ne-registaraj organizaĵoj, same kiel individuoj uzis Esperanton por proklami siajn solvojn de mondaj problemoj.

---

Por kelkaj neŭtrala komuna lingvo estas esenca por atingi efikan internacian organizaĵon, kiu kunligu kaj kunordigu la agadon de ekzistantaj suverenaj ŝtatoj . . . por helpi evoluon al federacio, en kiu ĉiuj ŝtatoj estos egalaj, kaj en kiuj neniu lingvo aŭ raso aŭ religio superos alian.

Kontraste aliaj — la tiel nomita kvara mondo — vidas danĝeron en kiu ajn organizo de potenco, ĉu en aparta lando aŭ en supranacia registaro. Tiuj, la Tolstojistoj, kredas, ke, se la homoj povus libere interkomuniki, kaj se oni povus forigi naciismon bazitan sur lingvo, ni povus ĉiuj vivi en paco en malgrandaj komunumoj surbaze de reciproka helpo.

La Universala Esperanto-Asocio, de kiu la Aŭstralia Asocio estas filio, ne identigas kun kiu ajn specifa vojo al paco. Ĝiaj celoj, mallonge, estas disvastigi Esperanton, faciligi internacian komunikadon, kaj labori por interkompreno kaj estimo inter popoloj. Nia propra Asocio, laŭ sia statuto, estas neŭtrala rilate nacieco, rason, religion, partipolitikon kaj sociajn problemojn. Tiu oficiala neŭtraleco ebligas al UEA kaj AEA paroli per unu voĉo en rilatoj kun UNESKO, UN kaj aliaj internaciaj organizaĵoj kaj kun naciaj registaroj. Kaj Universalaj Kongresoj kaj Aŭstraliaj Kongresoj faras aranĝojn por specialigitaj societoj de la diversaj religioj, filozofioj kaj politikaj tendencoj per provizo de kunvenejoj por kunsidoj interne de la ĝenerala programo.

Ĉi tiu ne estas la okazo por diserto pri neŭtralismo, de kiu la difino laborigis multajn cerbojn, plumojn kaj langojn. Zamenhof mem distingis la neŭtralan lingvon de sia persona filozofio kaj vizio. Mi kredas, ke ni ĉiuj povas konsenti, ke, en la atoma epoko, la bezono de paco ne estas partipolitika afero sed problemo por la tuta homaro. Sed ni ne povas ignori la fakton, ke diversaj partioj havas diversajn vidpunktojn pri la specifaj paŝoj farendaj. Estis sur tiu bazo, ke la Estraro de AEA decidis esplori, en ĉi tiu Kongreso, praktikajn metodojn per kiuj Esperanto estis, aŭ povus esti, uzata por paco.

La Estraro konsideris, ke oni povas distingi tri aspektojn, kaj tiuj estos ekdiskutataj en apartaj "laborejoj" je la komenco.

La unua aspekto estas komunikado inter individuaj personoj de diversaj kulturoj kaj naciecoj, kampo sur kiu Esperanto jam elmontris sian kapablon. En multkultura mondo la paco bezonas, antaŭ ĉio, komprenon kaj toleradon. Esperantistoj, per legado, korespondado kaj senperaj personaj kontaktoj, konstante pruvis la eblecojn de interpersonaj interŝanĝoj. La laborejo estrata de Vera Payne de Perto, analizos tiun historian sperton kaj serĉos eĉ pli efikan pacigadon je la persona nivelo.

La dua nivelo de interagado estas inter naciaj ŝtatoj. Tiuj ne indikas, ke ili malpliigos — fakte ili plimultiĝis post 1945 rezulte de malkoloniigado — kaj estas ĉefe nacioj, kiuj posedas armfortojn kaj armilojn kiuj militas. La dua laborejo, kiun devis estri Trevor Steele, kaj estos nun sub la gvidado de Ray Ross, ekzamenos inter-landajn rilatojn, inkluzive la tradician diplomation, oficialajn ŝtatvizitojn kaj "pintkonferencojn" oficialan informadon kaj traktatojn inter ŝtatoj.

La tria aspekto estas internacia organizado — kampo sur kiu internacia lingvo utilus. Ni ekzamenos la sperton de la Ligo de Nacioj kaj de I.L.O., de Unuigintaj Nacioj kaj UNESKO kaj multaj aliaj organizaĵoj, kaj interregistaraj kaj neregistaraj. La Departemento de Eksterlandaj Aferoj afable disponigis ekzempleron en Esperanto de grava parolado de la Ministro, Bill Hayden, kaj ankaŭ de la Ĉarto de Unuigintaj Nacioj kaj la Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Ĉar ni deziras studi faktan sperton, kaj ne teoriajn eblecojn, ni informis aliajn landajn Esperanto-asociojn pri nia projekto, kaj invitis ilin doni al ni la profiton de sia sperto. Ni havis interesajn kontribuojn el Ĉinio, Japanio kaj Koreujo en Azio, same kiel el Britio, Belgio, Federacia Respubliko Germanio, Nederlando, Italio, Ĉeĥoslovakio, Norvegio kaj Sovetunio. Estis ankaŭ tre vigla kaj valora diskutado sur la paĝoj de LA NIGRA CIGNO, la organo de la E-Ligo de Okcidenta Aŭstralio.

La rezulto de la laborejoj kaj la sekvonta ĝenerala debato pri iliaj raportoj, dependos de la grado ĝis kiu ĝenerala interkonsento evoluos. Sen antaŭjuĝi la diskutadon mi esperas, ke ĉi tiu Kongreso almenaŭ povos fari ĝeneralan deklaron pri punktoj kiaj:

- (1) Nia zorgo pri la alarma stato de la mondo, kun oftaj terorismaj agoj kaj seriozaj militoj, pri la danĝero al la travivo de la homaro, en la ekzisto de grandega stoko de nukleaj armiloj kaj la graveco de la Jaro de Paco en la kreo de cirkonstancoj, kiuj ebligu la forigon de tiaj armiloj per universala interkonsento;
- (2) Nia kredo, ke la atingo de la paco postulas pozitivajn paŝojn por antaŭenigi homan solidarecon, bazitan sur interkompreno, tolerado, justeco kaj egala apliko de homaj rajtoj je la individua, nacia kaj internacia niveloj;
- (3) Nia konvinko, ke por interkompreno kaj reciproka estimo, je ĉiuj niveloj, necesas komuna lingvo, kaj ke la internacia lingvo Esperanto jam elmontris sian kapablon kaj taŭgecon kiel la komuna neŭtrala lingvo por multkultura mondo;
- (4) Nia intenco plenumi, dum la Internacia Jaro de Paco, pli intensan programon de mesaĝoj al homoj en aliaj landoj, uzante Esperanton;
- (5) Nia espero, ke la Registaro kaj ĉiuj Aŭstralianoj, kiuj aspiras al la paco, kuraĝigos kaj finance subtenos tiun projekton, kiel pozitivan kontribuon al la Internacia Jaro de Paco.

### Persona opiniesprimo kaj Akademia aŭtoritato

Bernard Golden

En sia artikolo "Terminaro de Briĝo" (Heroldo, 1984, 16/1739, p. 3). Ralph Harry tuŝas temojn ne rilatantajn al la kartluda nomenklatureto. Unue, li eraras pri mia prilingva aŭtoritato. Mian artikolon pri la neologismo "treko" (Heroldo, 1984, 13/1736, p. 4) mi subskribis kiel **privata** persono; nenie en la verko mi aludis, ke mia okupiĝo pri tiu demando havas rilaton kun la Akademio de Esperanto. Nur en la oficialaj cirkuleroj kaj bultenoj de la Akademio estas eble informiĝi pri la sinteno de la Akademio rilate lingvajn problemojn. Ekster tiu kadro, ĉiu membro de la Akademio rajtas havi sian propran opinion kaj esprimi ĝin publike. Tiu opinio, kompreneble, estas persona afero. Estis s-ro Harry, kiu, uzante plurfoje la titolon "Akademiano" antaŭ mia nomo, sugestis, ke lia neologismo "treko" estas pritraktata de la Akademio. Kiel aŭtoro de la koncerna artikolo, mi ne uzis la titolon "Akademiano", kaj laŭ mia scio la Akademio ankoraŭ ne okupiĝas pri la terminoj de la kartludo briĝo. Tamen, s-ro Harry skribis: "mi kredas, ke la Akademio havas aliajn pli urgajn taskojn..."

Tiuj "urgaj taskoj" estas la dua punkto, kiun s-ro Harry marteladas en sia artikolo. Temas pri elimino de la kaosa stato de loknomoj en Esperanto. Li iom koleretas, ĉar dum pli ol du jaroj li aŭendas respondon de sia peto al la Akademio, ke ĝi metu ordon en la nomoj de membro-landoj de la Unuigintaj Nacioj. Nu, la Akademio nuntempe ja okupiĝas pri tiu problemoj, kaj diver-

saj proponoj estas pritrakitaj en la cirkuleroj. Cetere, eksterakademie pluraĵ membroj de la Akademio publikigas artikolojn pri la demando. Ankaŭ s-ro Harry, anstataŭ pasive atendi pli ol du jarojn, estus povinta fari ion pli pozitivan, sed ŝajnas, ke li preferas ludi briĝon. Povas esti, ke la definitiva briĝ-nomenklatureto estos preta pli frue ol la landnoma, kaj tiu estos por s-ro Harry ne simpla "treko" sed atute prenita grandŝlemo!

—ooOoo—

### Nova "Teamo" en Svislando

La Esperanto-asocio de Svislando nomiĝas "Svisa Esperanto-Societo" kaj ĝi havis sian Generalan Kunvenon la 1-an de marto en Basel. Ĉeestis 44 membroj kaj 16 gastoj, el kiuj du estis Usonanoj.

Laŭ statistiko prezentita al la kunveno la membraro konsistis en 1985 el 12 honoraj membroj kaj 221 aktivaj membroj. 152 estis Germanvisoj, 58 Francvisoj 11 Italvisoj, sed oni pensas, ke eble 2000 ĝis 3000 Esperantistoj loĝas en Svislando.

La plej grava rezulto de la jarkunveno estis la elekto de tute nova Estraro. La multmerita prezidanto D-ro Arthur Baur (Zuerich), kiu gvidis la Societon dum la pasintaj 6 jaroj rezignis, same kiel la maljara vicprezidantino kaj sekretariino Lilly Schaerer (Langenthal). Kiel prezidanto elektigis Claude Gacond, jam bone konata kiel direktoro de la "Kultura Centro Esperantista" en La Chaux-de-Fonds. Sekretario fariĝis juna esperantisto Andy Kuenzli (el Kriens).

Evidentiĝis, ke ankaŭ en Svislando enmigrintoj okupas gravajn funkciojn en la landa asocio, kiel Vojslav Pytloun

(kasisto) kaj Tyburcuzs Tyblewski (membro de la redakcio de "Svisa E-Revuo").

Angla proverbo diras, ke "Novaj Balailoj bone purigas". Ni esperu, ke la nova estraro daŭre laboros kun la sama entuziasmo kiel faris la malnova dum multaj jaroj.

## DEK SES REGULOJ

Scipovi la lingvon,

Laŭdire: facile,

Bezonas memoron.

Reguloj: dekmilo.

Meta Auld

(El "Brita Esperantisto".)

## Malseriozaj Analoj de 1985

### Rolo

Estis multege da seriozaj katastrofoj la mondo en 1985- tertremoj, inundoj kaj aviadilkraŝoj, terorismo kaj militoj. Tamen necesas registri, en ĉi tiuj tradiciaj analoj, la vere gravajn eventojn de la jaro laŭ la rdpunkto (mi kliniĝas al mia majstro, Raymond Schwartz) de neŭtrala observanto.

La fakto estas, ke la plej timiga manko sur nia eta terĝlobo ne estas la malsatiga manko de nutraĵoj en Afriko, aŭ la manko de racio en la meza oriento, ekstrema oriento kaj okcidento, sed la tuta foresto de humuro en la rilatoj inter la ŝtatoj, kaj super ĉio inter la superpotencoj.

Tiun mankon substrekis la Prezidento de Aglolando dum sia pinta kunveno en Genevo kun Gobiĉefo el Ursolando. Reganto plendi s, ke la interpretisto de Gobiĉefo ne povis sufiĉe rapide interpreti la regantajn ŝercetojn.

Tamen, la Pintkunveno havis iom da utilo, ĉar Reganto kaj Gobiĉefo lernis reciproke siajn antaŭnomojn. Nun, anstataŭ diri: "Tion mi ne kredas, Reganto", Gobiĉefo povas diri: "Vi nepre blagas, Ronĉjo", kaj anstataŭ respondi: "Via propono ne estas akceptebla, S-ro Gobiĉefo" Reganto povas komenti: "Ĉu vi kredas, ke mi estas nai-vu'o kaduka, Miĉjo?" Eble ili babilos de

tempo al tempo per la ruĝa telefono, kaj la interpretistoj lernos la ŝerĉojn.

Antaŭ ol fariĝi landestro G.B.Ĉ. jam vizitis Manjon, la senhumuran plutonian blondulinon en Brutujo, kaj lia unua ŝtatvizito al Frankolando evidentiĝis similan mankon de humuro. En Paradizo, ĉefurbo de gajo kaj spritaĵoj (mi kliniĝas al mia majstro) la ĉefo de la urso registaro pasigis sian tempon en la Palaco Elizea, diskutante politikon, ne kun la dekstra aŭ maldekstra rando de la spektro, sed kun la mita rando, aŭ pli precize la mitingando, kiu havas multe da problemoj kaj malmulte da sprito. Nur Ranjo, la edzino de la urso ĉefo komprenis la ŝercon — ke en sovet' ne estas vesto (!) — kaj ŝi saĝe dediĉis sin al vizitoj ĉe la sanktuloj, kiaj Sankta Laŭrenco, kaj al la domoj de la modo kaj parfumoj. Tiuj ne bezonis interpretistojn, ĉar la paradiza modo parolas senpere al la koro de ĉiu virino, eĉ en klinolino.

Poste la ĉefo de la mita rando, alinome Mitarano, penis organizi ŝercon dum la vizito de la jaro — slava skiisto. La mita araneo ŝlisis la antaŭan pordegon de la Elizea Palaco kaj ŝajnis, ke li tute forgesis pri la vizito. Tiam li ekaperis kun ridego por enlasi la skiiston per la flanko pordo. La slava skiisto ne trovis tion tre am-uza.

Alia ŝerco, organizita de la registaro de la mitinganoj, aŭ de ties agentoj, tute misokazis. Oni decidis donaci eksplodan bombonon al iuj verduloj, kiuj vojaĝis — en boato kun la ŝlogano: "Batalantoj de la Ĉielarko" — al Kivilando. En la frankolandaj hoteloj bombono sur kapuseno de enlitiĝonto indikas varman bonvenigon, kaj la mitinganoj deziris promesi, ke varma bonvenigo atendas la verdulojn, verdire, se ili vizitos la murdodoran atolon, frankan insulton en la Pacifiko. La verduloj kaj la kiviĵo ne komprenis la ŝercon kaj decidis starigi kolonion en Antarkto, ĉar ili preferas g'aciaĵojn al bombonoj. (Daŭrigota)

—Dum mia vivo mi feliĉiĝis sennombrajn virojn — kiam mi forlasis ilin!

—Ho, knabo! — kriis la elektristo al la metilernanto. Ektuŝu la dekstran kondukilon! Ĉu vi sentas ion?

—Nenion, majstro.

—Brave, tiam ne tuŝu la alian! Ĝi enhavas kurenton de trimil voltoj.

(Hung. Vivo)

# AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **PERTO:** Dudek kvar membroj partoprenis (4-an de majo) piknikon en "Kings Park", kie samtempe okazis festivalo, kiu altiris amason da homoj. Ni interkonatiĝis kun "Taj-japana" piknik-grupo kaj pola esperantistino Anne Bialecka.

Je 14-a de majo okazis diskuto pri aĉeto de Esperanto-Domo. Oni venis al la konkludo, ke aĉeti domon, kiu nur servus la Esperanto-Ligon, estus preter niaj fortoj, sed oni diskutis planon aĉeti domon de posedanto, kies domo estas tro granda por li/ŝi kaj kiu ŝatus okupi nur parton de sia loĝejo, dum nia Ligo uzos eble alian parton de la domo.

• **MELBURNO:** Je 28-a de aprilo Fay Koppel prezentis 2 recenzojn pri la angla-lingva biografia verko pri "Lidia" (Zamenhof) kaj montris kelkajn bildojn pri ŝi laŭ la verko de Isaj Dratwer.

Je 5-a de majo Errol Chick montris diapozitivojn pri "Vojaĝo tra la Suda Insulo de Nov-Zelando". Pola esperantisto Tadeusz Pisz, 12/5, parolis pri "Veksilologio", la studo pri flagoj kaj ankaŭ pri konkurso por nova aŭstralia flago.

• **SIDNEJO:** Je 14-a de april S-ino M. Chaldecott montris diversajn diapozitivojn kaj du semajnojn poste diskutis la orientecon/okcidentecon de Esperanto kaj kiel orientuloj vidas la influon de Eŭropo en la "Internacia Lingvo". Volo Gueltling parolis pri la rifuzo de Pola E-Asocio permesi al SAT aranĝi sian jubilean kongreson en 1987 en Krakovo.

Je 5-a de majo ni diskutis pri ŝanĝoj, kiujn ni deziras vidi en Sidnejo. Kelkaj volis vidi pli da arboj, dum aliaj opiniis, ke arboj estas tro danĝeraj ĉe strat-anguloj. —M. CHALDECOTT.

• Antaŭ kelkaj monatoj ni ricevis foton, kiu montras proks. 55 personojn kun Esperanto-flagoj. Se iu leganto povus helpi identigi la homojn sur la foto, bonvole kontaktu S-inon M. Chaldecott, 16 Grosvenor Rd., Lindfield, N.S.W., 2070, kiu sendos al vi fotokopion.

• **NEWCASTLE, NSK:** Klasoj nun okazas ĉiujauĉde matene laŭvice en la hejmoj de membroj. Terry Metherall interese pre-

legis pri sia vojaĝo tra Eŭropo.

• **MANLY:** En majo ni bonvenigis nian karan amikino de Amsterdamo, Netti ten Hagen. Netti kiu antaŭe vizitis Aŭstralion en 1977, kun la edzo Franz, restis kun parencoj ĉi-tie, kaj gastigis ŝin en siaj hejmoj diversaj Manly-anoj. Ŝi ankaŭ akompanis nin al la hejmo de Bettie kaj Eric Hart, 10.5.86, kie dek membroj de Manly ĝuis bongustan subcielan lunĉon en iia belega ĝardeno.

13.5.86 kaj 20.5.86 Irina Timonin parolis pri siaj tre interesaj aventuroj en la "Solomon"-Insuloj kaj montris artaĵojn faritajn de la indiĝenoj. Ŝi bonŝance maltrafis la ciklonon, sed ne tiel bonŝance estis Frank Preacher, kiu post veturo ĉirkaŭ la Pacifika Oceano estis preta forflugi el Vanuato kiam la ciklono furiozigis. Li finfine sukcesis aranĝi flugon hejmen en "Hercules"-Transporto.

27.5.86. Marjorie Duncan starigis novan matenan kurson organizitan de la Urba Konsilantaro. Ok komencantoj ĉe-estis. Je la sama tago la dua trimestro komenciĝis en la Eduka Centro.

—EUNICE GRAHAM.

• **Sidnejaj Esperantistoj vizitis Kanberon:** Dekduo da samideanoj el Sidnejo vizitis Kanberon dum la semajnfino de "Anzac Day" (Tago de "ANZAK").

La 25-an de aprilo, post la ceremonioj, la Prezidanto de KEK kaj s-ino Harry bonvenigis la vizitantojn kaj klubanojn en sia ĝardeno, kie ĉiu arbo, arbusto kaj floro havas etiketon kun sia nomo en Esperanto. Ralph prezentis al Volo Gueltling la unuan malneton de la 3-a (ilustrita!) eldono de "Aŭstralia-Esperanta Vortaro" kaj donis "antaŭvidon de la esperanta eldono de "La Diplomato kiu Ridis". Dorothy Harry kun la helpo de David Brand kaj Robin Bailey servis teon kaj verdstelaĵn biskvitajn. Robi Robertson dankis la gastigantojn.

La 26-an okazis pikniko en zefiro apud la Lago Burley Griffin. Organizis la lunĉon Marj Ellyard, Dorota Janiszewska, Peg Mantle, Margaret Noakes kaj Lorna Beecroft, kies edzo Don ankaŭ helpis. Marjorie Duncan, Eunice Graham kaj Betty Cleminson instruis Esperanton al "invadanta" eksmeksikano.

En la vespero ĉiuj kunvenis en la Centro de Migrantoj (la KEK-a klubejo). Ni kantis kun la Londona Klubo kaj rigardis filmojn de la Pacifika kaj Universala Kongresoj en Portlando kaj Vancouvero. Kiel "antaŭvido" de la 71-a

Ralph prezentis filmon pri Pekino, kun cina muziko, kaj disdonis broŝuron pri la kongresa temo kaj bildo pri sia amiko Huang Hua. Ĉiu gis la ludon de Marj "Kiu mi estas" kaj Patty Anson, Peter Munibi, Jack Walters kaj aliaj provis vespermanĝon. Oni ĝojis pri la novaĵoj, ke la Registaro donacos \$1000 al AEA por ties programo en la Jaro de Paco, kaj ke la Aŭstralia Instituto de Internaciaj aferoj akceptis kontrakton provizi konstantan ejon por la Biblioteko de AEA gis 2000 libroj. Sylvia Burkitt dankis la Klubon nome de la vizitantoj.

La 27-an de aprilo multaj vizitis la Ekspozicion de Modernaj Majstroj en la Nacia Artgalerio. Kelkaj ankaŭ inspektis la Bibliotekon en la salonoj de A.I.A. en Jamison kaj iris ankaŭ al la Rezidejo de la Ĝenerala Guberniestro en Yarralumla kaj al la loko — inter tiu domego kaj la monfabriko — kie la nova ĉefejo de AIA estas konstruata.

—R.L.H.

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** Sep anoj, inkl. Joyce Turner de Rockhampton (kiu nun bone sanas), ankoraŭ kunvenas ĉiusabate por konversacia praktiko, teo, kaj la Esperantlingva versio de "Scrabble", kiun ni nun ludas multe pli rapide ol lastjare.

Unu nova membro progresas bone per la koresponda kurso "Bonan Tagon" kaj esperas baldaŭ aniĝi al la konversacia rondo.

Kelkaj havas korespondamikojn alilande, inklude en Irano kaj Algerio; kaj foje ni ricevas leterojn de niaj geamikoj Jose kaj Concha Gonzales, el sia hejmo en Hispanio, en "malbona Esperanto", kiun Jose lernis dum ili feris inter ni antaŭ unu jaro. (Flanke: Kiam ni parolis al Concha en Esperanto, kvankam ŝi ne lernis ĝin, ŝi komprenis tamen multe pli bone, ol en la angla.)

—JOHN MOORE.

## EL LA FEDERACIOJ

• **KVINSLANDO:** La 30-a Konferenco de la Federacio okazis la 31-an de majo/1-an de junio, ĉe Mt. Tambourine. Entute 35 anoj el Toowoomba, Brisbana, Ormarborda kaj St. Lucia grupoj partoprenis la semajnfino benitan de belega vetero. Estis nia plezuro bonvenigi S-inon Beatrice Clarke (Anglujo), kiu kontribuis al nia programo. La tuta sabatprogramo okazis en la hotelo St. Bernard's kie, laŭ tradicio estas samspeca hundo, vivanta

talismano; la originala konstruaĵo estis starigita en 1883.

Dum la ĝenerala kunveno, S-ro Laurie Strange, ĉef-oficisto en Kvinslando por la Aŭstralia Dujarcenta Jubileo, prezentis bele kadritan atestilon, kiun Ray Ross akceptis por A.E.A.; la atestilo rilatas al la akcepto de la 26-a Aŭstralia/4-a Pacifika Kongreso kiel integra parto de la nacia celebrado en 1988.

Raportis pri klubagadoj Tom O'Grady (Brisbano), Winsome Greenhough (St. Lucia), Jean Lehane (Toowoomba), Ray Ross (Gatton), Beatrice Clarke (eroj pri Esperanto en Anglujo). Sukcese laboris pri publiko, Peter Keates per loka gazeto kaj per radio. Sandra Connors prezentis detalojn rilate al la konferenco en Toowoomba (11-12 de oktobro). Estis decidite, ke la unua konferenco en 1987 okazu en Gatton.

Post la kutima vespermanĝo, okazis la distra programo: La Brisbana Kantgrupo kaj St. Lucia kontribuis erojn. Parolis pri kontentiga vizito al Ĉinio, Annie Spencer; Beatrice Clarke prezentis aspektojn rilate al Esperanto en Anglujo kaj Francujo. Tom O'Grady ŝercrakontis, Brisbana grupo prezentis pupeatraĵeton "La Verda Stelo". Bonveniga ano el Tambourine estis Sigi Kunze, kies p.antejo estis sur la listo de vidindaĵoj dimanĉmatene antaŭ ol konferencanoj kunvenis por ŝubiela lunĉo ĉe videjo "The Knoll". Plensukcesa konferenco el ĉiuj vidpunktoj. —RAY ROSS.

• **VIKTORIO:** La 15-a Ĝenerala Kunveno de la Federacio okazis en la Esperanto-Domo je la 7-a de februaro, 1986. La kunveno elektis la jenan novan Estraron: Prezidanto: Jack Fallu; Vic.-Prez. Gerald Tumman; Sekretariino: Ivy Fallu; Kasistino: Eva Trainor; Bulten-Redaktoro: Herbert Koppel.

La unua kunveno por 1986 havis duoblan celon. Unue membroj renkontiĝis por lunci piknike apud la rivero Yarra. Poste ĉiuj promenis al la Ŝtata Muzeo, kie du oficialaj gvidantoj atendis por konduki tra diversaj salonoj kaj informe klarigi ties enhavojn. Posttagmeza teo en la nova restoracio de la Muzeo konkludis agrablan kuneston.

### Fonduso Ken Linton

Dank' al la donacoj de kelkaj membroj, la Asocio jam sendis al 36 landaj asocioj po unu ekzempleron de la libro "Sur la Bordo", kune kun la nekrologo de nia kara amiko Ken Linton.

Restas ankoraŭ 11 asocioj aliĝintaj al U.E.A. al kiuj ni ŝatus sendi ekzempleron, kaj estas aliaj pli malgrandaj landoj en la Tria Mondo kiuj sendube ankaŭ ŝatus havi la libron. Ĉiu membro, kiu volas partopreni bonvolu sendi sian donacon al la Kasisto.

Ni dankas al la sekvantaj donacintoj:

Fay Koppel ..... \$20

Ralph Harry ..... \$20

—coOoo—

### Esperanto-Kalendaro

B.E.A. afable sendis fotokopion de sia Esperanto-Kalendaro de 1935. Ĝi nun troviĝas en la Biblioteko de A.E.A.

## NEKROLOGOJ

La Nestoro de la Esperanto-movado en Sidnejo, **VINCENT J. ("TIMMY") TIMMINS**, mortis la 25-an de marto, 1986. Kian aĝon li havis? Ŝajne neniu Sidneĵano scias. Sed nia "takta biografo" Arthur Cocking, kiu neniam volis malkaŝi la aĝon de intervuito, diris ("AE" N-ro 207), ke en 1907 "Timmy" vizitis la "Fort St. High School". Se ni konjektas, ke en 1907 "Timmy" estis inter 12 kaj 14 jaroj, do li mortis en la aĝo de 91 ĝis 93 jaroj.

"Timmy" ŝajne eklernis Esperanton en 1909, kiam la gazeto "SUN" publikigis Esperanto-lecionojn, kaj aliĝis al la movado en 1911. Post la unua mondmilito li aliĝis al la Sidneja E-Societo, sed ĉar lia edzino ne ŝatis resti hejme sola dum la vespero, li nur malofte partoprenis klubkunvenojn.

La unua aŭstralia kongreso kiun li partoprenis, estis la Sidneja kongreso de 1962. Ekde tiu tempo li estis pli aktiva en la movado. Li kunfondis la Hornsby Esperanto-klubon, kiu kunvenis en lia hejmo. Li havis bonan humur-senton, kiel ankaŭ senton por la beleco de la naturo, kion li arte esprimis en poemoj.

La funebra ceremonio okazis la 1-an de aprilo en la katolika preĝejo de Waitara en la ĉeesto de sep esperantistoj. Li estis enterigita en la "Northern Suburbs Cemetery".

—coOoo—

Malnova membro de la Sidneja E-Societo, **TOM PERRY**, mortis la 5-an de majo, 1986, pro motor-cikla akcidento. Li naskiĝis en Nov-Zelando kaj estis esperantisto ekde la tridekaj jaroj. Motorciklisto frapis lin kiam li promenis kun siaj 3 hundoj. Li estis 83-jara. Li estis kremaciita la 9-an de majo.

## LA ĜARDENO

Poemo originale verkita de  
V. J. (Tim) Timmins

Sunleviĝo estas ĝoj'  
Trapasante sur la voj'  
al ĝardeno mia,  
Kaj parfumo en l'aer'  
Kun la roso sur la ter'  
ŝajnas kvazaŭ dia.

Ruĝaj fingroj de la sun'  
Post paleco de la lun'  
tuŝas florojn hele;  
Vekas plantojn el ripoz'  
Donas vivon al la roz'  
montras ĉion bele.

Vidiĝas inter arboj,  
Kun mil koloraj farboj,  
teksoj araneaj,  
ŝargitaj per roseroj  
Similas al ĉeneroj  
de juveloj feaj.

Fiŝlago en herbej',  
Kie naĝas fiŝoj plej  
heloraj sub la sun',  
Spegulas blucielojn,  
La nubojn kiel velojn,  
printempe ĝis aŭtun'.

Kaj onidiro estas,  
Ke la feinoj festas  
ĉe l'fundo de l'ĝarden';  
Kaj dancas inter floroj,  
Neniam tie ploroj  
nur ĝoj sur la teren'.

Kaj kiam vesperiĝas  
Kaj nokto surteriĝas,  
bedaŭre kun sopir'  
Ĝardenon mi forlasas.  
La sceno baldaŭ pasas,  
post bela sunsubir'.

## RECENZOJ

### • Aŭstralia Esperanta Vortaro/ Australian Esperanto Dictionary

Verkita de R. L. Harry kaj V. Guelting, kun la helpo de diversaj Esperantistoj. 2a eldono, 1985, de la Aŭstralia Esperanto-Asocio. 26p., broŝ. Prezo \$2.00.

Ne imponaspekta broŝuro, sed unu el la plej gravaj esperantologiaj verkoj de multaj jaroj. La leksikoneto ne limigas

sin al "Aŭstraliismoj" sed ankaŭ entenas kelkajn komunanglajn vortojn ial ne inkluditajn en la ĝisnunaj angla-esperantaj leksikonoj. La aŭtoroj uzis komputeron por prepari la tekstojn, tiel ke estis facile dissendi ekzemplerojn de pli fruaj provoj al kompetentuloj kaj modifi la tekston konforme al sugestoj.

Kion mi diru pri tia verko? Ke ĝi estas aŭtoritate verkita, pritraktas 1010 terminojn anglajn, kaj ke aŭstralia Esperantisto, kiu ĝin ne havas, estas aŭ avarulo, aŭ malsagulo. Ĉar ĉi tiaj verkoj estas la fundamento sur kiu staras niaj literaturo kaj parolaro.

—DONALD BROADRIBB.

#### • Adresaro kaj Jarlibro, 1986.

La Adresaro kaj Jarlibro de A.E.A. por 1986-1987 estis kompilita de la Sekretario kaj Prezidanto baze de informajo sendita de la koncernaj organizaĵoj kaj personoj.

Bonvolu sendi korektojn kaj ŝanĝojn al la Sekretario, kiu preparos eventuale suplementon.

Kelkaj ekzempleroj estis elsenditaj sen la jenaj korektoj, kiujn bonvolu noti en via ekzemplero:

- p. 2. Anstataŭ "Koverto" legu "kovrilo"  
 p. 30. Anstataŭ "ESPERANYO-KLUBO" legu "ESPERANTO-KLUBO"  
 p. 39. Anstataŭ "1 1" legu "128 103"

—ooOoo—

Eble la plej embarasa eraro okazis sur paĝo 37. En la listo de A.E.A. Sekretarioj oni indikis per KRUCO, ke F-ino Nancy D. Lawson, poste S-ino Nancy D. Cowling, mortis. Mi tuj telefonis la "mortinton", kiu afable pardonis, ridante, la eraron de la kompilitoj de la adresaro. S-ino Cowling bonsanas kaj estas en bona spirito. Ŝia plej juna filino Susan nur lastjare komencis lerni Esperanton en mia klaso en la "Asocio por Plenaĝa Edukado".

—HERBERT KOPPEL.

• **La Fiera Generalo**, Rakonto de Hŭa Ĝjun'u, adaptita kaj pentrita de Te Ŭej, Tradukita de Laŭlum, Ĉina Esperanto-Eldonejo, Pekino, Dua Eldono, 1985. 22p. Rakonto por infanoj. Simpla lingvo.

• **Bronza Tigro**: Historia dramo kvinakta, verkita de Gŭo Mojŭo (1892-1978), Esperantigita de Seimin, Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1985, 122p. La aŭtoro estas unu el la eminentuloj de la ĉina revolucio. Post la Oktobra Revolucio de Rusujo li sin ĵetis en la novkulturan movadon kaj verkis poemojn. En 1928 li fuĝis al Japanio, kie li verkis "Pri la Antikva Socio de Ĉinio", marksisma pristudo pri la antikva socio. En 1937 li reiris al Ĉinio por fariĝi ĉefredaktoro de "Nacisava Tagjurnalo". Li verkis ses historiajn dramojn por vekti patriotismon kontraŭ japana agreso. **Bronza Tigro** bazigis sur evento registrita en historiaj libroj de Ĉinio, kiam kromedzino de la reĝo ŝtelis, por savi la regnon, la bronzan tigron, simbolon de komandpovo super la armeo. La lingvo estas bona, kvankam ne mankas neologismoj. La strukturo estas realista, sen streĝaj ambiguoj. Legenda de ĉiu, kiu deziras studi la interludon de historio kaj revoluciaj pensoj en Ĉinio. —R.L.H.

• **Montara Vilaĝo**, verkita de Chunchan Yeh, el la angla tradukis William Auld. 264p. Ĉina Esperanto-Eldonejo Pekino, 1984. Serio Oriento-Okcidento n-ro 21 sub aŭspicioj de U.E.A. en konsultaj rilatoj kun UNESKO.

Ĉi tiu estas unu el la plej gravaj eldonaĵoj, inter multaj valoraj libroj, eldonitaj en Esperanto en Ĉinio. Chunchan Yeh, Esperantisto, verkis "Montara Vilaĝo" en la angla lingvo, kaj ĝi estis elektita "libro de la monato" fare de la "Book Society" en Anglio, en Julio 1974. Ĝi priskribas ĉinan vilaĝon en la periodo de la 1927-a Revolucio. La pejzaĝo, la homoj, la vivo, la evoluo politika estas bildigitaj per poezia prozo, kiun la traduko de William Auld faras ĝojo por ĉiu leganto. Ĉiu amanto de literaturo, ĉiu intereso pri la vivo kaj historio de Ĉinio, aĉetos ĉi tiun libron, ĉar ne sufiĉos rapida legado post prunto el biblioteko. Ĝi estas libro gustumenda malrapide kaj ofte kaj releganda en trankvilaj horoj. —R.L.H.

**71-a Universala Kongreso de Esperanto**, Pekino, 26/7 - 2/8, 1986.

Ĝis la 14-a de majo registriĝis jam 2031 kongresanoj. Tiu neatendita nombro kaŭzas gravajn problemojn al la kongresa administrado.



Registered by Australia Post.  
Publication No. VBH 1849.

# The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 234 (314)

MELBURNO

Julio-Aŭgusto, 1986

---

## Mesaĝo de la Prezidanto

### NIA JUBILEA FONDUSO

En ĉiu parto de Aŭstralio niaj organizaĵoj kaj komisiitoj laboras, prepare al la Centjara Jubileo de Esperanto.

En Kvinlando Trevor Steele kunordigas preparojn, kaj mem kaptas okazojn por informado, per "New Leaves" (Novaj Folioj) kaj per radioprogramo pri Kalocsay. Ray Ross jam presigis sian historion "Esperanto en Aŭstralio", kaj preparas la Somerlernejon en Armidale en Januaro, la unuan eventon de la Jubileo.

En Nova Sud-Kimrio la Federacio preparas la programon por la Jubilea Konferenco en Armidale. En Tahmoor Alan Towsey redaktas la Aŭstralian Antologion.

En Kanbero la Sekretario preparis la Jarlibron kaj Adresaron kiu estos organiza manlibro por 1987. Via Prezidanto, ankoraŭ okupata pri 1986 — la Jaro de ia Paco — tamen kontaktas ministrojn kaj departementojn pri la Jubilea Jaro, por kiu la Rezolucio de UNESKO estas bonega elirpunkto. En Majo ni ricevis \$1.000 dolarojn el la Federacia Registaro, kaj povis inviti D-ron Tonkin viziti Aŭstralion. Ni ankaŭ faris kontrakton kun la Instituto de Internaciaj Aferoj kiu certigis konstantan kaj taŭgan ejon por nia Biblioteko. Ni verkas artikolojn.

En Viktorio "Australian Esperantist" fidele informas nian tutan membraron pri la agado. Mi esperas, ke la Redaktoro povos eldoni specialan duoblan numeron por la Jubileo. Mi esperas, ankaŭ ke Gesinjoroj Tumman, post la Universala Kongreso en Pekino, povos dissendi ideojn kaj eble materialon por Jubilea(j) Ekspozicio(j).

En Tasmanio, kie originis nia Stipendia Fonduso, Mac Lefevre helpas kaj konsilas. En Sud-Aŭstralio Max Wearing aktivas inter la instruistoj. En Okcident-Aŭstralio Vera Payne, kvankam tute dediĉita al la plej grava laboro de Mt. Lawley, ankaŭ helpas en la centra administrado de nia Asocio, kiel Vic-Prezidanto. Kaj Owen Loneragan ne nur tenas la librojn, sed batalas kun niaj simpatiantaj organizaĵoj

---

kiaj la Asocio por Unuigintaj Nacioj, kaj kontraŭ IMPRUAL, kiu proponis novan komitaton por krei internacian lingvon!

Do ni havas programon de la Asocio por 1987. Sed por realigi tiun programon ni bezonas monon. Venis la momento kiam ĉiu membro povas helpi per donaco, konforme al sia financa kapablo, al la Jubilea Fonduso. Mi rememoros, ke en Perto en Januaro la Asocio celis fonduson kiu helpu pagi la kostojn de:

- (a) **Eldono de nia Historio.** Ni jam pagis \$1,200 al la presisto. Estas aliaj kostoj por materialoj kaj transporto. Se ĉiu familio aĉetos almenaŭ unu ekzempleron je la speciala prezo al membroj de \$8 ni ricevos niajn kostojn. Mi urĝe petas, ke ĉiu mendu sian ekzempleron kiel eble plej baldaŭ.
- (b) **Eldono de la Antologio.** Kostos almenaŭ \$5,000 por ebligi la preson de taŭga libro, eĉ se U.E.A. akceptos la rolon de eldonanto. Se ĉiu membro donacus \$20, kiel antaŭmendon, ni povus certigi la eldonon.
- (c) **La Jubilea Ekspozicio.** Ni bezonas kapitalon por tiu entrepreno. Mi ŝatus provizi almenaŭ \$2,000 al la komisiito.
- (ĉ) **Ĝenerala reklamado.** La Jubileo estas okazo kiam ni povos tre efike propagandi, se ni havos la necesan monon por broŝuroj, flugfolioj, afiŝoj kaj anoncoj. Ni bezonas almenaŭ \$5,000 por tiuj celoj.
- (d) **Biblioteko.** En la ekspozicioj nepre devos troviĝi la gravaj novaj libroj — inkludante la specialajn Jubileajn Eldonojn de U.E.A. Ni bezonas almenaŭ \$200 por la Biblioteko de AEA kaj \$200 por ĉiu ŝtato . . . entute \$1400.
- (e) **Konferenco.** Ni devas certigi taŭgan publikan manifestacion.

Ni povas imagi aliajn okazojn, kiujn ebligos la Jubilea, se ni havos la rimedojn. Mi proponas, do, ke nia celo por la Jubilea Fonduso estu \$20,000. Tio estus malpli ol \$100 dolaroj, meze, de ĉiu membro de la Asocio. Mi esperas, ke ni povos facile atingi tiun sumon.

Ni ne forgesu, ankaŭ, ke por tiu Fonduso ni povos peti donacojn de Esperantistoj, kiuj ne estas membroj de AEA, eĉ de simpatiantoj kiuj ne parolas la lingvon, eĉ de homoj en la ĝenerala publiko kiu komprenas niajn celojn kaj povus, en tia jaro fari donacon.

Kaj jen estas la unua listo de donacintoj:

Ralph kaj Dorothy Harry \$500, S-ino M. Sanders (Melburno) \$10, Herbert kaj Fay Koppel (Melburno) \$50, Dorothy Threlfall (Perto) \$100, Owen Loneragan (Perto) \$34. **Sume: \$694.**

—RALPH HARRY.

## D-ro Arthur Baur en SVISA RADIO INTERNACIA

### EKSTERORDINARA FARMISTO EL PASINTA TEMPO

Pasintjare oni memorigis la ducentjaran revenon de la morto de farmisto, kiu en sia tempo havis eksterordinaran signifon kaj kiu ankaŭ ne estas forgesita, kiel pravas ekspozicio organizita okaze de tiu datreveno kaj la represo de la libro verkita antaŭ 220 jaroj pri tiu viro. Li nomiĝis **Jakob Gujer**, sed li estis konata sub la nomo **Chlyjogg**, kio sig-

nifas malgranda Jakobo, germanigita Kleinjogg. Mi nun ankaŭ uzos tiun nomon.

Kleinjogg naskiĝis 1716 kaj li mortis en 1785. Li estis kamparano, aŭ pli taŭga vorto estus agrikulturisto. La kamparanoj en Svislando ĉiam estis liberaj homoj, servutuloj neniam ekzistis, sed laŭ la modo de la tiama tempo

ankaŭ en Svislando la urbanoj iom moke aŭ malestime rigardis la kamparanojn. Tio klarigas inter alia, ilian grandan admiron pri Kleinjogg, kiam ili eltrovis en li eksterordinarajn kvalitojn ne nur profesiajn sed ankaŭ homajn.

Kleinjogg transprenis la bienon de sia patro kaj kun granda inteligenteco, kombinita kun senlaca laboremo, transformis la neglektitan bienon en prosperan entreprenon. Pro tio la registaro de Zuerich invitis lin transpreni grandan farmbienon, kiu estis propraĵo de la ŝtato, por transformi ankaŭ tiun deficitan bienon en modelan agrikulturan farmon. Li estis 43-jara, kiam li transprenis tiun komision, lasante sian hereditan bienon al sia frato, kaj li sukcesis efektive tiel bone kiel la registaro estis esperinta. Lia propra bieno estis kvar piedirajn horojn malproksime de Zuerich, la nova bieno estis atingebla en unu horo de Zuerich, hodiaŭ ĝi estas proksime de la urba limo. Tiu malgrandigita distanco ne estas tute sensignifa, ĉar oni vokis Kleinjogg ofte al la urbo, kaj multaj vizitantoj venis al li, inter ili la plej famaj personoj de lia tempo. Fama fariĝis la eldiro de Goethe, la granda germana poeto, kiu vizitis Kleinjogg. Li skribis en letero: "Mi iris al Kleinjogg sen pensi ion pri li, kaj mi revenis de li riĉa kaj kontenta. Mi ne renkontis idealon venantan de la ĉielo, sed mi renkontis unu el la plej brilaj estaĵoj de nia tero."

Kleinjogg do estis tre sukcesa, ĉar liaj agroj portis pli da fruktoj kaj liaj bestoj estis pli sanaj. Pri tio atentis la tiama urba kuracisto de Zuerich, D-ro Hans Caspar Hirzel (1725-1803), tre klera homo. Li ofte vizitis Kleinjogg kaj verkis libron pri li, kiu estis presita en 1761 kaj tuj tradukita en la francan lingvon, en kiu ĝi ekhavis eksterordinaran sukceson. Ĝin legis Rousseau kaj la aliaj brilaj kapoj de la epoko, kaj ili admiris la filozofan kamparanon ĉiumaniere, eĉ tiom, ke ni hodiaŭ jam ne povas kompreni tion.

Ni devas memori, ke en la dua duono de la 18-a jarcento laŭ la slogano "returne al la naturo", la admiro de la simpla kampara vivo estis granda modo, kaj samtempe la seriozaj homoj tre interesiĝis pri agrikulturo ekkoninte ke ĝi estas la bazo de ĉiu ekonomio. En Bern ekzemple fondiĝis tiam la societo

por ekonomio kaj bonfarto, kaj en Zuerich ekzistis naturscienca societo, kiu ankaŭ interesiĝis pri agrikulturo. En tiun societon Hirzel enkondukis Kleinjogg en 1762 kaj de tiam li estis ofte invitita al la kunvenoj, kio en tiu tempo ne estis memkomprenebla, ĉar la urbanoj tiam pensis, ke ili valoras pli ol simpla kamparano. La inteligenta maniero, kiel Kleinjogg klarigis siajn teoriojn kaj spertojn impresis ilin, kaj ili ankaŭ akceptis lian proponon inviti ankaŭ aliajn agrikulturistojn por komuna konsultado. Entute okazis 8 tiaj kunvenoj, du el ili prezidis Kleinjogg mem.

En tiu tempo la scienco pri agrikulturo, hodiaŭ tre grava fako, praktike ne ekzistis. La intuicio kondukis Kleinjogg sur la ĝustan vojon. Li eltrovis la avantaĝon nutri la bovinojn en la stalo, li eltrovis la ĝustan preparon de la sterko kaj ĝian gravecon por la revalorigo de la tero, li eltrovis la miksadon de la teroj, ekzemple transportante sablon en argilan teron. En nia hodiaŭa tempo ni eltrovis, ke ni uzas tro da artefarita sterko kaj la disvastiĝantaj teorioj pri biologia revalorigo de la tero revenas al la teorioj de Kleinjogg, ekzemple uzante multajn ŝtonojn anstataŭ la kemia sterko. De tiu flanko Kleinjogg nun ĝuas novan famon, oni vidas en li la patron de la biologia terkulturado.

La eltrovoj de Kleinjogg solaj tamen ne klarigas sufiĉe la admiron, kiun li ĝuis en sia tempo. La kaŭzoj de la granda estimo estis en lia karaktero. Li estis simpla kaj sincera homo, ĉie serĉis realigi la bonon kaj li edukis siajn dek infanojn al laboremaj homoj evitantaj ĉiun lukson, kiuj konscias pri la senco kaj valoro de sia laboro sur la kampo por nutri sin kaj ĉiujn homojn. Profiton li neniam serĉis, sed la prospero venis de si mem dank' al lia senlaca kaj inventema laboro.

## PRIVARBA KONKURSO

La Brisbana E-Societo akceptis ideon de Bill Leah okazigi konkurson por elekti allogan "T-ĉemizon", kiu per desegnaĵo aŭ kaj slogano varbu por Esperanto okaze de ĝia centjariĝo. Ni planas presi kaj vendi amase la (eble

multkolorajn) ĉemizojn. La gajninto ricevos premion: du ĉemizojn!

Sendu via(j)n konkursaĵo(j)n antaŭ la fino de septembro al:

**Tom O'Grady, 42 Norton Street,  
Upper Mt. Gravatt, 4122, Q.**

## MALSERIOZAJ ANALOJ DE 1985

(Daŭrigo)

Dum la jaro mankis humuro ankaŭ en la sportoj kaj ludoj de la mondo.

Ekzemple en Granda Brutujo, kie la futbalo originis, la teamoj devis resti hejme en la stadionoj de la brutaj insultoj, ĉar la subtenantaj armeoj, kiuj kuniris al la Kontinento, tro similis al la hordoj de mon-goluloj en la meza epoko. En maĉo kontraŭ la Romea teamo, la partizanoj atingis sian brucelon, sed la bel-goluloj diris, ke premio ne valoras masakron, kaj ne france sed flandre insistis, ke la brutoj reiru al sia insulto, kaj ke oni ne konstruu tunelon sub, aŭ ponton super, la Manikon.

En Oktobro atletoj el multaj landoj iris al Kanabejo, la ĉefurbo de Kangarulando, por konkursi pri la monda pokalo. Feliĉe la vojaĝo estis tro longa por la partizanoj, kaj nur la atletoj aperis en la stadiono. Ne estis tiel ekscita kiel la Olimpiaj Ludoj aŭ la Ludoj de la Komunregnaro, sed tamen oni sukcesis aranĝi kelkajn disputojn por amuzi la televidantojn.

La monopolo de teniso, ĝuita dum multaj jaroj de la agloj kaj la kanguroj, estis decide rompita en la nuna jardeko. Unue venis bona burĝo el Sveltlando, kiu venkis la aglojn. Sed la ĉefa faktoro estis la grandeco de la ĉekoj. Martelo Navetolino venkobatis kontraŭ ĉiuj tenisantinoj, kaj eĉ pli da ĉekoj eniris la sporton. La fabrikantoj de biskvitoj kaj cigaredoj provizis ŝajne neelĉerpeblan stokon da ĉekoj.

La ursoj, kompreneble, superis en la plej serioza kaj senhumura ludo, ŝakoj. La maratono, kun l'amara tono, inter la Karpato kaj lia rivalo Kaspio, daŭris preskaŭ la tutan jaron, kun multe da

karpdoloroj kaj kafopaŭzoj. Oni raportis, ke, dum ursaj ludantoj malfortigis pro la nervostreĉa monotono, la observantaj ŝakkomputilaj notis ĉiun movon, kaj ke preskaŭ certe la venonta ĉampiono havos artefaritan cerbon.

Sed la ĉefa internacia ludo en 1985 estis la tradicia kaj universala sportospionado. La ludantoj havis riĉajn patronojn kaj la spektanta publiko ĝuis la interesoplenajn eventojn, kaj la buntajn uniformojn de la ludantoj. Kutime lando ne sendas spionojn al la teritorio de amiko, sed en 1985 agentoj el amika landeto en la Meza Oriento eliris al Aglolando ne, kiel kutime, por kolekti monon, sed por akiri informojn. La ĉefa celo de la teamestroj en la spiona ludo ŝajne estas certigi, ke iliaj ludantoj revenas hejmen. Samtempe la aliaj teamoj strebas por rekruti spertajn ludantojn de la aliaj landoj, uzante diversajn persvadilojn. Do ĉiam, kaj notinde en 1985, estis vigla marĉandado pri interŝanĝo de kaptitaj ludantoj.

### Trinkaĵoj

Ne-esperantista filozofo iam diris, ke ne gravas se du diplomatoj ne parolas la saman lingvon, se ili scipovas trinki la samajn trinkaĵojn. Certe la trinkado estas grava internacia sporto, kaj estis gravaj problemoj en 1985 sur tiu kampo.

Ekzemple, la internacia trinkaĵo Kokakolo perdis terenon en sia batalado kun Pepsikolo, rivalo en Ursolando kaj pretendanto por la tutmonda ĉampionado. Preskaŭ senesperaj, la kompaniestroj de Kokakolo decidis forlasi la antikvan recepton kaj uzi novan formulon. La spionoj de P.K. ne penetris la sekreton. Nenese, ĉar ĝi ne altiris trinkemulojn. La ĉefoj de K.K.K. en Atlantiko decidis reenkonduki la antikvan formulon, sed bedaŭrinde ĝi estas tiel sekreta, ke oni ne certas ĉu ĝi estas nun la reala aĵo.

Dum multaj jaroj la ursianoj strebis penetrigi vodkon en la diplomatiajn rondojn. Sed en 1985 la vodkoindustrio suferis severan baton. La registaro de ursolando decidis, ke necesas malstimuli la trinkadon de stimulaĵaj drinkaĵoj. Dum longa atendado en serpentoj en la strato oni nun ne rajtas drinki vodkon. Ĉar ursoj estas bonaj lingvistoj kaj komprenas la likvidajn konsonantojn ili rapide lernis fabriki ĝinon per seka lo! Oni ankaŭ povas fari ĝin per terpomoj en somero kun junipermeso. Sed la

dilemo restas: oni ne povas stari en serpento sen alkoholo kaj oni ne povas aĉeti alkoholon sen stari en serpento. Nur veraj diplomatoj povas kvadratigi tiun diplomatan cirklon!

En la mondĉampionado de trinkaĵoj la skota viskio (kvankam nature kosta!) restis relative sukcesa, dank' al la lojaleco de la brutoj al sia nacia botelo, kaj la valoro de eksportoj de viskio al la bruta kaso aŭ sako. Sed la reputacio de la vino multe suferis. Kelkaj aŭstriaĵoj aŭ aŭstraliaĵoj vinfabrikantoj malkovris, ke oni povas fabriki pseŭdovinon uzante dietilenglikolon tre malmultekostan kemiaĵon, anstataŭ la sukeron, kiun uzas la frankoj, algoj kaj aliaj tradiciaj fabrikantoj. Kiam la loĝantoj de KriZantemio rimarkis la trompon la aŭstriaĵoj, aŭ aŭstraliaĵoj disigis la onidiron, ke estas la aŭstraliaĵoj, aŭ aŭstriaĵoj kiuj fabrikis la falsan vinon. Estas la sorto de ambasadoroj de kangarulando esti kulpitaj pro la misfaroj de siaj venenaj kolegoj!

Tio, kio estas certa, estas, ke la Portanoj decidis, en 1985, kapti la tutmondan merkaton por disvendado de sia fama verda vino. Tiu vino kaptis terenon super ĉio en Granda Britujo, kie oni tradicie forlavas la guston de blankaj kaj ruĝaj vinoj per glaseto da portovino post la maĝo. Sed ĝi progresis ankaŭ en Aglando, kie la regantaj cirkloj kondamnis ĉion ruĝan. La vinberejaĵoj de norda Portolando esperis, ke la eniro de la lando en la Eŭropan Komunumon malfermus okazojn por kreskigi vendojn. Kaj kompreneble oni vendos verdan vinon en Esperantujo!

En tiu lando de Fabeloj kaj Fantazioj, dum la 70-a Universala Kongreso en Aŭsburgo oni trinkis pli da bruna biero ol da verda vino. Tio plaĉis al la aŭsburgaj organizantoj, kiuj tamen ne ricevis invitojn al la oficiala festo aranĝita de la Urbestro en la Urbdomo. La bavaroj devis atendi la Oktobran Feston en Munkeno, kiu logike okazas en Novembro. La Verdstelanoj ne nur drinkas ĉiujn drinkaĵojn sed ankaŭ parolas komunan lingvon, miksaĵon de la zamenhofa Esperanto kaj la neologismoj de la poetoj. Tiel ili daŭrigis sian kutiman diskutadon pri la geografiaj nomoj vane urĝante, ke la Akademio elpafu sian saĝon.

—R.L.

## Ni estu prudentaj

Responde al Bill Clarke en "AE", aprilo-majo, 1986, mi volas diri, ke li atente tralegu la respondon 47 en "Oficiala Gazeto" sur paĝo 291, represita en "Lingvaj Respondoj" de L. L. Zamenhof, redaktitaj de Gaston Waringhien. En tiu libro la respondo 18 B estas, ke Zamenhof konsilas uzi por ĉiuj novaj landoj, ekz. amerikaj kaj ankaŭ por Aŭstralio, la nomon internacian de la lando, ekz. Kanado: por la loĝanto de la lando li konsilas "Kanadano", ĉar morale decas, ke la enloĝantoj estu nomataj laŭ la nomo de la lando. Male, en la malnovaj landoj, kiel Egiptujo, la landoj en Eŭropo kaj Azio, la lando estu nomita laŭ la ĉefgento loĝanta tie. Tial ni devas diri "dano", tio estas ja la ĉefgento loĝanta en Danujo kaj la landon ni nomas "Danoj" aŭ "Danlando", ĉar ĝi prenas sian nomon laŭ la ĉefgento.

Laŭ Lorens Friis, fama dana Esperanto-instruisto, oni neniam povas diri "polano", "norvegano" ktp. Oni diru aŭ "polo" aŭ "polujano", "norvego" aŭ "norvegujano".

La diferenco inter "polo" kaj "polujano" estas, ke "polo" naskiĝis en Polujo, dum "polujano" estas persono kiu loĝas en Polujo, sed povus esti germano, ruso, ktp.

Mi esperas, ke tio iomete klarigas al Bill Clarke.

—BOB FELBY.

## AŬSTRALIA= =KRONIKO

• **ADELAJDO:** Nia junia kunveno okazis en la kvakera kunvenejo, en Norda Adelajdo. S-ro Max Wearing raportis pri vizito al Brisbano, Kanbero kaj Melbourne, kaj pri renkontiĝoj kun lokaj esperantistoj.

Ni kunvenas ĉiujn 2-an london de la monato, sed kelkaj samideanoj ankaŭ renkontiĝas ĉiusemajne en la hejmo de S-ino van den Boogaard por distro kaj konversacio.

—LLOYD H. NOBLE.

• **MELBURNO:** La Aŭstralia Anarkista Centjara Jubilefesto okazis de la 1-a ĝis la 4-a de majo en Melbourne; partoprenis ĉ. 1000 homoj, pluraj el eksterlando. La antaŭfesta broŝuro estis presita parte en Esperanto, kaj unupaĝa artikolo pri Esperanto aperis en la anarkista gazeto "Libertarian Workers Bulletin". Ĉe la festo mem okazis malgranda diskutado pri Esperanto, kiun ĉeestis 6 personoj. Tamen, multaj aliaj homoj aŭdis pri la internacia lingvo kaj agnoskis ĝian uzindecon, kaj kelkaj el ili volis esperantiĝi.

Dum la plena sesio de la festa konferenco okazis memorinda evento: franca anarkisto, penante sensukcese angliĝi siajn pensojn, ekkriis: "Aĉa angla lingvo!" La amaso ekridis kaj aplaŭdis lin. Li aldonis: "Ni lernu Esperanton!" Ni daŭrigu la poresperantan laboron en anarkista medio.

—WILL FIRTH (Kanbero).

—ooOoo—

Plej elstara kunveno en la Esperanto-Domo dum junio estis prelego pri Argentino. Hugo Sereno, nova lernanto, gvidis nin per interesaj filmoj tra Patagonio kaj la sudaj regionoj de Argentino.

Je 7-a de julio Marcelo Leereveld parolis pri sia lastatempa vizito al Jugoslavio, kiun li ilustris per kolorplenaĵaj diapozitivaj.

• **MANLY:** Vendredon, la 6-an de junio la "Manly"-Klubo festis sian 25-an datrevenon en la "Manly Pacific International Hotel". 67 membroj kaj gastoj ĝuis tre sukcesan vesperon aranĝitan de Marjorie Duncan. S-ro Ralph Harry estis la honorgasto kaj Robby Robertson estris la programon.

Dum ege bongusta festmanĝo Ralph Harry faris interesan paroladon kaj kelkaj malnovaj "Manly"-anoj mallonge parolis.

Poste trupo de bele vestitaj gedancistoj prezentis internaciajn dancojn kaj Arthur Cocking gvidis malnovmodan dancadon.

La 17-an de junio ni estis feliĉaj bonvenigi Beatrice Clarke de Anglio al nia klubkunveno.

Marjorie Duncan forflugis al Britio por viziti parencojn. Se necese, oni povas

kontakti ŝin ĝis la 5-a de septembro ĉe 27 Richmond Park Ave., Bournemouth, BH8 90L, England.

—EUNICE GRAHAM.

• **SIDNEJO:** 19-an de majo okazis "Ronddiskuto": "La plumo estas pli forta ol la glavo". M. Chaldecott opiniis, ke ĉar per la plumo oni surpaperigas ies pensojn kaj vortojn, oni povas egale konsideri la modernajn ilojn (sonbendilojn, skribmaŝinojn) per kiuj oni povas kapti pensojn kaj vortojn. Oni ne povas dubi, ke la plumo/sonbendilo estas pli forta ol la glavo. Sylvia Burkitt havis alian ideon: Sen la plumo, ĉu ni nun scius la pensojn de gravaj pensuloj kiel Einstein, Diogenes, ktp?

Legante el jurnalaj (26/5) M. Chaldecott trovis amuzan poemeton en "Monato", en kiu ĉiu mallonga linio finiĝis per la silabo "ata". Seriozaj legaĵoj temis pri la malpermeso por SAT organizi kongreson en Pollando kaj ke la LKK de la UEA-kongreso eksigis. Semajnon poste ni diskutis pri "Ĉu simboloj/emblemoj estas pli gravaj ol tio kion ili reprezentas?" Unu klubano konfesis, ke li fort-ranĉis parton de la aŭstralia flago, kiu havis la kristanajn krucojn. Li ne diris kial.

—M. CHALDECOTT.

• **KANBERO:** Ĉiun lundon, post duni-vela instruado, sekvas interŝanĝo de novaĵoj kaj vespermanĝo. Robin Bailey sendis belan poŝtkarton dum sia vojaĝo en Nov-Zelando, kie ŝi vidis anoncon pri Esperanto en junulgastejo.

Will Firth instruas grupeton marde, kaj Jack Walters aktivas inter Kvakeroj, per anoncoj, broŝuroj kaj paroladoj. "Canberra Times" enhavis (11/6/86) kvarkolumnan artikolon "New Chance for Esperanto". Marj Ellyard kaj Rolf Harry reprezentis K.E.K. en la Jubilea Bankedo en Manly.

Kanberanoj jam aĉetis 20 ekzemplerojn de "Esperanto en Aŭstralio" kaj preparas por la Jubilea Konferenco historian dramon: "La Esperanto-kverko de Gdansk".

—RALPH L. HARRY.

## EL LA FEDERACIOJ

• **Kvinslande:** Kontentiga novaĵo estas, ke la 27-an de junio komenciĝis oksemajna Esperanto-Kurso ĉe Nerang

(Ormarbordo). Organizis tiun kurson Kevin O'Brien kune kun Arthur Deutscher, kiu instruas la klason. Je la fino de la kurso anoj tiam pripensos starigon de loka grupo; sendube la Federacio de Kvinlando helpos tiurilate.

—RAY ROSS.

## NEKROLOGO

**Doris M. Sinclair** forpasis la 28-an de junio ĉe Nambour kaj estis private kremaciita la 2-an de julio. Ŝi esperantiĝis dum la mezsesdekaj jaroj ĉe Redcliffe kaj fariĝis la unua prezidanto de la "Sunshine Coast" E-Societo. En 1970 ŝi iĝis fondprezidanto de la Kvinlanda Federacio kaj certigis stabilan fundamenton por la Federacio dum la sekvantaj jaroj: en 1983 ŝi elektiĝis dumviva membro de la Federacio. Ŝi estis dumviva membro de A.E.A. kaj U.E.A. kaj estis UEA-delegito por "Sunbrila Marbordo" de 1970 ĝis 1986. Ŝi ĉeestis plurajn AEA-Kongresojn kaj estis estrarano de A.I.E.A. de 1966 ĝis 1978. Doris estis fervora esperantisto ĝis la fino; inter ŝiaj lastaj vortoj estis la jenaj: "Mi kredas, ke estas loko en la postvivo por esperantistoj kaj mi antaŭrigardas la renkontiĝon kun samideanoj". Ni tributas al la multjara laboro por Esperanto fare de Doris kaj samtempe ni omaĝas al la memoro de vera sinjorino.

—RAY ROSS.

• **VIKTORIO:** 15 anoj de la Federacio partoprenis, 31-an de majo, viziton de la Art-Galerio, helpate de oficiala gvidanto. La interesa ekskurso finiĝis per posttagmeza teo en ĉina restoracio en la Urba Placo.

La tempo flugas, kaj estas grave, ke niaj institucioj ne perdiĝu en la polvo de la akumuliginta pasinteco. Preskaŭ lastmomente por la historiistoj aperis ĉi tiu tre detala, plenpleska historio. Ĝi evidente bezonis jarojn da prilaborado kaj multcent horojn da preparado. Ĝi estas faktolibro, ne legolibro. Kiel telefonlibro, ĝi servas por trovi tion, kion oni volas scii; kvankam, se oni legas rekte de la unua paĝo ĝis la lasta, oni multon lernas.

Ĉiu Esperanta evento en la Aŭstralia Esperantohistorio trovas sian lokon ĉi tie. Kaj kiu deziras legi la detalojn de sia propra grupo povas fari tion facile kaj senpene, kaj laŭ mia konstato, plene. Kiom da pionirlaborado okazis en nia lando! Nur legu kaj miru.

—DONALD BROADRIBB.

• **IOM PRI LA MENSA SINPREPARO** de Inĝ. Jindrich Novak kaj Inĝ. Ivan Špička; eldonis: Ĉefia Esperanto-Asocio (Jiiska 10, 11001 Praha 1, Ĉeĥoslovakio).

Plejofte, al studentoj de la sindefendaj artoj, la instruistoj asertas "Ĉi tiu studinda arto ne estas trukaro, ĝi baziĝas sur fundamenta filozofio. Unue vi studu la teorian fundamenton, poste vi pli bone ellernos." Tiu estas nemalhavebla admono, sed okcidentulo ofte trovas, ke la filozofioj de la orientaj landoj kaj kulturoj estas nur malfacile kompreneblaj aŭ eĉ kontraŭas la pensmanierojn de la eŭropanoj. Nu, per ĉi tiu eta sed valora libro, la du inĝenieroj Novak kaj Špička prezentas filozofiajn ideojn per inĝenieraj kaj inĝenieraj klarigoj.

Unue estas necese difini la lingvon uzotan, kaj distingi inter "sinpreparo" kaj "sinpretiĝo", ekzemple multaj homoj dum siaj sesdekaj jaroj estas pretaj emeritiĝi, sed kelkaj ne preparas. La verkistoj klarigas ideojn per analogo pri ŝoforo, kiu bone scipovas funkciigi kaj stiri aŭtomobilon, sed ne ĉiam sin preparas por agado, aŭ simpla preterpaso de unu kamiono sur ŝoseo, aŭ komplika transiro de la ĉefurbo dum posttagmeza trafikulkulmino. Tiu estas ne nura analogo, ĉar la sinpreparo, klarigita de la du verkistoj, rilatas al ĉiuj agadoj de la ĉiutaga vivo, ne nur al sindefendo. Cetere, veturante en trafikulkulmino oni sin trovas en sindefenda situacio, ĉu ne?

## RECENZOJ

• **Esperanto en Aŭstralio (1905-1985) (Historio de AEA).** Kompilita de Ray Ross, Brisbano, 1985. 117p., broŝ. Prezo; \$10.50 (Por AEA-membroj \$8.00 ĝis 31-12-86).

Post kelkaj monatoj Esperanto aĝos 100 jarojn, kaj en 1989 Esperanto en Aŭstralio jam aĝos cent jarojn! Kiu scias, ke la movado en nia lando seninterrompe ekzistas jam de tiam?

Tamen, ne ĉiuj el la legantoj de la libro kutime ŝoforas en aŭtomobilo.

La klarigoj de "funkcii informa matrico" (FIM), la "kadrocelo" kaj la "fincelo", kun diagramoj de "nigra skatoloj por ilustru tiujn esprimojn, bone efikas al kleruloj en sciencaj fakoj, kiel mi, sed kredeble timigos la anojn de aliaj kulturoj.

Ĉapitroj pri medito kaj sinkoncentrado estas bone prezentitaj. Mallonge, al mi ĝi estas bona kaj utila libro, ĉar mi apartenas al simila medio kiel Inĝenieroj Novak kaj Špička. Multaj aliaj libroj estas troveblaj pri la filozofioj de la sindefendaj artoj, sed tro ofte ili kaŝas la filozofion per t.n. "klarigo", kiu efektive estas nur "nebuligo". Ne tiel Noavk kaj Špička. —R. G. ROBERTSON.

• **LEGINDA POEMARO:** Aperis antaŭ nelonga **Du el**, kolekto de poemoj de Marjorie Boulton, probable nia plej talenta poetino, kaj Poul Thorsen, konata dana verkisto. La titolo estas sukcesa vortludo: ĝi memorigas pri unu el la plumnomoj de Zamenhof, **Unuel** (unu el multaj), sed la rapiro sur la kovrilo penigas pri **duelo**. Ne tute trafe, ĉar, kontraŭe al **Rimleteroj**, en kiu Marjorie duelis pri ideoj kun William Auld, tiu ĉi nova volumo konsistas el du senrilataj poemaroj.

La poemoj de Marjorie perdis iom el la persona pasieco de pli fruaj volumoj ŝiaj; la pasio celas nun politikajn maljustaĵojn, la atingojn de amikoj kaj, ĉiam denove, la verkon de Zamenhof. En la meza sekcio, "Ame", elstaras serio da ampoemoj, kiel oni estus verkinta ilin en diversaj historiaj epokoj; nur intima konanto de la poezia evoluo kapablus tian etan majstraĵon. La lasta sekcio trafe nomiĝas "Ridete"; abundas spritaĵoj.

Same ni trovas ĉe Poul Thorsen kaj seriozaĵojn kaj spriton. Al mi plej plaĉas lia "Geopoezio". La vojaĝanto paŭzas tie kaj tie dum ĉirkaŭmonda "ahasverado" kaj per iuj strofoj provas esprimi la etoson de la loko; en Alice Springs Poul verkis "Rande de la mondo" pri la sorto de niaj indiĝenoj — kiu el ni aŭstralianoj

povus tiel trafe priskribi la situacion? Limerikoj, aforismoj kaj karamboloj kompletigas ĉi tiun tre kontentigan libron. Mi planas uzi ĝin dum la literatura kurso en Armidale en januaro.

—TREVOR STEELE.

\$21.05 de la AEA-Libroservo.

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1986

Antaŭe raportita .....	\$256
Ges-roj E. Tronerud, Kenmore, Q.	10
S-ino Madeline Eden, Ravenshoe, Queensland .....	5
Capricorn Coast E-Club .....	20
S-ro John Moore, Emu Park, Q. ....	10
S-ro Kevin O'Brien, Sorrento, Q. ...	5
S-ro Malcolm Moore, Manly .....	10
F-ino Eva Trainor, Melbourne .....	10
S-ino M. Williams, Ravenswood, Vic. ....	10
S-ino Patti Anson, Kanbero .....	20
S-ino Doris Morrison, Wonthaggi, Vic. ....	10
F-ino Barbara Williams, Melbourne	20
S-ino Val Fotheringham, Melb. ....	8
S-ino Eunice Graham, Manly .....	20
S-ino Janet McClelland, Manly .....	10
S-ino Irina Timonim, Manly .....	10
D-ro A. J. Walters, Kanbero .....	10
S-ino E. Toth, Meelbourne .....	6
	<b>\$450</b>

**When making a Donation to this Fund, please specify "For the 'A.E.' Support Fund". Otherwise your Donation might not reach the Fund for which it was intended.**

Juĝisto: Ĉu vi estis sola kiam vi ŝtelis tiujn objektojn?

Ŝtelisto: Jes, sinjoro juĝisto, ĉar oni neniam scias, ĉu la kamarado estas honesta.



# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)  
Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 235 (315)

MELBURNO

Septembro, 1986

## LA 71-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

okazis inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto, 1986 en Pekino, Ĉinio. Ĉe la fermo de la kongreso, UEA-sekretario D-rino Flora Szabo-Felso anoncis, ke 2482 ge-esperantistoj el 54 landoj aliĝis al la kongreso, kiu estas la plej granda Esperanto-kongreso iam organizita ekster Eŭropo. Ĝi estis ankaŭ la plej granda internacia kongreso, kiu iam okazis en Pekino. Kiom da kongresanoj fakte partoprenis ni ne povas anonci en la nuna momento. Tiun ciferon ni nur ricevos en kelkaj semajnoj de la UEA-Centra Oficejo.

**AL LA NOVA ETAPO** nomiĝis ĉi-foje la oficiala Kongresa Kuriero, kiun ĉiu kongresano senkoste ricevis ĉiumatene. Tio estis la titolo de ĉina E-informilo, kiun s-ro Chen Yuan, nuna vicprezidanto de la Ĉina E-Ligo, redaktis en la jaroj 1937-1938. Ĝi aperis sesfoje dum la kongres-semajno.

Je la 25-a de julio estraranoj de UEA aranĝis akcepton por ĵurnalistoj. Al tiu akcepto 44 novaĝ-agentoj kaj ĵurnaloj sendis siajn raportistojn. Inter ili estis ĵurnalistoj el Japanio, Usono kaj Hungario.

La 27-an de julio okazis la Solena Inaŭguro de la Kongreso en la granda Ĉina Teatrejo. Ĝi komenciĝis per "La Espero", fiore kantita de 70 bulgaraj kaj ĉinaj esperantistoj en naciaj kostumoj. UEA-prezidanto Gregoire Maertens prezidis la inaŭguron. S-ro Huang Hua, la vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso kaj alta protektanto de la Kongreso, salutis la kongresanojn. Li diris, ke Esperanto mem estas granda idealo, granda strebo kaj ankaŭ granda praktiko. Ĝia centjara ekzisto kaj disvolvigo plene montras ĝian fortan vivpovon. Li konfesis, ke la kontribuo de Ĉinio al Esperanto estas nek tiel granda nek impona, kiel lando kun vasta teritorio kaj multa loĝantaro devus fari.

Rilate al la kongresa temo "**Interkompreniĝo, paco, evoluo**", li diris, ke ĝi estas ege trafa. Ekde la naskiĝo Esperanto ligiĝis kun pacaj idealoj. La nuna Kongreso estas aparte signifa kiel unu el la gravaj aktivadoj de la Internacia Jaro de Paco.

La kongresanojn forte inspiris, ke la vicurbestro de Pekino, s-ro Chen Haosu, salutis la Kongreson parte en Esperanto por montri sian grandan simpatian al nia lingvo.

Post la parolado de la vicurbestro estis paŭzeto, dum kiu fama juna bivistino He Shufeng plezurigis la kongresanojn per ludado de ĉina klasika komponaĵo.

Sekvis la salutoj de diplomaciaj reprezentantoj, inter kiuj la ambasada konsilisto de Pollando parolis tute en Esperanto kaj ricevis varman aplaŭdon.

UEA-vicprezidanto D-ro Humphrey Tonkin faris prelegon pri la kongresata t. mo "interkompreniĝo, paco, evoluo".

Posttagmeze okazis la Malfermo de la Kongreso, dum kiu la landaj reprezentantoj salutis nome de siaj Esperanto-asocioj. Por Aŭstralia salutis UEA-Cefdelegito Sylvia Burkitt. Ŝi diris: "Mi parolas nome de ĉiuj aŭstraliaj esperantistoj, kaj mi deziras por niaj ĉinaj samideanoj ĉiujn bondezirojn por la kongreso kaj pri la popoloj tra la tuta mondo feliĉon kaj pacon por ĉiam".

Aŭstralion bone reprezentis 25 partoprenantoj — 10 el Okcidenta Aŭstralio, 7 el Viktorio, 6 el Nova Sud-Kimrio kaj po unu el Tasmanio kaj Kanbero.

La 28-an de julio, s-ro Huang Hua, la Vicprezidanto de la Ĉina Popola Kongreso, akceptis parton de la kongresanoj en la "Popola Halo", la ĉina parlamentejo, kaj regaligis ilin per luksa bankedo. En sia parolado li denove laŭdis la trafekon de la kongresata t. mo "interkompreniĝo, paco, evoluo".

La Popola Halo estas loko, kie oni okazigas la plej gravajn kunvenojn kaj akceptas la plej honorajn gastojn de la ŝtato. UEA-prezidinto Gregoire Maertens kaj la nove elektita prezidanto D-ro Humphrey Tonkin dankis kaj diris, ke ili alte apreas la subtenon kaj bonan kunlaboron de la ĉina registaro kaj tustis al la vivo de Ĉinoj kaj Esperanto.

#### La nova estraro de U.E.A.

Prezidanto: D-ro Humphrey Tonkin (Usono)

Vicprezidanto: Yosimi Umeda (Japanio)

Gen. Sekretario: Flora Szabo-Felso (Hungario)

Eksteraj Rilatoj: Gregoire Maertens (Belgio)

Interna agado: Jean-Louis Texier (Francio)

Financoj: Victor Sadler (Nederlando)

Komitatano: Barbara Despiney (Francio)

Komitatano: Diccon Masterman (Britio)

La Universala Medicinista E-Asocio okazigis sian 25-an jarkunvenon. Medicinistoj el 8 landoj pridiskutis la enlandan medicinan agadon por kaj per Esperanto. Ili speciale pritraktis la financon staton de UMEA kaj proponis rimedojn por plua apero de la "Medicinista Internacia Revuo" kiel altniveia scienca eldonaĵo.

Kvindek unu fervojistoj el 15 landoj partoprenis fakkunvenon. S-ro Istvan Gulyas (Hungario) raportis pri la organizo kaj evoluo de IFEF kaj ties ĉi-jaran Kongreson en Skopje (Jugoslavio). Li laŭlegis leteron de la IFEF-Prezidanto Joachim Giessner en kiu li esprimis sian bondezirojn kaj proponis la aliĝon de la ĉinaj fervojistoj. S-ro Gulyas prelegis pri estonteco de la eŭropaj fervojoj. Josef Weidacher (Germanio) prelegis pri la plej modernaj germanaj trajnoj. La ĉina delegito Li Shen salutis la kunvenon kaj donacis al ĉiuj partoprenantoj ĉinan fervojistan insignon.

**LA "PEKINA GORĜO"** Pluraj aŭstraliaj esperantistoj revenis hejmen kun la t.n. "Pekina Gorĝo". Tio estas mala-grabla inflamiĝo aŭ raukeco de la gorĝo, kvazaŭ laringito, ofte okazinta post vizito al la Granda Muro. Tiun malsaneton suferas ne nur eksterlandaj vizitantoj, sed ankaŭ la loka popolo. Oni konsideras, ke la kaŭzo estas polvo en la aero. **Aŭstraliaj Partoprenantoj estis:** Margaret Chandler, Bob Clarke, Len Eddington, Idyss Einihovici, Kay McCashney, D-ro John Mills, Vera Payne, Edwin Powell, Lorraine Powell, Dulcie Sawkins (ĉiuj el Okcidenta Aŭstralio); Shirley Betts, Errol Chick, Val Fotheringham, Joe Lanji, Gerald Tumman, Ruth Tumman, Margaret Warr (ĉiuj el Viktorio); Sylvia Burkitt, Margaret Chaldecott, Betty Hart, Teresa Metherell, Bess Scott, Les Scott (ĉiuj el N.S.K.); Marj. Ellyard (Kanbero), Clive Bennett (Tasmanio).

—ooOoo—

**DANKON** al Sylvia Burkitt, Ruth Tumman, Les Scott kaj Errol Chick pro provizo de kongres-novaĵoj; ankaŭ al Svetislav Fanaĉki, kiu "kaptis" por ni rad'o-disaŭdigojn de "Radio Pekino". —

— HERBERT KOPPEL.

## GEOGRAFIAJ NOMOJ

Dum la pasintaj 13 jaroj mi aktive serĉis solvon de la problemoj de landnomoj en Esperanto. En 1973 mi devis kompili por "Aŭstralio: koncizaj faktoj" liston de la landoj, kie situas aŭstraliaj reprezentantoj. Mi verkis principojn, kiujn sekvu reprezentanto de registaro, kiu devas uzi esperantajn landnomojn. En 1981 mi preparis la flugfoliojn "Invito el Aŭstralio" en kiu aperis aŭstraliaj kaj aliaj geografiaj terminoj. Post raporto al la 23-a Aŭstralia Kongreso, mi proponis al la Akademio de Esperanto, ke ĝi preparu liston de la membroj de Unuigintaj Nacioj, kiun mi povus prezenti al tiu organizado. Mi mem proponis liston de 151 landoj, kaj komencis korespondadon kun la spertuloj — Tibor Sekelj, kaj Akademiano Andre Albault. La 24-a Aŭstralia Kongreso subtenis mian peton al la Akademio en 1984, kaj mi submetis reviziitajn proponojn al Akademiano Eichholz, kiu eldonis ilin en "Akademias Studoj", 1985 (E558). Subtenis ilin kelkaj juristoj.

La esenco de mia propono estis, ke la Akademio aprobu ekzistantajn "-io" formojn, kiel substantivajn radikojn, ke "-io" estu simple la finaĵo de radikoj, ke oni uzu la serion "albano, afgano, bulgario, ĉino . . ." por la nomoj de anoj de gentoj, sed, ke por ŝtatanoj oni ĉiam aldonu la sufikson "ano" al la nomo de la ŝtato, ĉu tiu nomo finiĝas per "lando", "io" aŭ simpla "o".

Kiam la Akademio, fine de 1985, eldonis siajn rekomendojn, mi demandis al la Prezidanto (resumite):

1. Kia estas la signifo de la radikoj, al kiuj oni aldonas la sufikson "-io"?
2. Kiel oni scias, ke la "-io" estas sufikso kaj ne parto de radikoj?
3. Kial ne distingi inter gentano kaj ŝtatanano aŭ civitanano?
4. Ĉu "-io" estas Esperanta sufikso aŭ internacia etimologia finaĵo?

Jen la respondoj de la Prezidanto de la Akademio:

1. "Io" estas ĝenerala sufikso, kiu indikas (nomas) teritorion konkretan aŭ abstraktan: diplomat-io (Fundamento), demokrat-io . . . Boliv-io, Aŭstral-io, German-io. Do nur escepte ĝi aldoniĝas

al radikoj signifantaj ĉefgenton. Sed kompreneble oni devas lerni, ke Bolivio estas teritorio, kiu ricevis tiun nomon honore al Bolivar ktp ktp. kaj ne pretendi, ke Kolomboj vivas en Kolombio . . . kio cetere estas tre hipokrita sinteno: ĉiuj jam konas tiujn nomojn el sia denaska lingvo, se nur ili iomete lernis geografion. Se ili ne lernis, ili do aĉetu atlasojn. Principe la landnomoj en "-io" devus esti identaj al la nomoj, kiuj estas per si mem internaciaj. Bedaŭrinde estis ekdiritaj tiom da stultaj trajtoj la jaroj, estas defendataj tiom da dogmoj pri la landnomoj, ke tiuj nomoj estas rompigitaj kaj frakasitaj en siaj formoj kaj signifo. Aŭstro ne ekzistas, ĝi estas ventodirekto. Jam de longe la Aŭstria E-Instituto konsilas diri: **Aŭstrio, Aŭstrianoj**; ŝajna escepto estas la historia nomo Aŭstro-Hungario. Brito estas falsa nomo por Britano de kiu simple elfluas Britanio konata de ĉiuj (eĉ de la Britoj); sed jen! ĉu venos kuraĝuloj por reuzi tiun nomon iam uzatan? Por mi, **Jugoslavo** estas loĝanto de Jugoslavio. Iuj diras, ke oni devas diri Jugoslavianoj; jes, sed laŭ la tria Rekomendo ambaŭ vortoj havas la saman signifon.

Cetere al tiuj, kiuj pliploras la neekziston de unuklasa sistemo, mi povas indiki simplan solvon. Al la internaciaj i-nomoj, oni simple aldonu "-anoj": El Italio oni ricevas "Italianoj"; ĝi signifas tion saman kiel Italoj. Sed la stato de la nuna lingvo ne estas tia . . . ĉar oni diras nur Italoj, Italio. Evidente ni havus sistemon pli proksiman al la Angla: Bulgarioj - Bulgarians Sed atentu! mi ne diras, ke oni faru tiel; mi nur diras, ke ŝajnas al mi, ke la Akademio povus toleri tion. Dum la propono de S-ro Clarke diri Kubio estas netolerebla: ĝi eĉ kontraŭas la kvaran rekomendon.

2. Pri via dua demando "kiel oni scias, ke -io estas parto de la radikoj"? Nu! oni devas lerni, same kiel oni lernas, ke Germano kaj Hispano ne estas anoj de Germa kaj Hispa, eble urbo, religio: kial vi volus ke ili estu landoj?

Tiel same, kiel do oni sciu, ke Kanbero estas radika nomo? Ĉu ĝi prefere ne estus la ero de ia Kanbo? Kaj Melburno? Ĉu ĝi estas la urno de ia Melbo, eble de

la Melba persiko de la Francaj restoracioj? Kaj Brisbano, ĉu ĝi estas la bano de iu S-ro Briso? Ĉiuj tiaj demandoj montras ĝis kia grado la E-istoj aliras, kun mistiko kaj kun ia reserĉo pri magio, la demandon de landnomoj. Kaj tamen mi povas respondi, ke sufiĉas scii, ke la nomo Algerio estis kreita iaŭ la nomo de la ĉefurbo: Alĝero, kiu mem devenas de la Araba nomo al-gaza 'ir (= la insuloj); cetero la Latina nomo Icosium estis samsignifa kaj estis de Punuka deveno. Do se Algerio devenas de urbonomo, ĝi ne devenas de popolnomo. Por Aŭstralio, nu supozeble ĉiu Aŭstraliano scias pli bone ol mi, ke la nomo signifas aŭstrala (sudhemisfera) lando: jam en la 16-a jc. oni komencis supozi la ekziston de iu "Terra australis" (aŭstrala tero); sed nur pli poste iu proponis la nomon Australia. Esperanto — kiel ĉiam devas esti la kutimo — simple transprenis la nomon; ĝuste kiel pli true faris ĉiuj lingvoj . . . Pri Ĉilio ne ekzistas sufikso. Hispano oni diras Chile; multaj lingvoj imitas. Iom pli multaj tamen diras Chili diverse ortofraita: la "e" aŭ la "i" simple apartenas al la radiko kaj havas nenian apartan signifon. El la internacia radiko ĉili oni ekhavas sen klopodo la nomon Ĉilio. Iom simila estas la Finna nomo por Finnlando: Suomi; tie la "i" ne estas la sufikso por landoj kiu estas "ia" en la Finna (ekz-e, Italia . . .) sed nur neŭtrala finaĵo, iom same kiel "e" en la Franca. Do se Esperantigi tiun landnomon, ĝi estus Suomo (kun Suomanoj = Suomalainen).

Al demando mi respondu per alia demando: kiel nomiga la loĝantoj de Geranio? Ĉu per anoj aŭ per simpla radiko sen "-i"?

3. Pri la loĝantoj, civitanoj, fremduloj, travojaĝantoj de difinita lando oni simple diru: Franco loĝanta, travojaĝanta, deziranta ricevi la civitanecan en Aŭstralio. La kazoj pri deziroj, pri faktoj, la administracioj kaj iliaj postuloj estas multe tro multifacetaj, ke tio estu esprimebla per afiksoj; aŭ necesus inventi specialajn sufiksojn m'l kaj unu, kaj versaĵne tio ne kovrus ĉiujn eblajn kazojn, ĉar la homo estas tro ŝanĝigema, vojaĝema, inventema, ke vi povu enpreni tion en afiksoj. Aŭstraliano estas simple ano de Aŭstralio, same kiel Franco estas ano de Francio. Se la rilatoj pli kompleksas oni **eksplicitu ilin.**

En la komencaj jaroj en E-o, Zamenhof inventis unuklasan sistemon mirinde bonan; Amerikoj loĝis en Amerikujo same kiel Holandoj en Holandujo. La sistemo estis tiel mirinda, ke Zamenhof forlasis ĝin antaŭ 1900. Tiam li komencis uzadi **Algerio** anstataŭ la antaŭan **Algerujo** (en kiu vivis Alĝeroj). Li plurfoje bedaŭris sian sufikson **ujo** kaj vane provis reenkonduki la internacian -i-: Homarismo, Projektoj de reformoj, leteroj pri neologismoj . . . Aliaj ekuzis -i- jam c. 1900. Vi komprenas, ke sekve okazis renverso de la nomenklaturaj; pere venis komplikaj pro diversaj dogmoj proponitaj de bonintencaj sed naivaj samideanoj, kiuj ne studis la demandon. Sekve okazis rompo kaj frakaso de multaj landnomoj, forme kaj signife. Hodiaŭ ne plu eblas fari subtilajn diferencojn kiel en la Fundamenta "Rusjanoj sed ne Rusoj". Unueco povas esti atingata nur sur la bazo de la 15-a Regulo de la Fundamento pri internaciaj vortoj. Tamen kun temperado (temperita = A. Temperate, moderate) favore al tiuj vortoj, kiujn ĉiuj uzas: ekzemple ĉiuj uzas Ĉinio kaj Japanio, nomoj tute ne ekzistantaj en naciaj lingvoj. Male oni trovas la landnomojn Ĉin-/Sin-/Sin- ktp sen sufikso -i- kaj same oni trovas nur la tri formojn (simplige!) Japon-/Japono-/Japan-: Malfeliĉe la Esperantistoj uzis la radikon **Japan-** kiu ekzistas nur en triono de la lingvoj, la strukturon J.....-io, kiu ekzistas en alia triono kaj do la formon Japanio, kiu ekzistas en neniu lingvo! Estus pli bone uzi la radikon Japonon (de Japon-kaj Japon-i-) kaj la strukturon sen afikso (kiel en Japon- kaj Japan- . . . Hodiaŭ preferinda estus la sinonimo Nipono, kiu krome estas uzata ekskluzive de Japanoj mem. Sed ĉar Ĉinio kaj Japanio estas uzataj de ĉiuj, ili estos la normaj nomoj laŭ la rekomendo Unua!

4. Al via kvara demando mi fakte jam respondis per la superaj konsideroj. Fakte la Akademio ne tranĉis tiun punkton. Iuj konsideras ĝin sufikso kiel la aliaj. Aliaj konsideras ĝin parto de internaciaj vortoj. Mi mem konsideras ĝin "nom-elemento" inter aliaj: Tanzanio estas trielementa vorto: Tan- (Tanganjiko), Zan- (Zanzibaro), I- (lando); ĝuste same kiel Benelukso: Be- (Belgio), Ne- (Nederlando), Lukso (Luksemburgo). Kaj

ni estus tre arogantaj dekreti, ke oni devas diri Beneluksio "ĉar tio estas pli logika" aŭ pro io alio. Aŭ male, ke estu Tanzano, pro . . . la samaj kialoj. Oni povus demandi al ni "kiuj do estas tiuj E-istoj, kiuj suverene decidas pri la nomoj de la ŝtatoj"? Nur la ŝtatoj decidas. Ni kontentigu modeste doni E-an veston al nomoj JAM EKZISTANTAJ.

Dume mi donis miajn opiniojn. La opiniojn de la Akademio legu en la nuraj rekomendoj. —A. ALBAULT.

—ooOoo—

Ni devos atendi la normigan liston de la Akademio antaŭ ol juĝi, ĉu la rekomendoj faciligos unuecon. Ŝajnas,

1. Ke en tiu listo ne troviĝos landnomoj kun "-ujo" sen alternativo.
2. Ke se oni ĉiam aldonos la sufikson -ano al la landnomo la Akademio tion toleros.
3. Ke estos uzataj aliaj landanonomoj nur se la "internacia" landnomo (finiĝanta per -io aŭ -lando) estas derivita el nomo de popolo aŭ gento, ekzemple Italio el Italo. Oni devos lerni kiuj nomoj havas tian originon.

Atendante la liston de la Akademio, ni sekvos la praktikon en la listo de la landaj perantoj. —RALPH HARRY.



### Oficialaj informoj de la Akademio de Esperanto

Post studo kaj propono de la Gramatika Sekcio la Akademio voĉdone akceptis jenan rezolucion:

#### Prepoziciaĵo por la Subjekta Suplemento

1. Post ita/ata/ota-vorto, la aganto estas indikata per **DE**. Ekz-e, ŝi estas amata de ĉiuj (6-a Regulo de la Fundamenta Gramatiko).
2. Post o-vortoj, **DE** povas indiki la aganton, se neniu alia koncernato estas ebla. Ekz-e, la kanto de la

birdoj, la projekto de la inĝenieroj (Fundamento), la parolado de la oratoro, k.s.

3. Por indiki la aganton post o-vorto en aliaj kazoj, la plej ĝenerale akceptita formo estas **FARE DE**. Ekz-e, la akcepto de la kongresanoj fare de la urbestro; la traduko de Hamleto fare de Zamenhof.

La Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko,  
Michel DUC GONINAZ

La Prezidanto, D-ro A. Albault



## 38-a IFEF-KONGRESO

Inter la 17-a kaj 23-a de majo, 1986 okazis en Skopje (Jugoslavio) la 38-a Kongreso de la Internacia Fervoĵista E-Federacio. Aligis 715 partoprenantoj el 18 landoj.

IFEF-Prezidanto Joachim Giessner (Germanio) malfermis la kongreson per bela festparolado. I. a. li emfazis, ke 1986 estis proklamita kiel "Jaro de Paco". La IFEF-slogano "Fervojoj ligas landojn, Esperanto popolojn" estas trafa priskribo de la esenco de la fervoĵista E-movado.

Dum la kongres-semajno IFEF-delegacio estis akceptita ĉe la fervoĵa direkto. La ĝenerala direktoro akcentis, ke la unuan fojon li akceptis tiel multnacion delegitaron, kiu parolas unu komunan lingvon, sen tradukistoj.

La terminara komisiono kunsidis; partoprenis 18 kongresanoj el 14 landoj. Unuanime estis akceptita invito por la 39-a IFEF-kongreso en KATOWICE (Pollando), de la 16-a ĝis 22-a de majo, 1987. Venontaj kongresoj okazos 1988 en Francio kaj 1989 en Hispanio.

Okazis festmanĝo kun internacia balo. En amika etoso okazis en la urbdomo

akcepto de la estraro kaj komitato ĉe la ĉefurbestro de Skopje.

Plej grava faka aranĝo estis fakprelego "Internacia transporta merkato de facile putrigemaj varoj, komuna aktiveco de eŭropaj fervojoj en kadro de la societo "Interfrigo". Post la faka prelego la polaj kolegoj prezentis diapozitivajn pri la venontjara kongresurbo Katowice.

—ELFRIEDE ERNST, BRUSELO.

## AŬSTRALIA- =KRONIKO

• **PERTO:** D-ro Donald Broadribb, redaktoro de "La Nigra Cigno", suferis en junio/julio rompitan kruron, sed li jam bone resaniĝis.

Multaj membroj vojaĝis al Pekino por partopreni la Universalan Kongreson. Pro tio kaj pro malvarma vetero, nur malmultaj anoj ĉeestis ĉe niaj kunvenoj. Dimanĉe, 29-a de junio, okazis pikniko en la hejmo de ges-roj Threlfall. Je la 2-a kaj 9-a de julio, Rene Smeets kaj Owen Loneragan estris du kurs-grupojn. Ĉeestis 13 kaj 19 membroj respektive.

• **ADELAJDO:** Pro la bonaj preparlaboroj de D-ro Peter Ellyard kaj Max Wearing ni povas anonci, ke S-ro Trevor Steele, el Brisbano, alvenos en Adelajdo en septembro por gvidi 9-tagan kurson ĉe TAFE, la organizo por "Teknika kaj progresna edukado".

La kosto por studentoj estos proks. \$65, sed nia Societo proponos subvenciojn por studentoj, kiuj ne povos pagi altan kotizon, ĝis maksimume \$250.

—LLOYD H. NOBLE.

• **KANBERO:** La klubo ne kunvenis en Julio kaj Aŭgusto, sed membroj kunlaboris pri diversaj projektoj.

Will Firth helpis Ralph Harry en la revizio de la historia dramo "La Kverko de Dancigo" por ebla prezento en la Jubilea Konferenco. Li ankaŭ verkis kelkajn poemojn. Jack Walters daŭrigis sian propagandagadon ĉe la Kvakera komunumo de Kanbero.

La Societo Goethe invitis la Prezidanton prelegi, en Aŭgusto, pri "Esperanto kiel Interpretilo de Germana Literaturo". Radio Stacio 2XX, kvankam ĝis nun ne

persvadita, ke ekzistas Esperantista Etna Komunumo, invitis nin prepari por Septembro programon pri la preparoj por la Jubileo de Esperanto.

Marj Ellyard vojaĝis en Julio al la U.K. en Pekino.

La Prezidanto akceptis inviton partopreni en la 6-a Dujara Kongreso de la Aŭstralia Federacio de Asocioj de Instruistoj de Modernaj Lingvoj en Adelajdo 5-9 Sept. Li prelegos en sesio pri "La Lingvoj de la Multkultura Socio de Aŭstralio kaj la Nacia Lingvo-Politiko".

Por inaŭguri la Printempan Trimestron la Klubo kunvenos, la 1-an de Septembro en la hejmo de Ges-roj Harry. Marj Ellyard raportos pri Pekino kaj sia vojaĝo. Oni prezentos redaktitan videobendon pri la partopreno de klubanoj en la Kongreso en Perto.

—RALPH HARRY.

• **SIDNEJO:** James Harwood (16/6) montris lumbildojn pri la Granda Marborda Ŝoseo en Viktorio, kaj parto de la Duoninsulo York en Sudaŭstralio. Ni vidis multajn historiajn lokojn, sed la rokoj kaj klifoj survoje estis belegaj.

Margaret Chaldecott (23/6) parolis pri "La Jaro de la Tigro". En la ĉina kalendaro, 1986 estas la "Jaro de la Tigro". Ŝi trovis, ke 1770 estis tigre jaro; ankaŭ la jaroj de la naskiĝo de kaj ŝia patro kaj de ŝi mem.

El eksterlandaj ĵurnaloj oni legis (30/6) paroladon de Brezhnev pri nukleaj armiloj; alia trovis artikolon de Konrad Lawrenz pri la malkreo de la mondo pro nukleaj armiloj, kaj la tria legis pri la venonta jahtkonkurso en Okcidenta Aŭstralio.

—M. CHALDECOTT.

• **MANLY:** La 29-an de julio la dua trimestro finiĝis en la Eduka Centro kaj la klasoj ne rekunvenos ĝis la 16-a de septembro, kiam la tria trimestro komenciĝos. Interterpe pluraj klasanoj kunvenas en privatigaj hejmoj kaj Helen Stone anstataŭas Marjorie Duncan kiel instruisto de ŝia nova matena kurso ĝis Marjorie revenos de Anglio, la 5-an de septembro.

Les kaj Bess Scott forflugis al Ĉinio por ĉeesti la mondkongreson tie kaj ni antaŭvidas interesan novaĵon kaj la kutimajn belajn lumbildojn kiam ili revenos.

Bonvenaj vizitantoj dum julio estis du

Pertanoj, Eric Hewitt kaj Gordon Gregson, kiuj ambaŭ partoprenis en la kursoj en la Eduka Centro.

—EUNICE GRAHAM.

• **TOOWOOMBA:** Honore al la malfermo de la Universala Kongreso en Pekino, membroj kunvenis por lunĉo ĉe "Picnic Point Restoracio" je sabato, 26-a de julio. Nia societo respondecas pri la organizado de la venonta kvinlanda E-konferenco, kiu okazos 18-19-an de oktobro. Ĝi okazos ĉe la "Bridge Street Motor Inn".

Sandra Connors aranĝis kunvenon en sia hejmo dum kiu ŝi prezentis "video-kasedon" faritan de Tom Elliott okaze de la Perta kongreso.

## LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1986

Antaŭe raportita .....	\$450
S-ino Sylvia Burkitt, Sidnejo .....	10
S-ino E. Feely, Yeppoon .....	5
S-ro Ralph Harry, Kanbero .....	10
F-ino H. Mueller, Sidnejo .....	20
S-ino Magdalena Rozsa, Orange .....	5
Orange Esperanto Club .....	10
S-ino Marjorie Duncan, Manly .....	10
S-ino Bettie Hart, Sidnejo .....	10
	—
	\$530

## JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita .....	\$694
S-ro Alan Towsey, Tahmoor .....	100
S-ro S. Kanački, Melburno .....	100
	—
	\$894

## RECENZOJ

• **IOM PRI LA ROMPUMATAKOJ:** de Ing. Jindrich Novak kaj Ing. Ivan Špička; eldonis 1985 Ĉeĥa Esperanto-Asocio (Jiřska 10, 11000 Praha 1, Ĉeĥoslovakio). Prezo: 15 ĉeĥaj kronoj.

La ĉefa konkuranto de nia lingvo Esperanto sur la kampo de scienca kaj teknika informo, sendube estas la angla, ĉar verkoj eldoniĝas amase en tiu lingvo. Do, estas nepre necese, ke niaj spertuloj kaj lertuloj verku Esperante. Kiel prave asertas Novak kaj Špička "Esperanto estas tre oportuna por disvastigado de sciencaj kaj fakaj informoj", kaj per bona

serio da libretoj ili daŭre plenumas la taskon en la sfero de la sindefendologio. Ili proponas taŭgajn neologismojn, ĉar por interkompreniĝi estas necese starigi oportunan terminologion, klare prezentitan en vortareto kaj logika tabelo. ekzemple "rompumo" signifas "enpozicii membron sur aŭ ekster la limojn de ilia normala movebleco". La klarigo plejparte temas pri la brakrompomoj, ĉar ili estas la plej gravaj en sindefendaj situacioj.

La aŭtoroj distingas inter "sindefendo" kaj "sinprotekto", kaj komence emfazas, ke estas ege preferinde elekti la vojon de interkompreniĝo, sen perforto. La ilustraĵoj desegnitaj de Ladislav Špaček estas elstare klaraj kaj informplenaj. La tuta verko estas rekomendinda al ĉiuj kiuj emas studi la sindefendon.

—R. G. ROBERTSON.

## Jarlibro 1986

Pro miskompreno, la numeroj indikitaj en la adresaro apud aligitaj al la 25-a Kongreso de AEA, Perto, 1986 estis prenitaj el la listo disdonita en Perto, kaj indikas ĉambrojn en la kolegio! La listo laŭ ordo de registro troviĝas en "Australian Esperantist" de 1985 paĝoj 299, 307, 313, 325, 332, 343, 348 kaj 364 kaj de 1986 p. 7. La kompilintoj de la Jarlibro bedaŭras se la nekutima listo kaŭzis ian embarason.

La adreso de S-ino V. Payne estas: 36 Donegal Road, Floreat Park, W.A. 6014, kiel en la Adresaro. Bonvolu korekti la adreson de la Vicprezidanto p. 4.

—RALPH HARRY.

• **La Vivo Rozas**, kanto de Joelle Rabu

La juna (kaj bela!) kanada kantistino, Joelle Rabu, kiu kantas la repertuaron de Edith Piaf en Kanado kaj Usono, nun inkludas en siaj programoj ankaŭ Esperantajn kantojn. Dum la vizito de Sidnejoj kaj Manlianoj al Kanbero, la 25-an de Aprilo, ĉiuj aŭskultis sonbendon de "La Vivo Rozas", kaj trovis ĝin ĉarma. Joelle estas invitita al la Centjara Kongreso en Varsovio, por kiu ŝi preparis "Jubilean Kanton". AEA petis al Emistudio, la kanada diskeldonisto fari aranĝon kun nia Libroservo, por ke societoj kaj individuoj povu aĉeti gramodiskon kun pluraj kantoj de nia nova stelo.

—R.L.H.

S-ro Wolfgang VOGT, Heinrich Heine Ring 61, D.D.R. 2300, STRALSUND, East Germany, serĉas plumamikojn en Aŭstralio.

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 31. — SYLVIA BURKITT

"The Quiet Exceller"

If you see Sylvia in earnest conversation, her mouth close to the other's ear, don't assume that she is whispering confidences or mouthing sweet nothings. She has a very soft voice — at times almost a whisper. But don't assume too much from the velvet of her voice: beneath is the strength of iron determination. Everything that Sylvia does — even if it's "only" preparing the supper at Esperanto House — shows the resolve: "I can do it. I shall do it — not just well, but excellently".

Sylvia's earliest recollection was of a hospital ward. She was not yet 3. She couldn't walk. A daunting prospect! Sylvia was frightened but **not** daunted. Young as she was, she said to herself: "I **will** walk again". And she did. In fact some years later she became one of her school's leading athletes. No permanent harm, but a long abiding fear of anyone in a white coat — even of the stewards on the Melbourne Express.

The next setback was a move to the back of Northern South Australia, where her mother struggled to bring up — alone — her 4 children. Grandfather was a wealthy grazier, but relations with his daughter were strained: he had disapproved of her marriage and now contributed nothing to her support. Yet Sylvia learned to love the desert country which still appeals to her more than do the rolling, gentle hills of England — old or New.

In spite of, perhaps because of, lack of "proper" schooling, Sylvia developed a consuming and abiding love of learning. Through the Church Mailbag Service (a correspondence Sunday School!) she won a scholarship to a city church school. Alas, no money. A hope deferred! Instead, she pestered her mother to let her work her way through High School. Mum conceded that, if she could gain at least 500 out of the possible 700 marks in the Qualifying Certificate, she could go. She did and with some to spare, without tuition! Off to a Higher Primary School. Up at 4.30 a.m. Three miles' walk to the railhead, thence by

train. Home at 9.30 at night. Only a term of this grind, though, for she got an opportunity to go to the city.

In a school of 800, she felt shy and inadequate until she realized that she could outjump and outrun the other kids as well as, in due course, outshine them in the classroom. Captain and highjump champion. Her record stood for 15 years. She became a Girl Guide. Having her sleeve filled up with proficiency badges, she duly became Guide Leader. Her greatest interest from this time on was in codes, especially Morse Code.

As a school girl, Sylvia helped look after horses at a racing stable at West Beach. She enjoyed exercising them on the sands. She enjoyed too, the company of the tough racing fraternity who were always kind and gentle with her. Especially did she enjoy the company of a retired Sea-captain, who was then a ham-radio enthusiast. He taught her all the shipping codes. "Windfall" earnings supplemented her income — 2/- for a first prize, 1/6 for second, and 9d for third — at sporting events, and she managed to gain the 10/- per week she needed to survive.

After 3 years, Sylvia had to leave school to help with the family finances. She became a teacher in a Church School, but after a year the school closed down. Then she kept boarders and went to Business College at night. This was by special arrangement — on credit at 20%. Four months later, she got an office job, and was there when war broke out.

One evening two Army men called. They had heard that she was interested in codes, and might be useful in the Intelligence Section. She began work for the Army and was enlisted in the Women's Army in 1942 — ready to be sent away.

She had married a soldier on his final leave. They had 5 days together and then she never saw him again, for he was killed in action.

(To be concluded)

—ARTHUR COCKING.



# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

N-ro 236 (316)

MELBURNO

Oktobro, 1986

## INTERKOMPRENIĜO, PACO, EVOLUO

### INAŬGURA PAROLADO, 71-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, PEKINO

Per rezolucio de la 24-a de oktobro 1985, la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj solene deklaris la jaron 1986 la Internacia Jaro de la Paco. Ĝi krome atentigis, ke la popoloj devas "vivi kune en paco kaj praktiki toleremon". Estas konate, ĝi aldonis, ke "edukado, informado, scienco kaj kulturo povas kontribui al tiu celo".

Unu monaton pli poste, la Generala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion, kiu rekonis la Jubileon de la Internacia Lingvo Esperanto en 1987. Ĝi petis la Generalan Direktoron de Unesko sekvi la laboron por Esperanto, ĝi alvokis al utiligo de Esperanto flanke de internaciaj organizaĵoj, kaj ĝi rekomendis, ke tutmonde oni enkonduku en la lernejojn studadon pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto.

Sekvante la rekomendojn de Unuiĝintaj Nacioj, kaj konsciante pri la decido de Unesko, Universala Esperanto-Asocio elektis kiel ĉi-jaran temon de sia kongreso la temon "Interkompreniĝo, Paco, Evoluo".

Tiu temo tre klare implicas, ke paco estas pli ol manko de milito. Por konstrui la pacon, necesas pozitivita agado — agado, en kiu oni celu krei toleremon inter la homoj, subteni kunlaboron, kaj konstrui la instrumentojn kaj instituciojn de la paco.

La kreinto de Esperanto komprenis tion. Zamenhof skribis, en nia konata himno, pri "nova sento". Ni ofte kantas tiujn vortojn, sed ĉu ni vere komprenas la signifon de tiu nova sento? Zamenhof kreis per Esperanto miraklan internacian lingvon, kiu brile funkcias — kiel ni klare vidas ĉi tie, kie ĉino kompreniĝas kun germano, brazilano kun japano, kanadano kun iranano. Temas pri kompreniĝo, kiu jam preskaŭ cent jarojn mirigas la utiligantojn de nia facila, fleksebla, esprimiva lingvo.

Sed per la vortoj "nova sento" Zamenhof celis lingvon ne nur de la lango sed ankaŭ de la koro, ne nur de la korpo sed ankaŭ de la animo. La arkitektoj de la tutmonda paco, ĉu esperantistaj ĉu neesperantistaj, insistas, ke necesas ŝanĝi

la pensmanieron de la homoj por krei veran pacon. Tion ni parolantoj de Esperanto komprenas. Ni jam praktikas tiun "novan senton" — sento, kiu kapablas forigi la miljarajn murojn inter la popoloj.

Pro tio, en nia kongresa temo, ni aldonis al "paco" ankaŭ la vorton "interkompreniĝo". Fakte, ni metis interkompreniĝon en unuan lokon, ĉar ĝi estas antaŭkondiĉo de la vera paco.

Ni kongresas ĉi-jare en la plej granda lando de la mondo: unu kvarono de la monda enloĝantaro estas ĉina. Ĉinio baraktas kun grandaj problemoj: problemoj de kreskanta nombro de enloĝantaro, problemoj de tekniko, problemoj de organizado. Kaj iom post iom ĝi venkas tiujn problemojn. Ĝi estas vere evoluanta lando. La kongresanoj de la 71-a Universala Kongreso spertas deproksime la problemojn kaj la paradoksojn, la esperojn kaj eltrovojn, de tiu ĉi lando en stato de evoluo.

La tria elemento en nia kongresa temo estas ĝuste "evoluo". Per nia temo ni sugestas, ke, same kiel paco dependas de interkompreniĝo, tiel ankaŭ evoluo dependas de ambaŭ tiuj elementoj. La ĉina estas antikva civilizito: ĝiaj kulturaj radikoj penetras profunden la ĉinan teron kaj ĝiaj kulturaj atingoj mirigas la tutan mondon multajn jarcentojn. Necesas samtempe konservi tiun kulturan tradicion kaj modernigi ĝin. Tio estos ebla nur en pacaj cirkonstancoj, nur en spirito de interkompreniĝo.

Kio validas por Ĉinio validas ankaŭ por la tuta mondo: nur en paco, nur en spirito de kompreno, ni povos forigi la militon. Milito estas hodiaŭa realo en multaj landoj. Nur en reciproka respekto ni povos forigi la problemon de rifuĝintoj, nutri la malsatantojn, klerigi la neklerajn, kuraci tiujn kiuj malsanas. Nur en interkompreniĝo ni povos krei mondon, en kiu regas nova sento, nova spirito de kunlaboro, tolero kaj egala disdivido de la riĉaĵoj de nia mirakla planedo.

La Internacia Lingvo Esperanto, donas eblecon atingi tiun tutmondan interkompreniĝon, pri kiu aludas nia kongresa temo. Ĝi estas fundamenta elemento en la paco. Ĝi estas utila ilo en la homa kaj ekonomia evoluo ĉar ĝi kreas reciprokajn respekton inter la popoloj kaj kulturoj kaj ĝi ebligas senperan komunikadon en spirito de egaleco inter la homoj. En Esperanto, neniu kulturo subpremas alian kulturon, neniu homo superas alian: ni laboras sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian.

Interkompreniĝo, paco, evoluo! Je la sojlo de la Jubileo de Esperanto, ni salutas la evoluantan novan Ĉinion, ni salutas la arkitektojn de la paco tra la tuta terĝlobo, kaj ni salutas la parolantojn de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj faras sian kontribuon al kreo de paca mondo, al kreo de nova sento inter la popoloj.

— HUMPHREY TONKIN  
27 julio, 1986.

## Impresoj de Les. Scott

### LA ĈINOJ KONDUKIS SUKCESPLENAN 71-AN UNIVERSALAN ESPERANTAN KONGRESON!

La membroj de la Pekina Esperanto-Asocio, kun la helpo de aliaj Esperantistoj el tuta Ĉinio kaj nombro de ne-Esperantistaj adeptoj kaj subtenantoj, sub la gvidado de la Estraro de U.E.A. kaj ĝiaj oficistoj provizis la necesajn ingrediencojn por la bona rezulto. Tiuj kombine superregis preskaŭ ĉiujn problemojn kaj malfacilaĵojn.

Pekino (la Ĉinoj nomas ĝin Beijing) pruvigis tre taŭga loko, kun tiel multaj allogaĵoj. La ĉefurbo de la lando dum 800 jaroj kun senlimaj interesaj antikvaĵoj sed kun la graveco kaj pulso de vere moderna urbo kaj la koro de rapide kreskanta evoluanta lando. Sumiĝas tiel

alloga, ke 2400 Esperantistoj venis al la Kongreso (inter ili 25 Aŭstralianoj).

Loĝado por tiel multaj vizitantoj streĉis la rimedojn de la hotelaj ĉambroj, en la pinta sezono. Spite tion, la ekskluziva uzo de la Hotelo "Amikeco" tute apud la Kongresejo mem estis konvena por la 1500 bonŝanuloj kiuj restis tie. Ni, en aliaj hoteloj, ĝuis glatajn arangojn por ĉiuj transportaj bezonoj, pere de niaj propraj aŭtobusoj, ŝoforoj kaj Esperantistaj ĉiĉeronoj. Arangoj por manĝoj estis unuaklasaj, akurataj kaj sen problemoj. La manĝaĵoj mem estis bongustaj kaj la servo ĉiam kompetenta kaj agrabla.

La Aŭtobusoj por nia transportado por kongresaj, manĝaj, amuzaj vesperoj kaj ekskursaj bezonoj estis ĉiam komfortaj, la klimatisiloj ĉiam efikaj kaj la ŝoforoj estis spertaj, kompetentaj, helpemaj kaj toleremaj — speciale por prokrastuloj kaj forgesemuloj! La Esperantistaj ĉiĉeronoj, inteligentaj kaj bone informitaj, vartis la partoprenintojn kiel siajn proprajn familiojn — en la hoteloj kaj en la aŭtobusoj.

Oficiala Kongresa agado prenis la oportunon kaj kaptis la okazon por forte antaŭenigi Esperanton en Ĉinio per ĉiuj rimedoj je sia dispono — Radio Pekino, Gazetara Servo gvidata de "El Popola Ĉinio" kaj la Registraraj kaj Edukadaj aŭtoritatuloj. Aliaj gravaj aferoj estis la elekto de nova Prezidanto kaj Estraro por U.E.A., la 72-a Jubilea Centjara Kongreso kaj ĝenerale la grava jaro en la historio de Esperanto. Financoj ricevis specialan atenton, cele la simpligon kaj plibonigon de la financa situacio. Kutimaj rutinaj aferoj ankaŭ eluzis multe da tempo. Ŝajnas, ke la administrado en la Centra Oficejo, ĉefe rilate la mankon da sufiĉa kompetenta stabo, ĝenas multajn.

La Kongresejo mem, la Scienca Halo de Pekino, bone funkciis por la plejmulto de la Kongreso. Ĝi estas kompakta kaj ĉiuj salonoj atingeblaj facile. La sola grava manko, laŭ mia observo, estis ke ĝi ne havis sufiĉe grandan ĉambron por enteni la tutan Kongresanaron, por oficialaj kunvenoj kiel la Inaŭgura, Malferma kaj Ferma ceremonioj kaj la Amuzaj Vesperoj. Ĉiuj el ili devis okazi aparte, en alia loko — La Ĉina Teatrejo. Tiu ne nur estis taŭga sed moderna kaj ege komforta. La halo havas la plej ĝisdatigitajn ekipaĵojn.

La oficialaj ceremonioj estis imponaj kaj impresaj. Mia sola ĝeno pri tiuj estis, ke ne sufiĉaj Ĉinoj povis ĉe-esti ilin pro manko de spaco. Sylvia Burkitt prezentis tre taŭgajn salutojn de Aŭstralio, dum la Malfermo. Prezidanto Humphrey Tonkin kaj aliaj parolantoj ege laŭdis la subtenon de la Ĉinaj eminentuloj kaj aŭtoritatoj kaj klopodojn kaj strebojn de la L.K.K. anoj.

Kiel komitatano, mi havas etan plendon-mi kredas, ke okazis tro multaj komitatitaj kunsidoj (U.E.A. ne la L.K.K.) por kio, tiuj respondecoj ne povis plene ĝui la Kongreson mem aŭ partpreni la interesajn ekskursojn de la vidindaĵoj de la Kongresurbo, kiujn la L.K.K. planis. Ŝajnas al mi, ke tio ne estas tute justa,

ĉar la komitatoj pagas la samajn kotizon, loĝadon kaj vojaĝkostojn kiel aliaj Kongresanoj, kiuj ne suferas la diskriminacion.

La kvalito de Esperanto parolata de la ĉinoj varias multe. Oni eltrovas, ke tra la lando estas pluraj veraj kompetentuloj sed la amaso, dum al ili ne mankas entuziasmo por lerni la lingvon, ne havas spertajn instruistojn, kio, laŭ mia observo, estas speciale necesa pro la malsimileco de Ĉina kaj la Esperanta lingvoj, precipe rilate la skribadon.

La ekskursoj dum la Kongreso estis sperte planitaj, kaj preskaŭ ĉiam ilin akompanis bone informitaj kompetentaj Esperantistoj kiel ĉiĉeronoj. Ĉiuj el ili estis interesaj kaj historioplenaj. La tutaga vizito al la Granda Muro estis memorinda, pro la grandeco de La Muro kaj egale grandega amaso da vizitantoj!

La amuzaj vesperoj estis ĉiam ĝuindaj — la Ĉinaj kantistoj, dancistoj, muzikistoj, akrobatoj, k.t.p. vere estas mondklasaj kaj la Ĉina Teatrejo ĉiam plenkonservis. Ni ĝuis la bankedon kaj balon en la Ĉina Klubo kaj speciale, la grandan bankedon provizitan de la Ĉina Internacia Turisma Servo al la amaso de la kongresanoj, en Pekina Granda Hotelo.

Rilate la sesiojn de la Internacia Kongresa Universitato kaj la Kolokvo de la Lerneja Tago, kiujn ni povis partopreni, ni multe laŭdis. La kvalito de la prezentadoj kaj la parolantoj estis vere altklasaj.

Jes, Bess kaj mi ege ĝuis nian viziton al Pekino kaj nian partoprenon en ĝia 71-a U.E.A. Kongreso kaj plue, la sekvantan E.L.N.A. Postkongresan vojaĝon tra Ĉinio. Prosperon al la enloĝantoj de ĉi tiu rimarkinda lando kaj samtempe al la grava rolo kiun Esperanto prenos en la certigita progreso estonteca!

• **ALIA OPINIO:** Du aŭstraliaj kongresanoj opinias alie:

"La kongreso estis malbone organizita. Ĉinio ne estas preta por organizi Universalan Kongreson. La nivelo de la lingvo, dum la kongreso, estis malkuraĝiga fakto."

Ili plendas pro la loĝado en hoteloj tre malproksimaj de la kongresejo, kiuj estis malpuraj kaj kie la manĝaĵo estis malbonkvalita.

Instruistino: Karlo, kie troviĝas subjekto en la sekvanta frazo:

"La ŝtelisto estas kaptita?"  
Karlo: En malliberejo.

## EN 1987 S.A.T. KONGRESOS EN BOULOGNE-SUR-MER

De la 2-a ĝis la 8-a de aŭgusto kolektigis SAT-anoj el 13 landoj en Sant Cugat del Valles, Hispanio, okaze de la 59-a S.A.T.-kongreso. Fine, post la demokratigo de Hispanio, S.A.T. povis denove kongresi en la lando post 52 jaroj.

La ĉefa kongrestemo estis la "Hispana Revolucio", kiu ĉi-jare estis festata en tute progresema mondo. Pri tiu temo okazis tri prelegoj kun diskutoj. Oni krome prelegis pri la scienceco de Esperanto, pri la poezio, stilo kaj progresemaj hispanaj poetoj, milito kaj paco, kaj fine pri la vivo de Lidia Zamenhof.

Okazis pluraj interesaj ekskursoj, ekzemple vizito al Barcelono, al la montaro Montserrat kaj al la hispana Esperanto-Muzeo en Sant Pau d'Ordal, 38 km de Barcelono. Sur 250 m<sup>2</sup> kaj 170 m da bretoj troviĝas 4557 libroj en aŭ pri Esperanto kaj 1215 turismaj broŝuroj. Diversaj kulturaj programeroj plenis la kongresajn vesperojn.

Dum la laborkunsidoj oni multe diskutis pri la malpermeso kongresi en Pollando, sed la invito kongresi en BOULOGNE SUR MER permesis preskaŭ forgesi la malagrablan konflikton kun la Pola E-Asocio. Do, okaze de centjarigo de Esperanto SAT-anoj renkontigis de Esperanto en la urbo kie Zamenhof la unuan fojon uzis publike sian lingvon.

La kongreso finiĝis per la "Kongresa Deklaracio", kiu i.a. alvokas la membrojn subteni al la liberiga batalo kontraŭ sudafrikaj koloniistoj, kaj ĝojas pri la aplikado de Esperanto en scienco, tekniko kaj instruado dum la lastaj jaroj, kaj invitas organizojn kun internacia agadkampo prikonsideri la uzadon de Esperanto, kiu fariĝos centjara en 1987.

## 20-A KONFERENCO DE ILEI

Kiel oficiala reprezentanto de la Internacia Esperanto-Instituto mi partoprenis la 20-an Konferencon de la Internacia Ligo de E-Instruistoj en Louvain-la-Neuve (Belgio), de la 12-a ĝis 18-a de julio, 1986.

El la 69 konferencanoj el 13 landoj, inter tridek kaj kvardek aktive partoprenis en la progreso de laborkunsidoj, prelegoj kaj diskutoj.

S-ro Gregoire Maertens, tiam UEA-Prezidanto, partoprenis en la inaŭgura kaj ferma kunsidoj por emfazi la novan kunlaboron inter UEA kaj ILEI.

La laborkunsidoj baziĝis sur dokumentoj ellaboritaj de la vic-prezidanto Edward Symoens, Belgio. La diskuttemoj estis por ĉiuj interesaj. La prelegtemoj spegulis la aktualecon de la nova agado: aktualaj metodoj de lingvoinstruado, trejnado kaj ekzamenado de E-kursgvidantoj, pedagogiaj ludoj.

Parolante pri informado en pedagogiaj kaj edukaj medioj, D-ro Szerdahelyi, Hungario, la prezidanto de ILEI, atengitis, ke tiu, kiu entreprenas instrui fremdan lingvon entreprenas ne-eblan taskon — ĝi igas la homan cerbon fari nenormalan laboron. Tial seriozaj instruistoj elserĉas metodojn plej bone plenumi tiun taskon: ni emfazu ne la simplecon de Esperanto, sed ĝian pedagogian valoron.

Ni informiĝis, ke la itala urbo Torino eldonis esperantlingvan broŝuron, haveblan kontraŭ simpla peto al "Assessorato al turismo, via San Francisco de Paolo, 3, I-10123 Torino. En la venontjara Konferenco okazos la unua diplomiga seminario por novaj Cseh-instruistoj. La venontjara ILEI-Konferenco okazos en Lodz, Pollando.

La ILEI-estaro vidas sin ne aŭtoritata ordonanta al la E-instruistaro kion fari kaj kiel agadi, sed kunordiganta de, kaj konsilanto-informanto pri, diverslandaj agadoj. La nova estraro montras sin agadema, iniciatema kaj kunlaborema cele al la disvastigo de E-instruado kaj la plialtigo de la nivelo de tiu instruado. La entuziasmo de la partoprenantoj indikis, ke la konferenco atingis sian celaron.

—AUDREY CHILDS-MEE,  
ROTTERDAM.

## Ĉu venonta mond-ĉampiono?

Antaŭ kelkaj monatoj okazis en Budapeŝto landa konkurso pri ŝako. Zsuzsa POLGAR, 17-jara Esperantistino, atingis la 3-an lokon en tiu vira konkurso, venkinte inter aliaj du internaciajn grandmajstrojn. Kiel tria lokito nia talenta samideanino rajtos partopreni la inter-

nacian zonan konkurson, kiu okazos en januaro 1987 en Pollando por la vira titolo de mondĉampiono pri ŝako. Ĝis nun nenia virino atingis tiun ĉi rezulton.



• **MELBURNO:** "Niaj kongresanoj" revenis el Pekino kaj raportis pri unika kongreso.

Je 18-a de aŭgusto Ruth Tumman rakontis pri siaj spertoj. Estis ŝia unua Universala Kongreso kaj multe impresis ŝin la entuziasmo de la ĉinaj esperantistoj. La programo estis multvaria kaj ampleksa, kaj ekskursoj treege interesaj. Mirigis ŝin la miloj da bicikloj, kiuj fluis kiel silenta rivero laŭ la stratoj.

Semajnon poste Errol Chick prezentis diapozitivojn pri diversaj kongres-aranĝoj. Speciale interesa estis ne-atendita renkontiĝo, en la regiono de la hotelo, kun ĉina esperantistino, kiu ne sciis ke Universala Kongreso okazas en Pekino! Li ankaŭ partoprenis fakkunvenojn de la Esperanto-Radioamatoroj.

Marcelo Leereveld, 8-an septembro, prelegis pri sia lastatempa vojaĝo tra Eŭropo. Li montris diapozitivojn pri Prago, la malnova ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, kies multaj domegoj el la pasinta jarcento multe impresis lin. Li ankaŭ havis la oportunon renkonti ĉefajn esperantistojn. Li finis sian prelegon montrante kelkajn bildojn pri Vieno.

• **SIDNEJO:** 4/8: Pluraj anoj estis for, ĉe la Pekina Kongreso kaj por diversaj kialoj, do la babilado iris kien ajn. Tiaj vesperoj estas malstreĉigaj. Semajnon poste ni strebis prepari krukvortenigmon por "Telopeo". Ne estas simpla afero trovi taŭgajn vortojn.

Je 18-a de aŭgusto ni bonvenigis Pastron Bruno Ostropolski. Li volis ĉeesti la Pekinan Kongreson, sed pro manko de validaj paperoj li ne povis iri. Naskita en Pollando, li dum multaj jaroj deĵoras en Argentino, kaj povis rakonti multon pri tiu lando. Margaret Chaldecott revenis de la Kongreso, kaj parolis pri kelkaj malfacilaĵoj kiujn ŝi spertis pro la vasteco de Pekino, la programo kaj la ŝajna mal-

vo'o de la ĉinoj rapidi — sed sendube ili ne suferas pro ulceroj.

Je 25/8 ni trovis kelkajn interesajn erojn en alilandaj ĵurnaloj, ekzemple la raporton pri la "modernaj barbaroj", kiu invadis Romon kaj malfermis "rapid-vorejon" en la historia centro de Romo — t.e. "McDonald's" nun videbla kontraŭ fama fonto.

Je 1-a de septembro ni bonvenigis D-ron Willem Roelofs, kiu venis el Pekino kaj nun ferias en Aŭstralio. Li esperantistigis antaŭ multaj jaroj kaj havas bonan konon de la movado.

—M. CHALDECOTT.

• **BRISBANO:** La mezlernejo Sunnybank intencas starigi "Centron por Studado en Aŭstralio", kiel projekton dum la Ducentjara Jubileo. En ĉi tiu Centro estos Historia Muzeo, kiu rilatos al loka, ŝtata kaj aŭstralia historioj. Post invito de la koncerna komitato, la Brisbane Societo kontribuis diversajn E-librojn/dokumentojn (entute 15) por ke estontaj interesuloj povu studi esencajn detalojn pri la lingvo. Samtempe ni proponis pluan subtenon, ĉefe per informado el la Esperanto-Muzeo de Kvinlando.

La 24-an de aŭgusto okazis tre agrabla rost-festo ĉe la hejmo de Alan Grant (Alan Grant estis Libro-Peranto de AEA 1958/59), aranĝita de filino Jay kun helpo de Hadie Robinson: multan dankon!

La 31-an de aŭgusto kelkaj anoj ĉeestis tuttagan pac-seminarion aranĝitan de la Bahai-Grupo en Ipswich; Ray Ross starigis E-ekspozicion; Trevor Steele parolis pri Esperanto kaj la kontribuo al paco; Ruth Morrison, Hadie Robinson kaj Annie Spencer ankaŭ kontribuis al la seminario.

La 1-an de septembro bonvena vizitanto al la klubejo estis Kay McCashney el Perto; Kay partoprenis seminarion ĉe la Universitato de Kvinlando.

—RAY ROSS.

## EL LA FEDERACIOJ

• **VIKTORIO:** La jara Esperanto-Seminaro okazis en la Kvakera Domo en Melburno, je la 13-a de septembro. Ne-atendite partoprenis multaj esperantistoj. Tridek Melburnanoj de la kvar lokaj grupoj kaj Ted O'Brien kaj Cliff Hall el Geelong guis la tuttagan aranĝon.

S-ino Fay Koppel gvidis du sesiojn pri tradukado kaj gramatikajoj. Ruth Tumman rakontis pri siaj spertoj ĉe la Pekina

Universala Kongreso. F-ino Margaret Warr, antaŭ-nelonge reveninta el Ĉinio, lerte parolis pri divers-tipaj "tigroj", el kiuj ŝi montris unu modelon ricevitan donace de restoracio en Pekino. John Coogans parolis pri siaj personaj renkontiĝoj kun, kaj impresoj pri, William Auld kaj Marjorie Boulton. Ann Hearn priskribis la starigon kaj konstruon de Nashville Universitato en Usono por la edukado de liberigitaj niguloj, helpe de mono gajnita per koncertoj fare de vojaĝanta kantgrupo el ties studentoj. Kvar anoj de la Waverley-grupo distris per fantaziaĵoj kaj harmonia kantado. Gerald Tumman priskribis historion de la ĉina Esperanto-movado. Distroj konsistis el anekdotoj kaj ŝercoj (Jack Fallu), ekzer-cigaj konkursoj (Ivy Fallu) kaj amuzaj konsiloj "Kiel fariĝi E-verkisto" (Herbert Koppel). Juna studento Nick Nicholas donis siajn pensojn pri nenecesaj E-vortoj kaj simpligo de la vortaroj.

### JUBILEA FONDUSO

Mi tre dankas al la membroj, kiuj rapide kaj malavare sendis donacojn por ebligi taŭgan agadon en Aŭstralio dum la Centjara Jubileo de Esperanto.

Rilate la Antologion mi devas klarigi, ke, ĉar ni ankoraŭ ne faris finajn aranĝojn pri eldono, la Libro-servo ne povas fiksi prezon. Do, donacoj de \$20 estos registritaj kiel **antaŭpagoj**, kaj estos tre bonvenaj. Oni anoncos kiel eble plej baldaŭ pri la vendoprezon. Donacantoj de \$50 aŭ pli rajtos ricevi, se ili tion deziras, unu ekzempleron de la Historio nun, kaj ankaŭ ekzempleron de la Antologio post ties eldono. Komprenoble ni esperas, ke oni ankaŭ aĉetos la Historion amase per la kutimaj perantoj aŭ (kun aldono de la poŝtkosto) senpere el la Libro-Servo. Ĝeneralaj donacoj, sen kondiĉoj, estos la plej utilaj. —RALPH HARRY.

Ralph & Dorothy Harry (Kanbero)	\$500
S-ino M. Sanders (Melburno)	10
Herbert & Fay Koppel (Melburno)	50
Dorothy Threlfall (Perto)	100
Owen Loneragan (Perto)	34
Alan Towsey (Tahmoor, NSK)	100
S. Kanaĉki (Melburno)	100
Marj Ellyard (Kanbero)	100
Trevor Steele (Brisbano)	50
Merle Williams, Ravenswood, Vik.	20

\$1,064

### LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1986

Antaŭe raportita	\$530
S-ino M. Chaldecott, Sydney	20
S-ro Len Eddington, Perth	10
S-ino Jean Harness, Sidnejo	10
S-ino R. Morrison, Brisbane	10
F-ino Joyce Turner, Rockhampton	10
S-ino Elsie Maddern, Morwell, Vic.	30
S-ino Val King, Melburno	20
S-ino OIive Russell, Sidnejo	10
Esperanto Federation of Victoria	50
S-ro Arthur Cocking, Manly	15
S-ino L. Fridenbergs, Melburno	10
S-ro W. A. Kaye, Melburno	5
S-ro Vlado Kosef, Cobar, N.S.W.	20
	<hr/>
	\$750

### K. G. LINTON FONDUSO

S-ino Kay Morrison, Manly	\$10
---------------------------	------

### EN LERNEJO

- Ni instruu Esperanton, sinjoro direktoro — instigas denove la instruisto.
- Ĉi-jare maleblas — rifuzas la direktoro. — Ni bezonos la tempon por seksa edukado.
- Kiel do? Ĉu niaj geknaboj bezonas pli da seksa klerigo?
- Male! Sed ni devas jam komenci kurson pri vartado de suĉinfanoj.  
(Hung. Vivo)

### Kompletoj de "La Rondo" kaj "Australian Esperantist"

La Biblioteko de AEA ĵus preparis indeksojn de "La Rondo" por la periodo 1940-1944, de kiu estas kompletoj en Brisbano kaj Kanbero. Se iu membro aŭ organizaĵo deziras ekzempleron de la indekso, bonvolu informi Ralph Harry.

La Biblioteko ŝatus scii, kie troviĝas kompletoj de "Suda Kruco", "La Rondo" kaj "Australian Esperantist". Nia organo estas utila ne nur al verkantoj de historio sed ankaŭ al ĉiu membro, kiu deziras lerni pri la vivo de la Movado — ĝiaj agado kaj sukcesoj, kaj malsukcesoj — dum la pasintaj 80 jaroj. Se mankas al iu societo kelkaj numeroj en kompleto, la Biblioteko eble povos provizi ekzempleron, aŭ fari kopion.

Jen projekto por la Jubilea Jaro — kompletigi kaj bindigi kolekton de "Australian Esperantist" en ĉiu ŝtato.

La Biblioteko rezervas la rajton peti kontribuon al la kosto de kopiado kaj poŝto.

## RECENZOJ

• Libro por specialistoj: **AKADEMIAJ STUDOJ 1985**, red. R. Eichholz. Kanado: Esperanto Press (1985). 318 A4-formataj paĝoj, broŝ. Prezo: Kan \$20.70 afrankita. Mendebila de Esperanto Press, Bailieboro, Ontario, Kanado KOL 1BO.

Ĉi tiu, la tria jarvolumo de esperantologiaj verkoj far (plejparte) Akademianoj estas dediĉita al tri ĉeftemoj: (1) uzado de Esperanto en maŝintradukado kaj komputeraĵ programoj; (2) la problemoj de landnomoj; kaj (3) terminologiaj kaj prigramatikaĵ kontribuoj. Pli ol trionon de la libro okupas la verkoj pri komputeroj kaj maŝina tradukado.

Persono kiu volas sin okupi serioze pri la unua kaj dua ĉeftemoj profitos per uzado de ĉi tiu riĉenhava volumo. Ĝi ne estas rekomendinda kiel studlibro por generalaj esperantistoj, ĉar la enhavo de la plej multaj verkoj estas multe tro komplika. Ĉar ĝi plejparte konsistas el diskutado pri la diversaj temoj, oni ne anticipu trovi en ĝi solvojn, sed nur proponojn kaj multan debatadon. Estas interese vidi, ke niaj Akademianoj multe pli emas plenuzi la gramatikaĵn kaj vortstrukturajn rimedojn de nia lingvo, ol familiaras inter la plej multaj Esperantistoj. "Neologismoj" ankaŭ abundas, pro kaŭzoj eksplikitaj plejofte de la aŭtoroj mem.

Plej entuziasmigaj por la komputeristoj estas la tre detalaj artikoloj pri la komputerizado de Esperantaj tekstoj kaj la praktika konstruado de tradukmaŝinoj. Ilin komprenos nur la komputeristoj, ĉar temas pri fakverkoj.

Mia sola kritiko estas la presmetodo por ĉi tiu libro. La paĝoj estas fotolito-grafie presitaj, uzante la originalajn

manuskriptojn de la aŭtoroj. Sekvo de tio estas la preskaŭnelegebleco de pluraj paĝoj. Aliaj paĝoj estas inkmakulitaj. La paĝoj estas tre malbone binditaj, kaj facile elfalas.

Pro sia enhavo, ĉi tiu volumo estas tre valora kontribuo al esperantologio.

—DONALD BROADRIBB.

• **UNUA PERBRAKA BLOKADO:** de Ing. Jindrich Novak kaj Ing. Ivan Špička: eldonis Ĉeĥa E-Asocio (Jilska 10, 11000 Praha 1, Ĉeĥoslovakio. Prezo: 15 ĉeĥaj kronoj.

La broŝuro entenas ambaŭ ĉeĥan kaj Esperantan tekstojn. La verkistoj daŭre klarigis la science bazitan sistemon de la sindefendo, kiun ili kreis dum la jaroj 1960-65. Antaŭparole ili skribas: "Homo, aplikanta perforton aŭ minacanta per ĝi, kutime ne intencas vundi aŭ mortigi nin". Laŭ mi, ili estas optimistoj, aŭ kredeble Ĉeĥoslovakio estas pli feliĉa lando ol la nia. En niaj urboj sentaŭguloj kaj per-versuloj perforte atakas virinojn, infanojn kaj gemaljunulojn. La konsilo "Prezentu la alian vangon" ne efikas tiurilate. Tamen, laŭ Novak kaj Špička, la sindefendanto povas utiligi "mildajn" batalagojn, kiuj kontraŭulon plejverŝajne ne vundos.

Ĉi tiu libreto temas ĉefe pri la "ango", speco de perbraka blokado. Sen ilustraĵo estas malfacile klarigi la signifon de "ango", sed kiel kutime en la verkoj de Novak kaj Špička, la bildoj estas klaraj kaj informplenaĵ. Por "angi" kontraŭulon, unue necesas "poni" lin, tio signifas, situigi lin en taŭgan pozicion. Ambaŭ neologismoj miaopinie estas necesaj. "Shemo" mi ne trovas en PIV kaj estas malfacile prononcebla de multaj Esperantistoj, krom skotoj kaj germanoj, do mi preferus "skemo". La vorto "atakurto" malplaĉe sonas al angloj; kompreneble PIV permesas, kaj la signifo estas klara.

Kiel la aliaj verkoj de Inĝenieroj Novak kaj Špička, ĉi tiu libreto estas rekomendinda ne nur al studentoj de sindefendo, sed ankaŭ kiel modelo por fakuloj kiuj emas verki sciencajn kaj teknikajn librojn Esperante. —R. G. ROBERTSON

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 31. — SYLVIA BURKITT "The Quiet Exceller" (Concluded)

We left Sylvia lamenting the death of her husband, but happy in the knowledge that she was pregnant. Alas, a short lived joy, for the baby (premature) died when only a few days old!

Sylvia's work with codes was widened and deepened because she had soon become an expert. Her special unit was always on the move. Fear, discomfort, anonymity. A closed, secret camp among

forgotten people: even listening to domestic radio was disallowed.

After 4 years, Sylvia accepted her discharge in Tasmania. Why Tasmania? Because she knew no one there, and it promised the solitude she then sought. But she was not alone for long. She met, and married, another John.

Remarriage, though, involved renunciation, for she thus denied herself all privileges granted to ex-service personnel e.g. C.R.T.S. Training, Repatriation Benefits and a War Service Home Loan. Our "grateful" country would never forget her, but, now that she had a man to look after her, the Government accepted no further responsibility. Yes, as much as any man, she had sacrificed home life, safety and comfort to serve, but she was **not** a man and, anyhow, it was her fault for getting married.

After a year, this marriage produced a son — a very sick baby who ailed for some years. (You will be pleased to know, though, that he is now a strong healthy doctor, with a charming Chinese doctor wife.) However, after 4 years he was pronounced out of danger, so Sylvia, again avid for education, began a 4-year Arts Course at the Hobart Technical College. Living in the country, not in town, she had to leave home at 4.30 p.m. to attend the 7 p.m. classes. All but 2 of the exams had been completed when her husband shifted his job so they moved to Melbourne. Another setback, for the new syllabus was entirely different, so Sylvia had to "back track". In due course she finished the new course and went on to do post-graduate painting at night — at East Sydney Tech.

Whilst in Sydney (for John had been transferred there after 2½ years) our glutton for study decided to attend night school and matriculate for Sydney University, so she got day work and studied at night. Five school nights per week were not enough, so she did Maths by correspondence. The result? Matriculation with First-Class Honours in English and Biology.

Then began a double-degree course in Arts and Science, her "majors" being Chemistry and Botany and then, later Zoology, English and Psychology.

For several years, Sylvia did post-graduate research at the Museum of Arts and Sciences, where her interest was in Chemical Taxonomy. (No, it had nothing to do with taxes or taxidermy — rather with classification.)

Though working part-time at Tech. and the (then 2 Universities in Sydney, her main interest was coaching. Her own struggles gave spur to her work, and she enthusiastically gave help (often financially) to those with special difficulties. Of such is the essence of teaching! Of her many interesting students one stands out in proud memory, for he is now a world leader in immunology.

When her son and daughter-in-law had completed their medical degrees, Sylvia "retired" from active teaching and coaching work and enrolled as a student in the School of Textiles in Strathfield. There, so successfully that she gained top placing in the final exam, she duly completed the 3-year course — a course which included spinning, weaving, dyeing, design, tapestry and the History of Textiles. From that, she went on to undertake a Teacher-Training Course with the Handweavers' and Spinners' Guild, and qualified as a teacher of Weaving. She now teaches Spinning, Weaving and Dyeing at two Leisure Centres — and conducts Esperanto Classes 4 times a week.

Sylvia attended the Vancouver Congress in 1984, and was on her way to Augsburg in 1985, when news of the terminal illness of her husband brought her back to Australia early. At the end of 1985 she lost her second husband.

Sylvia's rise in the Esperanto Movement has been meteoric. In 1981 was her first Esperanto School — at Toowoomba. In 1984 was her first exam pass — with honours. At the end of 1985, she was made Chief Delegate to U.E.A. and "Peranto" for the whole of Australia.

After her departure for the recent Peking Congress, came the news that she had passed the Supera Examination. With Honours? Need you ask?

—ARTHUR COCKING.



# The Australian Esperantist

(Successor to *La Suda Kruco* and *La Rondo*)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.

**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.

**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614

**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.

**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036

**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 237 (317)

MELBURNO

Novembro, 1986

---

## " A Ŭ S T R A L I O "

(Historio de landnomo)

### La Aborigenoj

La praindigenoj de la nuna kontinento Aŭstralio ne havis mapojn kaj verŝajne ne havis, en siaj lingvoj, terminon por priskribi la tutan grandegan insulon, kvankam kelkaj gentoj nomadis en sufiĉe granda areo.

Informaĵo mankas pri eventualaj nomoj donitaj al la lando fare de fruaj vizitantoj, kiuj eble venis el Indonezio kaj eĉ el Ĉinio.

### Latinaj kaj latinidaj nomoj

En la 16-a jarcento kelkaj eŭropaj geografoj imagis, ke devas esti granda kontinento sude de Azio por gardi la teran ekvilibron. En 1569, Mercator kaj en 1570 Ortelius skribis (kompreneble latine) pri tiu hipoteza lando kiel "contins australis" aŭ "australis continens".

En 1606 la hispana esploristo Pedro Fernandez de Quiros malkovris la nunan Vanuaton, kaj kredis, ke ĝi estas parto de la granda suda kontinento "Australia del Espiritu Santo". En lia libro de 1610 aperis la termino "Australia incognita". Nederlanda traduko de 1612 uzis "Australia incognita"! La angla traduko uzis "Terra Australis" kaj la franca "Terre Australle".

En 1676 aperis libro: "La Terre Australe Connue" kies aŭtoro verŝajne estis Gabriel de Foigny.

En moderna latino oni uzis la esprimon "Australia Felix".

### Nederlandaj kaj Anglaj Nomoj

La Nederlandanoj de la 17-a jarcento esploris partojn de la kontinento, kaj la Portugaloj ankaŭ malkovris la okcidentan kaj orientan marbordojn. La portugalajn mapojn analizis pionira aŭstralia Esperantisto, Georgo Collingridge de Tourcy (kolinriĝ de tursi), kaj liaj teorioj estis la bazo de "Aŭstralio, Lando kaj Popolo".<sup>1</sup> Ĉapitro pri eltrovo kaj esploro p.61. Ili estas nun ĝenerale akceptitaj. La Portugaloj nomis la landon "Granda Java". La Nederlandanoj, kies navigisto Abel Janz Tasman esploris Tasmanion (Van Diemen's Land) nomis la kontinenton "Nieu Holland" aŭ "Nova Hollandia", nomo kiu ankoraŭ troviĝas en kelkaj botanikaj kaj biologiaj nomoj.

Kapitano James Cook (kuk) donis en 1769 al la orienta marbordo la nomon "New South Wales" (NSW) — Nova Sud-Kimrio (NSK). Oni uzis en la kolonio starigita en 1788 la terminon "Greater Australia" por la orienta marbordo de "New Holland, the

Solomons and New Hebrides" kaj "Lesser Australia" por la malgrandaj insuloj ĝis Tahiti.

Estis la navigisto Matthew (Mateo) Flinders (flind'z) kiu unue sugestis, en sia "Voyage to Terra Australis" (1814), ke la kontinento estu nomata "Australia". Liaj landkartoj uzis "Terra Australis or Australia", kaj por la granda suda golfo "The Great Australia Bight". En 1815 homoj naskiĝintaj en la kolonioj estis nomitaj "Australians", kaj post 1817 la Guberniestro de Nova Sud-Kimrio ĉiam uzis "Australia".

Kvankam kelkaj konservativuloj en Anglio preferis paroli nur pri "New South Wales" kaj "New South Welshmen" (Nosokanoj) praktikado en la kolonioj rapide limigis tiujn terminojn al la specifa kolonio Nova Sud-Kimrio. Tasmanio, Viktorio, Kvinlando, Sud-Aŭstralio kaj Okcident-Aŭstralio fariĝis apartaj memregantaj kolonioj kun siaj ĉefurboj kaj kun siaj propraj anglaj nomoj.

#### Esperantigo kaj Zamenhofa Uzado

Kvankam "Aŭstralio" ne aperis en la Fundamento, Zamenhof tre frue uzis ĝin en korespondado kaj listoj. Li transskribis (esperantigis) la anglan — fakte universalan, interlingvan — nomon per ŝanĝo de la fina "a" al la substantiva finaĵo "o".

En "Tra la Mondo" de Majo, 1906, aperis eble la unua raporto en Esperanto pri Aŭstralio, priskribo de la ĉevalkurado "Melbourn Pokalo" de la antaŭa Novembro. Ĝi estis verkita de la pioniro en Viktorio, "John Booth (Aŭstralio)".

Klare por Zamenhof Aŭstralio estis unu el la novaj landoj kie "la lando ne uzas por si (per "uj") la nomon de ia gento, sed kontraŭe, ĉiuj ĝiaj loĝantoj uzas por si (per "an") la nomon de la lando". (Respondo 47, Oficiala Gazeto, 1911, p.291).

Eble la fakto, ke Aŭstralio (same kiel amerikaj landoj) atingis nomojn sen iu rasa aŭ genta deveno, eĉ etimologia, helpis persvadi Zamenhof, ke "ĉiu regno kaj ĉiu provinco devas porti ne la nomon de ia gento, sed nur nomon neŭtrale geografian, akceptitan per komuna interkonsento de ĉiuj regnoj". (Letero: "Post la granda milito, alvoko al la diplomatoj" — Esperanto, Decembro, 1915.

Kelkaj Eŭropanoj, supozeble pro kredo, ke Aŭstralio estas eŭropa aŭ malnova lando, aŭ ke ekzistas iu pragento de "aŭstraljoj", uzis de tempo al tempo "Aŭstralujo". La nura serioza kazo de tiu malsano, kiun mi notis, estis en la Bulteno de la Internacia Labor-Oficejo ĉ 1923. Mi ne funde esploris tiun fenomenon. Aliaj kazoj estas simplaj eraroj de personoj, kiuj kredas, ke "Aŭstralio" estas SATanismo, kaj deziras fundamentigi ĝin, aŭ bonintencaj sed nesaĝaj penoj "normigi" la konstruadon de landaj nomoj per senescepta konstruado de la nomoj de la landoj per aldono de sufikso al la nomo de la gento, reala aŭ imagita.

Kompreneble, el miaj antaŭaj analizoj vi komprenos, ke mi trovas tiajn sugestojn malhelpajn. Mi multe preferas, se la Akademio deziras stimuli normigon antaŭ ol rekomendi liston de la Membroj de U.N., ke ĝi rekomendu nomojn geografiajn kun substantiva kategorio (finaĵo -o, -io, lando, k.t.p.), kaj ke la loĝantoj (aŭ ŝtatanoj) uzu por si (per "an") la nomon de la lando (aŭ ŝtato). Sen iu vortfarada ligilo, sed kutime etimologie ligitaj, restus la nomoj de gentoj kaj lingvoj. La nomoj kun "-ujo" tiam restus neformalaj esprimoj, ĉefe en vortoj kiaj "Esperantujo", "patrujo", "verdulujo" k.t.p. sed ankaŭ por homoj kiuj kutimas uzi "Francujo" k.t.p.

#### Aliaj Propositaj Reformoj

Mi ne scias, ĉu mi vidis la tutan laboraron de la Akademio sur ĉi tiu kampo, sed mi ne ŝatas la sistemon COOL/EICHHOLZ, laŭ kiu Aŭstralio fariĝus "Aŭstralijo". Kvankam ĝi estas inĝenieria kaj grandparte konsekvenca, kaj kvankam la sono "ijo" estas proksima al la rapida elparolo, fare de multaj Esperantistoj, de "-io", tamen mi preferas solvon, kiu respektos la kontinuecon de Esperanto.

#### Praktiko en Aŭstralio

Kvankam Landa Asocio ne havas ĉian rajton decidi pri la nomo de sia lando, praktiko en la lando — kie la geografiaj nomoj estas konstante kaj ofte uzataj en konversacio, korespondado, periodaĵoj kaj libroj — estas atentinda.

Aŭstraliaj Esperantistoj, ekde la komenco, ĉiam uzis:

"Aŭstralio", "aŭstralia", kaj "Aŭstraliano".

Mi neniam aŭdis aŭ vidis en Aŭstralio kritikon, aŭ proponon de ŝanĝo. Kaj tio ne rezultis el manko de scio aŭ intereso — ĉar estis vigla diskutado pri la nomoj de iuj ŝtatoj de la Federacio, kaj de iuj ĉefurboj. La historio de tiuj estas ankaŭ interesa, sed ĉi tie mi nur resumos la nunan praktikon kaj sintenon de la Estraro

de A.E.A.:

Aŭstralio (Ĉefurba Teritorio)	Kanbero
Kvinslando	Brisbano (ne Brizbano)
Nord-Teritorio	Darvino (Kp Nord-Ameriko)
Nova Sud-Kimrio/Kimrujo	Sidnejo (ne Sidneo) (Kp Sydney)
Okcident-Aŭstralio	Perio (Kp Sud-Afriko)
Sud-Aŭstralio	Adelajdo (ne Adelaido, ne Adelejdo, ĉar en Aŭstralio "ai" estas diftongo kun sono inter "aj" kaj "ej", kaj por konservi la aspekton.
Tasmanio	Hobarto
Viktorio	Me. burno (ne Melbourne, la tre frua formo)

### Oficialigo de Aŭstralio"

En sia Vortaro de la Oficialaj Radikoj de Esperanto (Julio, 1922) Th. Cart inkludis "Aŭstralio (-ano)" inter la Ĉefaj Landnomoj (p.31).

Li pravigis la liston per la kapoto jena: "Laŭ Zamenhof, U.V. kaj Ekzercaro 40, Tutmonda Jarlibro (1914), Oficiala Jarlibro de U.E.A. (1916) kaj decido de la Akademio, aprobita de la L.K. (1922)".

Tamen (kvankam "Eŭropo" estis fundamenta) Aŭstralio (kune kun Afriko, Ameriko kaj Azio) fariĝis oficiala radiko nur en la Oka Oficiala Aldono (Aktoj de la Akademio 1968/74), jene:

Aŭstrali/o. La kontinento de la suda hemisfero okcidente de Pacifiko —

A. Australia F. Australie G. Australien H. Australia I. Australia P. Australia.

### La Ŝtato Aŭstralio

Sed Aŭstralio estas ne nur kontinento, sed ankaŭ ŝtato . . . "nacio por kontinento kaj kontinento por nacio" kiel diriĝis Kavaliro Edmund Barton la 1-an de Januaro, 1901, kiam la ses kolonioj federigis. La formalna nomo, laŭ la Konstitucio estas: "La Komunregno (Commonwealth) (de) Aŭstralio". En Aŭstralio oni parolas neformale de "la Komunregna Registaro" aŭ (por eviti konfuzon kun la, antaŭe Brita, Komunregno), "la Federacia Registaro". Sed internacie kaj pli kaj pli ofte en Aŭstralio la nun suverena, sendependa ŝtato estas nomata simple: "Aŭstralio". Tio, kompreneble inkludas la ŝtaton Tasmanion, kaj ĉiujn insulajn teritoriojn kaj la Aŭstralian Antarktan Teritorion!

Ĝis nun la lingvo komuna de Aŭstralio estas dialekto de la angla. Sed kiam la "Aŭs-anoj" aŭskultas samlandanojn ili rekonas sian propran lingvon: la aŭstralian. (Vidu la Aŭstralian-Esperantan Vortaron.) —RALPH HARRY.

- (1) Delsudo kaj Laiho: "Aŭstralio Lando kaj Popolo", Ferdinand Hirt & Sohn en Leipzig, 1922.
- (2) Ankaŭ la Aŭstralia Registaro en "Koncizaj Faktoj" kaj la Turista Komisiono en "Invito el Aŭstralio".

## Kial mi neniam verkis libron pri arkeologio en Esperanto

Bernard Golden

Fakdelegito de UEA pri arkeologio

Esperantistoj, kies tirkestoj estas plenaj de flavigintaj manuskriptoj, longe kolportitaj al diversaj eldonejoj, ofte amare plendas pri malfacilaĵoj rilate publikigon de verkoj en Esperantujo. Kelkfoje la aŭtoroj mem kulpas, ĉar iliaj verkoj valoras nenion. Ke kelkaj el tiaj fuŝaĵoj aperas sur la verda libromarketo, nur reliefigas la malkompetentecon de la koncernaj eldonejoj. Sed tio estas temo por alia eseo.

Kion, do, diri, pri verkoj de fake kaj lingve kvalifikitaj esperantistoj, kiuj kapablas fari vere utilan kontribuon per la uzo de Esperanto sur nova tereno? Ili ja meritas apogon kaj kuraĝigon,

precipe se iliaj jam publikigitaj artikoloj kaj studaĵoj indikas, ke ili havas ion por diri kaj scias kiel diri tion. Bedaŭrinde, ankaŭ por talenthavaj verkistoj la vojo ne estas facila.

Lastatempe s-ro P— el Belgio, kiu havas kutimon skribi leterojn al redakcioj de Esperantaj periodaĵoj, sendis al mi kopion de letero. en kiu li faris akuzon kontraŭ mi. (Estas nekompreneble, kial li ne skribis al mi rekte anstataŭ plendi al redaktoro, kiu kompreneble aperigis unu el miaj artikoloj en sia gazeto.) Jen la plendo de s-ro P—.

„ . . . mi ŝatas demandi S-ron Golden kial, ĝis nun li NE uzis Eon por prof-

esiaj celoj, t.e. en arkeologiaj medioj; kial — kvankam li estas ege skribema — li neniam verkis libron pri arkeologio?”

Tie ĉi mi ne deziras polemiki kun s-ro P—, sed simple informi lin pri la reala situacio rilate libroeldonadon en Esperantujo. Se li pli ofte legus revuojn en Esperanto anstataŭ skribadi leterojn al redakcioj, li konstatus, ke ekde 1975 fakartikoloj el mia plumo aperis en gravaj Esperantaj periodaĵoj kiel **Heroldo de Esperanto**, **Sennacieca Revuo**, **Sciencaj Komunikadoj**, **Monato**, kaj **Dia Regno**; krome, verkoj pri arkeologiaj temoj estis publikigitaj ankaŭ en **Boletín de la Hispana Esperanto-Federacio**, **The Australian Esperantist**, **Esperantista Vegetarano** kaj **Lumturo**. Cetere, mi verkis studaĵojn pri terminologiaj problemoj en la arkeologio.

Plurfoje dum la pasinta jardeko mi proponis al eldonejoj la publikigon de libro pri arkeologio. Hungara Esperanto-Asocio jam de longe ĉesis respondi miajn leterojn; ankaŭ TK-Stafeto silentas; de UEA mi ricevis nean respondon. Sekve de tio, s-ro P— neniel rajtas riproĉi min; mi ja provis, sed la eldonejoj rifuzis!

Nun mi deziras fari demandojn al s-ro

P—. Kial li ne skribis al eldonejoj en Esperantujo por peti, ke estu publikigita ĝisdata libro pri la arkeologio? Kial li ne proponis ankaŭ, ke mi estu komisita verki tiun libron? Se s-ro P— faras tion kaj estas bonŝanca ricevi respondon de la eldonisto, plej verŝajne li estos informita, ke ĝuste nun mankas mono por tiu celo, aŭ la eldonejo jam havas sufiĉe da laboro por pluraj jaroj, aŭ estas eblo eldoni la koncernan libron, se la aŭtoro konsentas pagi la kostojn de kompostado, presado, bindado, k.t.p.

Post dek jaroj da malsukcesaj provoj, mi fariĝis skeptika kaj alprenis realecan vidpunkton. Mi fosas mian sulkon (aŭ en la arkeologia kunteksto, mian tranĉejon), daŭre verkante fakartikolojn, kaj okupiĝante pri kompilado de arkeologia terminaro en Esperanto. La celo de tiu agado ne estas amasigi materialon, kiu ŝimos en la tirkesto. Male, ĉio tio estas valora laboro, kiu portos fruktojn, ĉar relative mallongaj verkoj estas publikigeblaj en la Esperanta gazetararo.

Anstataŭ formuli pikantajn, sensencajn demandojn mi konsilas al s-ro P— cerbumi pri novaj pozitivaj kaj praktike efektivegaj manieroj uzi Esperanton en fakaj medioj.

## 12-a INTERNACIA KONFERENC DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

La Konferenco, sub la ĉeftemo “Paco kaj Libereco”, okazis de la 25-a de julio ĝis 1-a de aŭgusto, 1986, en la tre komforta “Esperia Palace Hotelo” en la centro de Ateno, la “Ĉefurbo de la Eŭropa Civilizacio”.

Ĉe la Inaŭguro en la Kulturdomo de la urbo, la Vicurbestro de Ateno parolis bonvenigajn vortojn. La tradicia inaŭgura parolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna traktis la temon “Kial Paco en Libereco?”. Sekvis akcepto de la Vicurbestro en tre kora etoso.

Kerno de la Konferenco estis serio da altnivelaj prelegoj en kunteksto kun la ĉeftemo. Ĉar ne eblas doni ĉi tie resumojn, ni menciuj nur la titolojn:

S. Sakellaropoulos: “Libereco, Paco kaj Humanismo en la Antikva Greka Filozofio”.

J. Thierry: “Historia Formiĝo kaj Aktuala Pravigo de Libereco”.

D-ro E. de Zilah: “Konceptaj Rilatoj inter Paco kaj Libereco”.

Prof. D-ro I. Lapenna: “Politika kaj Jura Aspektoj de la Sovetia Koncepto de Paca Kunekzistado”.

Du prelegoj ne povis esti prezentitaj de la aŭtoroj mem, sed estis legitaj de anstataŭantoj:

Walter Zelazny: “Paco — Esperanto — Libereco”.

Ralph Harry: “La Rolo de Juro kaj Juristoj en Konservado de Paco”.

Kiel kutime, la Konferenco enhavis ankaŭ riĉan kulturalan kaj distran programon, kiel prelegojn kun diapozitivaj pri Ateno kaj Grekio, viziton al Akropolo kaj vidindaĵoj, prezenton de folkloraj dancoj kaj spektaklon “Eĥo kaj Lumo” apud Akropolo. Ni ankaŭ partoprenis la “Feston de vino”, kie oni povis laŭplaĉe gustumi plej diversajn vin-specojn. La Bankedo okazis en ĉarma restoracio en la pitoreska kvartalo “Plaka”, kun prezento de grekaj muziko kaj dancoj.

Tuttaga ekskurso kondukis al Korinto, Mikeno (kun imponaj restaĵoj de arĥaika kulturo) kaj Epidaŭro, kie okazis prezentado de teatraĵo “La Birdoj” de Aristofano en la subciela antikva teatro.

En postkonferenca ekskurso ni vizitis per ŝipo la insulojn Egina, Poros kaj Idra kaj ĝuis la belecon de tiu vere rava insula regiono. Kelkaj konferencanoj partoprenis ankaŭ en la sekvanta 4-taga ekskurso al Kreto, kiu donis al ĉiuj

neforgesablajn impresojn. La vojaĝo de Ateno al Iraklio, la ĉefurbo de Kreto, efektiviĝis per aviadilo. En la sekvantaj tagoj okazis ekskursoj al diversaj partoj de la insulo per komfortaj aŭtobusoj.

Pro la tre bona organizo de la Konferenco kaj de la Postkonferencaj aranĝoj, ni tre kore dankas al s-ino Adda Sakellaropoulon kaj ŝiaj kunlaborantoj, kiuj neĉaceble klopodis kontentigi ĉiujn dezirojn de la konferencanoj. Tiel oni povas prave diri, ke ĉiuj aranĝoj bonege sukcesis kaj ĉiam restos en la memoro de la partoprenintoj. —KLAUS PERKO

(La venontjara Konferenco okazos en GRAZ, Aŭstrio, de kie nia speciala korespondanto Klaus Perko denove raportos.)

## AŬSTRALIA = =KRONIKO

• **ADELAJDO:** Je 8-a de septembro A.E.A. Prezidanto Ralph Harry estis nia gasto. Li parolis pri la Jubilea Jaro de Esperanto kaj kion A.E.A. planas fari por atentigi la publikon pri nia lingvo. Li ankaŭ faris apelon forte subteni per donacoj la Jubilean Fonduson de la Asocio.

Dum s-ro Harry estis en Adelajdo, li estis dufoje intervjuita pri Esperanto en la radio. Je la 10-a de sept. li estis intervjuita ĉe 5CL kaj je 13-a de sept. ĉe 5 PBA.

Okazis seminario de la Asocio de Instruistoj de Modernaj Lingvoj. S-ro Ralph Harry estis unu el kvin parolantoj en tiu seminario. Partoprenis 188 instruistoj el ĉiuj ŝtato de Aŭstralio kaj la temo de la Seminario estis "Lingva Politiko por multkultura Aŭstralio" (9-an de septembro). La prelego de s-ro Harry faris fortan impreson sur la ĉeestantoj.

Je la 27-a de septembro ĝis la 3-a de oktobro okazis Esperanto-kurso en la Kolegio de T.A.F.E. La Adelajda E-Societo forte subtenis tiun arangan finance, per pago de la flugvojaĝo de Trevor Steele (Brisbano) kaj vasta propagando per 2000 flugfolioj, gazet-reklamo kaj invitoj al lokaj lernejoj.

Aligis al la kurso 27 personoj, kiuj partoprenis ĉiutage, plus dek aliaj studentoj, kiuj partoprenis la senkostajn semajnfinajn sesiojn.

Dankon ankaŭ meritas Heather kaj Peter Elyard kiuj gastigis Ralph Harry kaj Trevor Steele dum ties vizitoj al Adelajdo.

(Laŭ raportoj ricevitaj de Max Wearing.)

• **MELBURNO:** Plej elstara kunveno en oktobro (je la 6-a) plenumis du celojn: Prezidanto Harry Beechey kontribuis grandan stokon da anglalingvaj libroj, kiujn li vendis profite al la societaj financoj.

Sekvis distra kaj informa prelego de Marcelo Leereveld pri Hungario, kie li kaj lia edzino vizitis plurajn urbojn, inkluzive Budapeŝton. Multloke li renkontis esperantistojn, kiuj amike akceptis lin kaj en kies kunvenoj li prelegis pri Aŭstralio kaj Indonezio.

• **SIDNEJO:** 15-an de septembro: Margaret Chaldecott prezentis lumbildojn pri la Pekina kongreso kaj la ekskurso al Guilin. Post la iomete streĉigaj tagoj ĉe la kongreso, ŝi tre ĝuis la tagojn ĉe Guilin, kaj inter la montaroj kaj sur la bela rivero. Semajnon poste ni denove preparis krucvortenigmon por "Telopeo" kaj trovis ke estas facile komenci, sed trovi la finajn vortojn estas terure malfacile. Kompatinda Tom devis ordigi la tuton por ni per sia komputilo.

29-an de septembro: Du seriozaj temoj el eksterlandaj gazetoj rilatis al la stranga situacio de la Pola E-Asocio — oni dubas ĉu la jubilea kongreso ja okazos tie. Ĉu estas io profeta en la nomo de la ukraina urbo Ĉernobil, kie fiaskegis la nuklea reaktoro? La ukraina vorto estas 'Ĉernobil' kiu estas la nomo de amara herbo Artemizio.

—M. CHALDECOTT

• **MANLY:** La 7-an de septembro. en la hejmo de Myrtle Straker, la Bibliarondo, sub la gvidado de nia patrono Kevin Smith, allogis dek studentojn.

La 9-an de septembro okazis aferkunveno en la hejmo de Marjorie Duncan, kiu revenis de sia vizito al Anglujo, je la 5-a. Ni bonvenigis ŝin hejme, ankaŭ Les kaj Bess Scott, kiuj ĝuis la mondkongreson en Ĉinio.

La ĉe-estantoj diskutis reklamadon kaj planojn por la venonta jaro.

La 16-an de septembro la 3-a trimestro komenciĝis en la Eduka Centro kaj la diversaj 4 dumtagaj kursoj.

—EUNICE GRAHAM

• **GUNNEDAH, N.S.K.:** Ĝis nun nia grupo ne raportis pri siaj agadoj ĉar ni faris nenion alian ol lerni la lingvon, sed

nun ni povas raporti pri pli elstara agado:

Je 15-a, 16-a kaj 17-a de oktobro, la Esperanto-Klubo de Gunnedah starigis ekspozicion de la 10-a atm ĝis la 5-a ptm ĉiutage, en la halo de la Unuiganta Eklezio.

Ni montris lernolibrojn, vortarojn kaj librojn, korespondaĵojn, kiuj inkludis multe da bildkartoj kaj fotoj. Ni ankaŭ ekspoziciis fotojn de la 1983-a kongreso en Budapeŝto kaj de someraj lernejoj, ĵurnalojn kaj informaĵojn pri la Pasporta Servo.

La du lokaj radiostacioj anoncis la ekspozicion kaj elsendis intervjuaĵojn; la du lokaj ĵurnaloj publikigis artikolojn pri Esperanto kun anoncoj. Lokaj butikoj, la biblioteko kaj la Urba Komunuma Centro montris niajn reklamojn. Ni ankaŭ letere invitis ĉiujn lernejojn de la urbo, por ke klasoj de studentoj vizitu la ekspozicion.

Sed malgraŭ tiom da reklamo ne venis multe da personoj. Venis 4 klasoj el la sama lernejo kun la sama instruistino, kaj nur 22 individuoj entute. Kvin el ili deziris lerni la lingvon kaj registrigis sin en nia grupo. —BILL LEAH

• **BRISBANO:** Ni starigis budon en la Botanikaj Ĝardenoj dum la dusemajna karnavalo 'Warana', kiel parton de la Pac-Prezentado fare de diversaj organizaĵoj. Tom O'Grady multe laboris, kun aliaj helpantoj, pri la disonado de flugfolioj kaj informado. La 11/12-an de oktobro dum Mondpaca Karnavalo ĉe Caboolture sub la aŭspicio de la Baha'ia Movado, ni starigis budon, kiam Tom O'Grady kaj Ray Ross alparolis interesitojn kaj disdonis informilojn. La kutimaj 4 studgrupoj kunvenas ĉe la klubejo ĉiun lundon. La ĉi-jara Zamenhof-Festo okazos la 13-an de decembro en Halo-St. Albans, Wilston. —RAY ROSS

• **KAPRIKORNA MARBORDO:** Ĉe danco organizita de la Baha'ia Grupo en Yeppoon (ĵepun), por la "milmil pac-minutoj", ni montris kvar murafisojn (de R. Springer) pri Esperanto (Unity, Peace, Survival) kaj jam ricevis unu informpton.

Malgraŭ la nuna "vagadsezono" inter la anoj, kelkaj ankoraŭ kunvenadas sabate por konversi, tetrinki kaj ludi en Esperanto. Sed baldaŭ ni estos unu malpli: nia ĉarma, ĉiame gastama libraristino Merle Packham transloĝigos al N.S.K. Kiu volas aĉeti bonegan, solidan, komfortan domon tra kies fenestro oni

povas vidi ruĝ-oranĝ-koloran lunon leviganta super bluega tropika maro plena de insuloj? —JOHN MOORE

### ESPERANTO—SOMERLERNEJO

Bonvolu kunporti la kantlibron "Aŭstralio Kantas Sian Historion" al Armidale. Bedaŭrinde la originala stoko estas elĉerpita, do estas necese prunti ekzempleron se vi ne posedas la propran.

—RAY ROSS

• **RAVENSHOE** (Norda Kvinslando): Je la 4-a kaj 5-a de oktobro okazis en la urbdomo "La Torimba Pac-Ekspozicio", kiun iniciatis la loka Baha'i-grupo, kaj multaj diversaj grupoj partoprenis. S-ino Madeline Eden, bone konata Esperantistino (kaj membro de A.E.A.) malfermis la ekspozicion. Multaj personoj vizitis la Esperanto-standon kaj petis informon. S-ino Eden estas "85-jarjuna" sinjorino, kiu estas treege aktiva en lokaj aferoj.

—HAROLD GILBERT

### EL LA FEDERACIOJ

• **KVINSLANDO:** Federacia Konferenco okazis en Toowoomba la 18/19-an de oktobro, kiam la loka societo aranĝis ĉi tiun duan konferencon en la belega ĝardenurbo. Partoprenis 26 anoj, kiuj guegis la aranĝon. La kutima "Alportu kaj aĉetu 'budo' certigis financon sukceson.

Dum la ĝenerala kunveno anoj omagis al la memoro de la fondprezidanto, Doris Sinclair, kiu forpasis la 28-an de junio, ĉi-jare. Deleĝitoj raportis pri siaj grupoj jene: Brisbano, Tom O'Grady; St. Lucia, Annie Spencer; Kaprikorno, Joyce Turner; Toowoomba, Jean Lehane; Gatton, Jim Dimo; Skolta Ligo, Jennifer Dimo. Oni konfirmis la lokon de la unua konferenco, 1987 en Gatton kaj elektis por la dua, Brisbanon. Samtempe en junio okazos la jarpikniko ĉe Digo 'Wivenhoe'.

Estis decidite altigi la federacian kotizon al \$3, plus \$1 por familia aliĝo. La Federacio faris donacojn jene: (a) al Jubilea Fonduso de AEA; (b) al Fonduso "Esperanto-Domo en Kvinslando"; (c) al E-Muzeo en Kvinslando ekzempleron de 'Esperanto en Aŭstralio'.

Sabatvespere okazis la kutima vespermanĝo kaj sekvis la Distra Vespero al kiu kontribuis: Jim kaj Jenifer Dimo (per akordionoj); kantgrupoj el Brisbano kaj St. Lucia; Joyce Turner parolis pri inter-

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 32.—JACK HAWKS — "The Battling Bachelor"

This "man without a woman" is definitely not a "ship without a sail". Nor is he "a boat without a rudder", for he has a strong direction and purpose in life — not only content but completely self-reliant in his wifelessness. (Of course, his sister the late Dolly Dean and husband Chris. provided him a home.)

He had to battle in his early youth: in the 1930s' Depression he was the right age to become a trade apprentice, but economic conditions were such that he missed out. Instead, his early working years were spent on dairy farms and orchards. He soon learned that horses — even pigs were more valuable than he was, for he, unlike them, could be replaced without cost. He became a master of the one-horse, one-furrow plough on orchard hillsides where to break off a fruit tree branch was unforgivable.

Later, he found regular employment with an industrial gas production company — oxygen and acetylene. This involved night work — worse conditions but better pay. He saved hard and in 1937 managed to take an unpaid holiday to broaden his horizons — to N.Z. then through the Panama to England with short trips to France and Holland and then home via Suez. An enjoyable yet cheap holiday. Round trip, \$175!

Whilst abroad, he visited gas production plants in our Eastern States and in England, and was promoted on his return to Night Shift Leading Hand, so that when war erupted six months later he was in the thick of things. The Americans used Fremantle as a front line repair base for submarines and so required enormous quantities of oxyacetylene.

A strict blackout was in force and he was often stopped by prowling police on his 8km. bike ride to work. They carefully inspected his sandwiches, but no guard was put on the gas plant where sabotage would have been childishy easy. Acetylene is notoriously "touchy" so there were often (but fortunately short-lived) incidents with explosive fires.

About a year after the war ended, Jack read a newspaper article about Esperanto. With happy memories of his pre-war trip and with an eye to future

travel, he investigated. He found the address, climbed the stairs and found a man working alone at a table. With a squeaky Italian accent the man asked him what he wanted. "I want to learn Esperanto," was the reply.

And learn Esperanto he did — not quite up to the standard that his teacher and life-long friend, perfectionist Dr. Caldera, would expect, but well enough to correspond with Esperantists in 10 different countries and, later, to converse easily with Esperantist friends in many an Esperanto club. In the Bournemouth U.E.K. in 1949 he presented greetings from Australia — a task which jolted him into the realisation that perhaps he could be more active back home.

During the next few years he was Jack of several positions and master of all — President, Vice President, President again (the Perth club limits the presidency to 2 years), Secretary, Treasurer, Publicity Officer and, unofficially, General Factotum. He is now an Honorary Life Member.

In 1957, Jack attended the U.E.A. Congress in Marseilles and delivered Australia's greetings. Major gatherings were held in the Opera House, so he can state, "I stood on the Opera House stage — but nobody asked me to sing!" In 1971 he took part in the London Congress and 1980 saw him in the Stockholm Congress. Both times he visited old friends throughout Europe.

The recent, very successful Perth Congress was, perhaps, the high point in Jack's life. He chaired, he organised, he led a vigorous, experienced team, and even drove a "Rent a Bus" to take us from and to the airport. Quite a strain you might think, after all the mental work involved. Not so! Jack drove like a happy confidence Jehu. He was used to battling through city traffic, for he was a lorry driver for 8 years.

Finally, he told me in modest pride, "Dr. Caldera and I have something in common. If our Esperanto League was a house under construction, he designed and laid the foundation, but I can claim to have nailed a few planks on". Jack can indeed! Quite a few.

—ARTHUR COCKING

Registered by Australia Post.  
Publication No. VBH 1849.

# The Australian Esperantist

(Successor to La Suda Kruco and La Rondo)

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Subscription to A.E.A. \$20  
(Individual, Club & Federation)  
Additional Family Member \$5  
Pensioners & Full-time Students  
pay a minimum of \$10.



---

**REDAKCIO:** "Esperanto", Box 2122T., G.P.O. Melbourne 3001, Australia.  
**Prezidanto:** S-ro R. L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cresc., Forrest, A.C.T., 2603.  
**Sekretario:** S-ino M. Ellyard, Post Office Box 48, Jamison Centre, A.C.T., 2614  
**Kasisto:** S-ro O. Loneragan, 16 Deverell Way, South Bentley, W.A., 6102.  
**A.E.A. Libro-Servo:** S-ro T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, N.S.W., 2036  
**Korespondaj Kursoj:** S-ro J. Moore, 7 Pelican Street, Emu Park, Queensland, 4702

---

N-ro 238 (318)

MELBURNO

Decembro, 1986

---

## CENTENARY OF ESPERANTO

### THE LIVING INTERNATIONAL LANGUAGE

In 1987 the world will celebrate the centenary of Esperanto, the living international language. UNESCO has invited all governments to join in the celebrations.

The centenary will give to the Esperanto community the chance to tell the public about the miracles of those first hundred years — how Esperanto, initiated in Poland by a modest doctor, spread through the world, with its message of hope, approved by linguists and institutions, used by professionals, and non-linguists alike.

The centenary will be an occasion to inform sympathisers about the contribution of Esperanto to international understanding and peace, and how it has triumphed over the attempts of chauvinist dictators and conservative educators and the apathy of the uninformed.

Esperanto has not only survived, when other attempts to solve the language problem have been still-born, or have withered away. It has been learned, and tested, and put to use, by hundreds of thousands of people, many of them creative writers or eminent in their professions . . . Presidents and professors, ambassadors and architects, teachers and technicians. Congresses have been held not only in Paris and Budapest, but in Tokyo, Brasilia, Vancouver, Peking.

Esperanto has not only demonstrated its capacity to translate the great literature of many people. It has become the vehicle of an important original literature. Special Centenary publications of the Universal Esperanto Association include an enlarged anthology of Esperanto original poetry and a volume of original prose as well as the full analytical grammar.

In Australia the Australian Esperanto Association has prepared:

- A Centenary Summer School and Conference in Armidale
  - A Centenary travelling exhibition: "The Miracle of Esperanto"
  - An Anthology of Australian literature, in Esperanto
  - A booklet: "Esperanto the Living International Language"
-



- A History of Esperanto in Australia
- A special number or numbers of The Australian Esperantist.

The extent to which this program — all designed to publicise and provide information — can be carried through depends on the resources available. But if all members of the Association contribute, according to their financial means and talents, the Centenary Year can be a year of great progress. I appeal to those who have not yet sent in their donation to do so without delay, and I ask those who have already given to give again, if they possibly can do so. We have \$3,000. We need \$20,000 by the end of 1987!

#### Our Patrons

It is encouraging to us to know that already, in addition to the Committee of the Association and other members, the Centenary of Esperanto is being supported by the following distinguished Australians:

Hon. Mr. Justice Enderby, Supreme Court of N.S.W.

Professor R. C. Gates, A.O., emeritus Vice-Chancellor, University of New England

H.E. Mr. Charles Mott, Australian Ambassador to UNESCO

Senator M. J. Macklin, Senator for Queensland

Senator Colin Mason, Senator for New South Wales

Dr. Keith Suter, Director of the Trinity Peace Research Institute, Perth, winner of a Year of Peace Prize.

As the International Year of Peace closes and the Centenary of Esperanto opens I invite you all to tell the world about the good news. After 100 years of vigorous growth, our language is ready for general use. Its time has come!

—RALPH HARRY.

### ALBANIO, LA LASTA SEKRETO EN EŬROPO

(De nia svisa korespondanto, kiu vizitis Albanion antaŭ 3 jaroj)

Apenaŭ pri alia eŭropa lando oni tiom malmulte legas aŭ aŭdas. Tamen, sub certaj kondiĉoj, turismo eblas. La registaro timas, ke la popolo kontaktu kun alilandanoj. Ne eblis, spite de pluraj aŭskriboj, kontakti la verŝajne unusolan esperantiston en tiu lando.

Por alveturi la elekto ne estas tro granda, eblas aŭtobuse ekde Jugoslavio, sed pli praktike estas flugi al Tirana. Stranga vido, sur vasta flughaveno neniu alia aviadilo — ol nia, ĉeĥoslovaka — ankaŭ ne militaj. Nur eblas grupo vizito, individuaj vizitoj ne estas haveblaj. Personej aŭtomobiloj ne estas tolerataj — nur de registaranoj kaj diplomatoj. Sed trafikaj ŝarĝaŭtoj kaj aŭtobusoj kaj kelkaj fervojlinioj ekzistas, nur depost jaro ligitaj al la eŭropa fervojreto kaj sole por varvagonaroj.

La hoteloj estas iom pli modestaj ol laŭ kutimo, sed puraj. La manĝaĵoj en hoteloj neluksaj, sed variaj kaj ĉiam kun legomoj kaj fruktoj. En vendejoj — vide al la ege malaltaj salajroj — la vivnecaj manĝaĵoj estas tre malmultekostaj.

Dum la lasta milito invadis unue italoj, poste germanoj. 1944 la ŝtato deklaris sin memstara, kun komunista registaro sub diktatoreco de HOXHA. 1945, ĉe militfino, estis intimaj rilatoj politikaj kaj ekonomiaj kun Jugoslavio, sed jam 1948 Hoxha timis, ke Tito volas submeti al si Albanio. Do, la registaro ligis sin pli al Sovetio, pro timo pri rabo de memstareco nur mallonge. Tiam sekvis kunlaboro kun Ĉinio. 1978 rompiĝis ankaŭ tiuj kontaktoj. Hoxha preferis sin apogi je propraj fortoj, preferante malpli rapidajn ekonomiajn progresojn. Albanio nun eksportas ĥromon, feron, nikelon, kupron, oleon kaj bitumon. Ĝi importas nur tiom da varoj kiom ĝi povas pagi per nunaj eksportoj. La leĝaro ne permesas pruntadon de mono en alia lando. Menciinda kaj laŭdinda pro tio estas, ke Albanio estas la sola lando de la tria mondo sen ŝuldoj.

Ŝajnas, ke la popolo kontentas pri simpla vivo — aŭ pli bone dirite, forta polica reĝimo ne toleras ĝenojn. Kuracista servo, kuracado en hospitalo estas senpagaj kaj la ŝtato ne postulas impostojn. Menciinda estas la nefuŝita naturo, puraj riveroj kaj lagoj kaj bona aero.

Albanio estas la unua plene ateista ŝtato en la mondo. 2169 preĝejoj kaj

klostroj estis fermitaj, malkonstruitaj aŭ nun uzataj kiel muzeoj, junulardomoj, kelkaj kiel sportejoj aŭ restoracioj. Praktike religio estas malpermesita, tamen gemaljunuloj rajtas preĝi en siaj kvar muroj. Estis videblaj maljunuloj en stratoj kun ia ĝeno en la manoj. Vojaĝgvidanto — bona partiano — klarigis, ke estas ludilo, sed plej versaĵne temis pri rozario.

Kontakto de la popolo kun turistoj estas tolerata, sed malhelpo estas la lingvo — iom simila al la itala. La vojaĝoficejo konsilis fotti homojn nur kun ties konsento. Plej ofte ili malkonsentis, sed vestitaj en naciaj kostumoj volonte prezentis sin. Ofte infanoj ĉe buso petis pri maĝumo aŭ globskribiloj, sed kiam ili vidis fotoaparaton ili tuj forflugis. Turisto kiu pretas akcepti la cirkonstancojn certe kontentas pri vizito al tiu interesa lando, diferenca ja multrilate de niaj cirkonstancoj. —Wa.

### GEOGRAFIJAJ NOMOJ

Aldone al la bonegaj artikoloj de Ralph Harry pri geografiaj nomoj mi devas atentigi ke estas grave, ankaŭ pri geografiaj vortoj, ke ni senŝcepte sekvu la jenajn kelkajn karakterizaĵojn esencajn de Esperanto.

1. Vortradikoj en Esperanto neniam havas la saman konsonanton duoble. Se okazas du tiaj unu post la alia, la vorto estas kombinaĵo kaj la du literoj apartenas al diversaj radikoj. Nomoj kiaj Finnlando do estas tute kontraŭ la spirito de nia lingvo (se ne originantaj el "Fina No Lando").

2. Estas konsilinde, ke la geografiaj nomoj estu, plejble, radikoj (aŭ derivaĵoj de radikoj). Do pli bone Riodejaneiro ol Januarrivero (la urbo eĉ ne estas rivero). Kaj prefere Saŭstralia (aŭ io tia) ol Sudaŭstralia (ĝi estas eĉ malpli "sudaŭstralia" ol Viktorio kaj Tasmanio).

3. Vortkombinaĵoj estas farataj en Esperanto per simpla kunmetado de la partoj, ne per streko. Do Novjorko, Okcidentaŭstralia (se ne Vestralio), Kapurbo, Bonaero (se ne Buenasajro), Novsudkimrio (se ne Niusaŭzvejljo, aŭ Nosoko), Novzelando (se ne Niuzelando) kaj Nordameriko anstataŭ la formoj kun strekoj kiuj estas tute kontraŭ la estetiko de vortfarado en Esperanto. Rim. En la lasta A.E. mi vidis ĉe-estantoj, ĉi-jara, vin-specoj, gazet-reklamo, orang-kolora,

kaj ĉi-jare. Ĉu baldaŭ ni vidos, konsekvence, kun-veno, sen-senc-aĵo, mal-fermi, kaj mar-bordo?

4. Laŭ la principo de vortfarado nova signifo estas esprimata per kombino de du vortoj (kaj/aŭ vortetoj), ne per simpla uzado de du apartaj vortoj ("vagonaro" kaj "matenmanĝo" ne samas al "aro de vagonoj" kaj "matena manĝo"). Do en Esperanto nepras diri Sudaŭstralia (Suda Aŭstralia estus la suda parto de Aŭstralia), Novzelando (Nova Zelando estas post droniĝo denove kreita Zelando = Marlando, en Nederlando), kaj Novsudkimrio (Nova Sudkimrio estas ŝangita Sudkimrio, en Britio).

5. Devas ne ekzisti en Esperanto vortradikoj kun du diferencaj signifoj. Konsekvence ne povas ekzisti (kiom ajn oni ŝatus tion) geografiaj vortoj kiaj Finnlando (se estus kombinaĵo de Lando de la Finoj), Laso, Togo, Tago, Limo, Kreto, Malto, kaj Kubo.

6. Geografia nomo indikas unu aĵon, kaj do ne povas esti plurale uzata; ĝi neke uziga normale kun la artikolo. Do uzendas Usono, Hebrido (aŭ Hebridaro), Nederlando, Apenino, Alpo (aŭ Alparo), Rokmontaro, Hago, Kairo (ne La Kairo), Danubo (ne "La Danubo"), Negmontaro (sen "la"), kaj Hindioceano (sen "la").

Ni zorgu, ke Esperanto restu logika kaj belaspekta laŭ sia propra ecaro.

—MARCEL LEEREVELD.

### FORMIKOJ EN LA SUKERUJO

Kiam mi estis junulo en Anglujo oni dungis min por agi kiel kuireja knabo en eta marborda hotelo. Dum longaj horoj mi ekzistis kun varmega, sed malpura akvo ĝis miaj kubutoj. Mi skrapis la malpurajn manĝilojn. Mi skrapis la kuirpotojn. Tiam, sub la aglaj okuloj de la ĉefkuiristo, mi preparis la legomojn. Same kiel punito en la armeo, mi marŝis en la "Kuireja Parado" (La "Ko-Po" estis la soldata nomo). Mi deŝeligis centojn, eĉ milojn da terpomoj.

Dum la varmaj someraj monatoj la kuirejo iĝis plagita de formikoj, kies plej preferata dieto estis la dolĉaĵoj. Por ŝirmi tiajn manĝaĵojn kontraŭ la malaĝrablaj vizitantoj, la ĉefo uzis speciaĵan ŝrankon, kies piedoj staris en ujoj plenplenaĵ de likvida veneno.

Mia lasta ĉiutaga tasko, antaŭ ol mi rajtis enfali komplete elĉerpita en la liton, estis prepari la finan infuzon de

teo por la stabanoj. Unu vesperon mi forgesis meti la sukerujon en la venene ŝirmatan ŝrankon. Tra la nokto ĝi staris sur la stablo apud la lavopelvo. Venontmatene, kiam mi eniris la kuirejon, mi trovis la sukerujon tute malplenigita. Nokte longaj vicoj da formikoj enirinte ĝin, reiris al la formikejo sub la planko portinte unu sukereron post la alia. Ĉiu formiko partoprenis la taskon ĝis la fino.

Ofte Esperantistoj scivolas kiam ili sukcesos persvadi la mondon akcepti la internacian lingvon kiel duan komunikilon. Trovu ni lecionon en la rakonto pri la formikoj. Ni ĉiuj, la plej malfortaj, la plej aĝaj, devas helpi. Nia portado de unu grajno post alia ŝajnas esti negrava tasko. Sed eĉ ĉi-tia kontribuo helpas, ke ni venku, kiam neniu flankenfalas de la elektita vojo, kiu sin etendas al triumfa sukceso.

—CLIFFORD H. BROWN,  
CHRISTCHURCH, N.Z.

### EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto eldonata de  
Ĉina Esperanto-Ligo.

Riĉe ilustrita:

ABONTARIFO: 1 jaro \$14,

2 jaroj \$24, 3 jaroj \$34.

Sendu al la Aŭstralia Peranto:

Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,  
Parramatta, NSW, 2150.

### Novajoj el Orienta Germanio

• Leipzig (SK): La fama aŭtoro de Esperanto-vortaroj kaj lingvosciencisto, D-ro Erich-Dieter Krause, estas elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto. Tio okazis per voĉdonado de la akademianoj en majo 1986, kaj rekonas la meritojn de la sperta esperantologo.

—ooOoo—

• (SK) La UNESKO-komisiono de la Germana Demokrata Respubliko transprenis la patronadon de la "Internacia Foira Esperantista Renkonto", kiu okazos en Leipzig de la 13-a ĝis la 15-a de marto, 1987.

—ooOoo—

• (SK) Esperanto-klubejo en Leipzig: "Sciu, ke vi posedas en mi ĉiam pretan kunlaboranton", estis la lastaj vortoj de

alparolo, kiun faris S-ino Ellen Rohde okaze de la 1986-a "Int. Foira E-ista Renkonto". Ŝi estas urba konsilistino por kulturo en Leipzig. Kaj ŝi ne nur promesis, sed intertempe agis! Ekde junio 1986 la esperantistoj de Leipzig rajtas uzi — tute senkoste — triĉambran klubejon dum 4 tagoj de la semajno. Kaj Ellen Rohde, ekde septembro, aliĝis al Esperanto-kurso de la Vespera Lernejo en Leipzig.

• Pollando: La Esperanto-Redakcio de "Radio Polonia", je la 26-a de julio, 1986, dissendis la 30000-an elsendon deponat sian komencigo en 1959. Ĝis nun la radio-stacio ricevis pli ol 100000 leterojn de la aŭskultantoj.

—ooOoo—

• Ĉinio: Aperis nova "Ĉina-Esperanto Vortaro" en eldonkvanto de 20000 ekzempleroj. Ĝi estas bindita en verda ledo kaj ornamita per oraj literoj.

### ESPERANTO SUMMER SCHOOL

Duval College, Armidale, N.S.W.

5-17 Jan., 1987 — Jubilee Conference  
9-11 Jan., 1987.

#### PARTICIPANTS:

Joyce Turner	Q'LD.
Arthur Cocking	NSW
Rita Dunbar	NSW
Marjorie Duncan	NSW
Irina Timonin	NSW
Bill Leah	NSW
Sheila Leah	NSW
Kep Enderby	NSW
Dorothy Enderby	NSW
Kay Howe	Q'LD.
Eunice Graham	NSW
Betty Cleminson	NSW
Berilo Loh	NSW
Malcolm Ross	NSW
Janet McClelland	NSW
Elizabeth Aulsebrook	NSW
William Aulsebrook	NSW
Kathleen Montefiore	Q'LD.
Vlado Kosef	NSW
Ray Ross	Q'LD.
Len Eddington	WA
Myrtle Straker	NSW
Kay McCashney	WA
Marj Ellyard	ACT
Vera Ramsay	NSW
Ann Peek	NSW
J. Pryor	NSW
Evon Arthur	NSW
Joan Green	NSW
John Abood	NSW
Jenifer Jefferies	SA
Liz Smith	NSW
Jean Lehane	Q'LD.
Herbert Koppel	VIC.
Trevor Steele	Q'LD.
Ralph Harry	ACT

(NSW, 24; Q'LD., 6; WA, 2; ACT, 2; VIC., 1; SA, 1.) Plus approx. 14 Participants for the Jubilee Conference only.

Ĉi tiu NAŬA NUMERO por 1986 venas al vi pro  
la malavaraj donacoj de 66 esperantistoj kaj  
Esperanto-organizoj, kiuj kontribuis al la  
"Subten-Fonduso" de nia gazeto.



• **MELBURNO:** Je 27-a de oktobro, s-ino Fay Koppel parolis pri la personeco kaj verko de Marjorie Boulton. Ŝi montris bildojn pri la poetino, ties verkojn kaj legis kelkajn poemojn.

Nia mondvojaĝanto Marcelo Leereveld, 3-an de novembro, prelegis kaj montris kolorajn diapozitivojn pri Sud-Afriko, Hispana Maroko, Egiptio kaj Israelo, inkluzive de la angulo kaj strat-signo de Zamenhofstrato en Tel-Avivo.

Je 24-a de novembro, s-ino Fay Koppel daŭrigis sian preleĝserion pri famaj Esperanto-poetoj. Ĉi-foje ŝi parolis pri la vivo kaj verko de William Auld. Ŝi ankaŭ deklamis poemon de la aŭtoro.

Bonvena vizitanto, samvespere, estis Harold Gilbert, multjara membro de la Melburna E-Societo, sed nuntempe loĝanta en Cairns, Norda Kvinslando.

• **KANBERO:** La 1-an de sept. la klubo kunvenis en la hejmo de Ralph Harry por bonvenigi Marij. Ellyard post ŝia reveno el la 71-a Universala Kongreso. Oni ankaŭ prezentis videobendon de la 25-a Aŭstralia Kongreso.

La 21an de sept. la Prezidanto kaj Sekretario estis intervjuitaj de Nola McDonald en la programo **Akcento** de radiostacio 2XX. La 28-an de sept. Nola intervjuis Will Firth pri Esperanta Literaturo, super ĉio la poezio, al kiu Will jam faris kontribuon. Ralph ankaŭ partoprenis en la programo "Word Game" de ABC. La speciala temo estis Esperanto. Ralph parolis pri la lingvo kaj poste partoprenis en la ludo (frazo de vortoj komencantaj per la literoj E S P E R N T kaj O; frazoj de vortoj kiuj ne uzas unu literon de la alfabeto). La programo daŭris dum pli ol unu horo.

La 30-an de sept. klubanoj legis la

dramon "La Kverko de Gdansk", prepare al la Jubilea Konferenco. La 13-an de okt. Ralph prezentis sian filmon pri Is'ando, faritan dum la 62-a U.K. en Rejkjaviko. La klubo bonvenigis Irena T'imonin, kiu vizitis nin kun sia nevo.

—R.H.

• **MANLY:** La 51an de oktobro, 13 personoj kunvenis en la hejmo de Janet McClelland por partopreni en la tre populara ĉiumonata Biblia Rondo, gvidata de Kevin Smith.

La 7-an de Okt., post la kursoj en la Eduka Centro, okazis aferkunveno por diskuti arangojn por la Zamenhof-Vespero kaj la Kristnaska Festo.

Je la 14-a, ankaŭ post la kursoj, Les Scott montris interesan video-bendon de la Universala Kongreso en Pekino kaj la 28-an, en sia hejmo li montris ege belajn lumbildojn pri la sama kongreso kaj la postkongresa vojaĝo. Kiel kutime ni ĝuis bongustan vespermanĝon kaj la gastamon de Les kaj Bess.

Ni havis la plezuron bonvenigi Martin Parlan el San Francisco, la 14-an de okt. Li tiel amas Manly kaj la Manly-anojn, ke li tute ne povas sin fortiri.

—EUNICE GRAHAM.

• **SIDNEJO:** La 13-an de oktobro okazis diskuto pri droĝoj. Droĝoj povas esti leĝaj, preskribitaj de via kuracisto kaj venditaj de via apotekisto. Sed kiam oni nuntempe parolas pri "droĝoj" oni kutime pensas pri la neleĝaj, tiuj kiuj estas ŝtelitaj, faritaj senpermeso kaj importitaj kontrabande. Iu ĉe la kunveno fumetis kaj post la kunveno ni trinkis teon — ĉu ankaŭ ni estas maniuloj?

Je 20-a de oktobro Margaret Chaldecott nomis sian prelegon "Spegule". Ŝi e'ektis tiun vorton por tikli la menson. Ŝi montris lumbildojn faritajn dum multaj jaroj pri diversaj temoj, sed la 'komuna fadeno' estis ke en ĉiu io estis spegulita aŭ en akvo, malseka surfaco aŭ fenestro.

Legante el ĵurnalo presita antaŭ 20 jaroj. Kitty Gassner, 27-a okt., memo-

rigis nin, ke ni devas ĉiam diri la Veron, sed ke okaze oni rajtas iomete fleksi ĝin. Je 3-a de novembro Joan Green prezentis tri tradukojn de "Churchill-a" frazo "Never have so many . . ." kaj estis interese kompari kiel la tradukistoj prilaboris la frazon. Margaret Chaldecott prezentis multajn vortojn kaj frazojn el libroj de Johan Valano.

—M. CHALDECOTT.

• **ST. LUCIA:** Ofistoj elektigis ĉe jarkunveno, kiu okazis la 12-an de novembro en la hejmo de S-ino Winsome Greenhalgh:

Prez: Decia Shonan; Vic-Prez: Sybil Martin; Sekretario: Ruth Philp (17 Jevons St., The Gap, Brisbane, 4011); Kasisto: Bernice Patterson; Libroparanto/Bibliotekisto: Winsome Greenhalgh. Komitato: Mary Stephenson, June Culen, Ruth Morrison, Betty Henderson, Ruth Mason, Emily Bell, Annie Spencer.

La grupo renkontiĝas ĉe la domo de S-ino Winsome Greenhalgh, 39 Ryan's Rd., St. Lucia, ĉiun merkredon dum la jaro.

**NORMA SUPERA EKZAMENO:** Gratulon al S-ro Gordon Gregson, Cottesloe, O.A., kiu sukcesis "Kun Honoro" en la supre-menciita ekzameno.

### LA PLEJ GRAVA EVENTO POR ESPERANTO EN 1987

Jam nun montriĝas, ke la plej grava manifestacio por Esperanto en la Jubilea Jaro 1987 estos la Jubilea Esperanto-Konferenco en Graz: en demokrata, neŭtrala lando — prestiĝa Internacia Honora Komitato — inaŭguro de la Monumento dediĉita al Esperanto — unuarangaj lekcioj pri la ĉeftemo "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo" — impona Esperanto-ekspozicio — multaj aliaj kulturaj kaj distraj eventoj.

Certigu jam nun vian partoprenon per tujaj aliĝoj.

Informoj kaj aliĝoj: D-ro Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ, Aŭstrio.

La Konferenco okazos de la 18-a ĝis 25-a julio, 1987.

Prelegos: D-ro A. Albault (Prezidanto de la Akademio), D-rino Marj. Boulton, Baldur Ragnarsson (Islando), D-ro Paul Neergaard (Danlando), Prof. D-ro I. Lapenna, kaj multaj aliaj.

—Kuracisto severe malpermesis al mia edzino okupiĝi pri kuirado . . .

—Ĉu via edzino estas malsana?

—Ne, sed mi malsanas . . .!

## MONATO

Internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN

ESPERANTO

Gazeto pri aktualaj aferoj kaj

kulturaj fenomenoj.

Aerpoŝte \$44, ŝipe \$35.

Mendu de:

Sylvia Burkitt, 20 Grandview St.,  
Parramatta, NSW, 2150.

## NEKROLOGOJ

ARTHUR CAPELL

28.3.1902 — 10.8.1986

Bakalaŭro en 1922, Magistro en 1931, Diakono en 1925, Pastro 1926, Vikario 1926-1928, Ĉefpastro 1928-29; Estro de lernejo 1929-32, Vikario diversloke 1932-37, Lektoro pri Oceaniaj Lingvoj, Universitato de Sidnejo, 1949-62, Kanoniko ĉe Katedralo de S-aj Petro kaj Paŭlo ĉe Dogura, Papuo-Novgvineo 1956. Doktoro de Literoj, Universitato de Sidnejo 1981 (tiun diplomon li ricevis je sia 79-a naskiĝdato).

Prezentante lin al la Kanceliero okaze de lia eniro al la Diplomo de Doktoro de Literoj, la Vic-kanceliero komparis lin al la juna Wolfgang Mozart. Je la aĝo de 14, Mozart, aŭdinte horon nur unufoje en Romo, surpaperigis la ĝistiaman ne skribitan muzikon. Arthur Capell, vizitante vilaĝon en Figio, kie la dialekto estas neordinara kaj malfacila, matene aŭdis la lingvon kaj vespere uzis ĝin kiam li predikis. Je la aĝo de 20 li gajnis unuarangajn honorojn pri la latina kaj greka lingvoj.

Krom la klasikaj lingvoj, li ankaŭ interesiĝis pri la lingvoj de Oceanio, verkinte artikolojn por akademiasaj ĵurnaloj. Post periodo ĉe Morpeth, iu proponis, ke li iru al Londono. Tie, post du jaroj, li gajnis la diplomon Doktoron de Filozofio per sia tezo de "La Lingvistika Pozicio de Sud-Orienta Papuo". Reveninte Aŭstralion, li verkis vortaron Figia-Anglan, ankoraŭ uzatan. Oni diris, ke li estis 'la monda aŭtoritato pri melanezia lingvistiko, kun pli bona scio pri la lingvoj aŭstraliaj kaj papuaj ol iu ajn. Ekzemple, el la 200 lingvoj de norda

Aŭstralio, li sciis 100. Li havis tre senteman oreilon pri la sono de lingvaĵoj kaj profundan percepton kaj aprecon de ĝia strukturo.

Sed pri Esperanto vi trovos nenion en la oficialaj dokumentoj. Kiam li estis ĉe Morpeth, li trovis en brokantejo libron subskribitan de s-ro Pryke kaj ŝajne li instruis sin mem. Kelkfoje li vizitis la Sidnejan societeton kaj parolis interese pri la ĉiokaj indigenoj. Antaŭ eble 6 jaroj, oni petis el Italujo, ke li partoprenu en nova traduko de la Biblio. Mi tajpis lian manuskripton rilate al "Readmono", sed kvankam la italoj ofte skribis al li dum li tradukis, ili neniam sendis avizon de ricevo.

Ĉe la Funebra Servo parolis kaj la Episkopo de Norda Sidnejo kaj la Kanceliero de la Sidneja Universitato. Ĉe la kremacio parolis la Ĉefepiskopo de Sidnejo.

Li havis bonan humursenton kaj eĉ en maljunaĝo helpis junulojn kun problemoj. —MARGARET CHALDECOTT.

### WALTER ILLINGWORTH

Mortis la 29-an de septembro, 1986, en la "Charles Jenkins Hospitalo" de Rowethorpe (apud Perto), nia samideano Walter Laurence Illingworth.

Dum multaj jaroj li estis membro de la Esperanto-Ligo en Perto, kies membroj multe ĝuis liajn prelegojn kaj lum-bildojn pri liaj multaj vojaĝoj tra ekzotikaj landoj.

Li ankaŭ bone parolis la francan lingvon kaj estis membro de la Alliance Francaise. Kiel sperta ŝakludanto li partoprenis korespondajn ŝakludojn. Dum multaj jaroj li estis urba ĉefsekretario de Narrogin.

### EINO LOORITS

Nur nun ni povas raporti pri la morto de S-ro Eino Looirts, ĉar letero de la Redaktoro al s-ino Looirts restis ne respondita pro ŝia malbona scipovo pri la angla lingvo. Ni dankas al S-ro Eric J. Bantick, Hobart, kiu persone intervjuis s-inon Looirts.

Eino Looirts, kiu estis UEA-Delegito en Hobarto, mortis subite pro koratako la 24-an de decembro, 1985. Li estis 76 jaraĝa.

Li naskiĝis en Ruslando de estonaj gepatroj, sed la familio reiris al Estonio kiam Eino estis 16 jaraĝa. Tie li eklernis Esperanton.

Ges-roj Looirts troviĝis, je la fino de la Dua Mondmilito, en germana tendejo por rifuĝintoj, de kie ili elmigris al Aŭstralio. Unue ili estis en Perto, sed ĉar ili ne povis toleri la varman klimaton, ili migris al Hobarto, kie Eino, dum multaj jaroj, laboris kiel poŝtisto.

Li estis entuziasma membro de la Hobarto E-Klubo, kiam tiu ekzistis. Li partoprenis en la 21-a Aŭstralia Kongreso en Launceston, 1978, kaj montris sin tre helpema al frue alvenintaj kongresanoj.

### LA "A.E." SUBTEN — FONDUSO 1986

Antaŭe raportita .....	\$785
Bill Leah, Gunnedah, NSK .....	20
A. Gleeson, Wonthaggi, Vik. ....	2
Winsome Greenhalgh, Brisbane ..	10
Sylvia Burkitt, Sydney .....	60
Kaethe Schwerin, Sydney .....	50
A. C. & E. C. Oliver, Perth .....	15
	<hr/>
	\$942

### JUBILEA FONDUSO

Antaŭe raportita .....	\$1930
Melbourne Esperanto Society .....	50
Esperanto-Federacio de Viktorio ..	100
Idyss Einhovici, Perth .....	100
Winsome Greenhalgh, Brisbane ..	50
Sheila & Bill Leah, Gunnedah .....	50
Cliff Tronerud, Kenmore, Q. ....	100
Dorothy Threlfall, Perth .....	20
Dorothy Threlfall, Perth .....	15
Kaprikorna E-Klubo .....	20
Kanbero E-Klubo .....	100
E-Federacio de Kvinlando .....	200
	<hr/>
	\$2735

### Donacoj venis:

El Okcidenta Aŭstralio .....	\$835
Kanbero .....	700
Viktorio .....	480
Kvinlando .....	420
Nova Sud-Kimrio .....	300

---

\$2735

## WHO'S WHO IN AUSTRALIAN ESPERANTO

### 33. OWEN WILLIAM LONERAGAN

He lived among Giants.

Owen, his capable, versatile (wood-carver, upholsterer, home decorator) wife Joan and their first born, started family life at the 34-mile peg 55km S.W. of Perth. Sometimes a neighbour, sometimes not. Two Indian motorcycles, a yard tank for rainwater, an outside wash-house and toilet, no laid-on water, a "Coolgardie" hession cool-safe, "motherpot" irons, an Aladdin pressure lamp and an axe, plus wedges, for the firewood. Hardly a luxury setting for a man of his qualifications — B.A., B.Ed., Dip. Forestry.

Yet he loved the life. He loved the trees and through academic work and especially "in the field" became an accredited expert. (We benefited from this expertise during the 1986 Post-Congress tour of Swanland. Some of us didn't know a she-oak from a shoe tree, but he simply and patiently told us in rich and loving, but not excessive, detail all about his giant friends of the forest.)

A summarised flash, back — and forward! Born and bred, Perth. Enjoyed many sports, esp. soccer. Played tenor horn in R.S.L. band. Joined Public Service (health and laboratory) at 16. In Army in 1942 then Airforce as Wireless Operator, air-gunner. Uni. of W.A. — Arts and Education but never taught. Began Science degree 1946. Student of Forestry in Canberra in 1949. 1951 to Gleneagle as Forest Assessor with a Diploma in Forestry. Dwelt briefly in Dwellingup, successfully managing control and suppression of forest fires; next, to Pemberton (1957), Manjimup and Como. Bachelor of Forestry and Master of Science 1963. Enjoyed regenerating and preserving the ecology of native trees, jarrah, marri, sheoak, vandoo and sandalwood. Self-education included typing and, more recently, elementary word processing, financial recording and computer broadsheets. (No wonder he handled the finances of the Perth Congress with such consummate skill and continues as Treasurer of A.E.A.) Finally, 1969 moved into present home — several levels, with landscaped flower-

beds, lawns, gardens, ferns and — of course — trees.

Having settled into his new home, Owen looked round for something else to do and by chance spotted an advertisement in the local press: "Learn the international Language".

So he began in 1970, together with Olive Larter, Alice Longson and others. He is grateful for the early help and encouragement of Dr. Caldera, Edith Farmer, Ruth McGrath and Jack Hawks, and later of Ray Ross, Trevor Steele and Audrey Childs-Mee in Toowoomba, and of Vera Payne at Mt. Lawley College. Supplementary correspondence lessons from S-roj Timmins, Banham and Linton were much appreciated.

The Esperanto League is affiliated with the United Nations Ass'n., so Owen became involved and has for several years now represented the International Language on the executive of U.N.A.A. He is also convener of the Environment Group.

Several Ministers of religion, plus a lawyer, schoolteacher and a Quaker have for many years been esteemed "guide and philosophic friends". However, though still friendly with many Churchmen and having been confirmed in both the R.C. Church and the C. of E., Owen finds it difficult to accept totally their doctrines and inclines rather to the principles of the Bahai Faith which, he feels, accord with Esperantism.

Now, after 37 years of happy marriage he is content as a husband, a father of 3, and the grandfather of 5. His "retirement" is a very active one, for he is involved in 5 avenues of community service. He is founding member of the Steering Committee of Greening Australia, Vice President of the W.A. United Nations Ass'n., Assistant Treasurer and Executive Member of a Bangladesh Co-operative that assists destitute families, an Honorary Life Member of the Esperanto League of Western Australia and Treasurer of the Australian Esperanto Association.

A man of many parts — all working.  
—ARTHUR COCKING.